



LITERATURA
VIVO



Numero 003

Settembre 2025

Enhavo

Nota: Ruĝa estas prozo, verda estas poezio

- Erika Godó kaj John Huang: **Vortoj al la legantoj** p.4
Erika Godó: **Anonco por Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay** p.5
Laimundas Abromas: **Fabelo pri la tria frato** p.7
Julian Modest: **La violonisto** p.11
Paulo Sérgio Viana: **Du ringoj** p.13
Erika Godó: **Pensoj ĉe la lagobordo** p.15
Maria Nazaré Laroca: **Ĉiutaga poezio** p.16
Laure Patas d'Illiers: **Issa malperis!** p.17
Josip Pleadin: **Ekzistas ie kaŝita loko** p.21
Josip Pleadin: **Ho, kajto, mia kajto** p.22
Manel Sales: **Ĉe la marbordo** p.23
Manel Sales: **Kiel flor' sub ombro** p.24
Elena Popova: **Someraj sekretoj** p.25
Elena Popova: **La knabino kaj la amiko** p.26
Elena Popova: **Lumturo de espero** p.28
Erika Godó: **Novaj honoraj membroj de UEA elektitaj en Brno** p.29
Elena Popova: **Kion Vejdo faris kaj faras por nia Esperantujo** p.29
Lenke Szász: **Ferio en Grekio** p.31
Lenke Szász: **En krepusko** p.33
Rita Mkrtĉjan: **Somero estas eta vivo** p.34
Rita Mkrtĉjan: **Aŭgusto** p.35
Maksim Boĉkarev: **Jaga (5)** (Trad. Sergei Isakov) p.36
Li Weilun: **Varmego** p.42
Gu Cheng: **Maltrafita** (Trad. Ardo) p.43
Gu Cheng: **Strateto** (Trad. Ardo) p.44
Yi Qiao: **Somera nokto** p.45
Lu You: **Du Poemoj pri Ĝardeno Shen** (Trad. Yi Qiao) p.46
Lilia Nikolova: **Juveloj** p.47
Lilia Nikolova: **La Libera Amo** p.47
Lilaketo: **Animo-atendo** p.48
Lilaketo: **Somere...** p.49
Lilaketo: **Somera kanto** p.50
Jozefo Dudas'a: **Somera memoro** p.51
Sonja Lang: **Je la haŭta aliigo de la flava trezora termambesto** p.54
Attila Salga: **Bombardo kaj tortobako** p.55
Yin Jiaxin: **Embaraso** p.57
Yin Jiaxin: **Ario de juneco** p.59
Lao She: **Sopire al Beiping** (Trad. Laoyuan) p.63

ISSN 2819-4861

©Monthly Published by John Huang & Erika Godo in Mississauga, Ontario, Canada

Pearl S. Buck: **Vento orienta – Vento okcidenta (4)** (Trad. Detlef Karthaus) p.66
 John Huang: **Super la Ĉielo** p.71
 John Huang: **Belulino / Sub la buntaj ombrejoj** p.72
 John Huang: **Al Helga / Pentristino** p.73
 Helga Plötner: **Al John** p.74
 Helga Plötner: **Letero el Helga** p.75
 Jasuo Hori: **Kara Helga** p.75
 Erika Godó: **Ni Volas pacon** p.76
 Helga Plötner: **Kredo** p.77
 Carlos Devizia: **La Nigra Damo** p.78
 Huby Romero: **Alfama** p.79
 Ranja Zafinifotsy: **La Sorto de Aina** p.80
 Ranja Zafinifotsy / Erika Godo: **Interjuvo kun Ranja Zafinifotsy** p.83
 Semio: **La morto de Princino** p.86
 Chen Tao: **Sindoni por la patrio** (Trad. Lu Jixin) p.88
 Arbsemo: **Kūafu Persekutas la Sunon** p.89
 Zhuang Qixiong: **Ĉina Saĝo** p.90
 Joel Muhire: **Tri kantotekstoj de Joel Muhire (Goma- D R Kongo)** p.91
 Kelly Muteke: **La sono de la koro** p.94
 Etienne Luheka: **Leviĝu kaj Laboru** p.95
 Etienne Luheka: **Kien mi iras?** p.96
 Ken Muteke: **Esperanto kulturo** p.97
 Batalanto: **Fajrero Daŭra, Vojo Komuna** p.98
 Batalanto: **Aŭtuna Cikadkanto** p.100
 Fortego: **Imitado** p.101
 Eternfortik: **Mia Emerita Vivo** p.104
 Viktorio: **Vidaĵo** p.108
 Timur Arslan: **La Homo en la Muro** p.109
 John Huang: **Karikaturo** p.112
 Rita Mkrtĉjan: **Konkurso de la jaro** p.113
 Erika Godo: **La gajnintoj de la 4-a Interkultura Novelo-Konkurso** p.114
 Erika Godo: **Rezulto de la 76aj Belartaj Konkursoj de UEA** p.116
 Kroata Esperanto Unigo: **9-a tradukkonkurso „Lucija Borĉić“** p.118
 Helga Plötner: **Esperanto por mi** p.119

Kovril foto: Aglo (foto de John Huang, poemo je p.71)

La bildoj kiuj akompanas la tekstojn en ĉi tiu numero, estis inspiritaj kaj prilaboritaj de John Huang pere de AI.

ISSN 2819-4861

©Monthly Published by John Huang & Erika Godo in Mississauga, Ontario, Canada

Vortoj al la legantoj



Erika Godo



John Huang

Karaj legantoj!

Kun ĝojo ni prezentas al vi la trian numeron de *Literatura Vivo*. Ĉi tiu revuo naskiĝis el la deziro krei komunajn spacon kaj voĉon por ĉiuj, kiuj amas literaturon, sendepende de lando, kulturo aŭ aĝo. En niaj paĝoj vi ne nur renkontos novajn poemojn, novelojn kaj eseojn, sed ankaŭ malkovros tradukojn el diversaj lingvoj, intervjuojn kun verkistoj, kaj retrospektivojn pri klasikaj aŭtoroj.

Laŭlonge de la unuaj numeroj, ni konstatis, ke *Literatura Vivo* fariĝas ponto: inter kontinentoj, inter generacioj, inter la sonĝoj de kreantoj kaj la sentoj de legantoj. Ni dankas ĉiujn kontribuantojn, kiuj sendis siajn verkaĵojn el Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko, ĉar per tio nia revuo riĉiĝas je diversaj voĉoj kaj perspektivoj.

Ni deziras, ke ĉi tiu revuo ne estu nur pasiva legado, sed ankaŭ aktiva dialogo. Viajn rimarkojn, komentojn kaj proponojn ni atendas kun sincera intereso. Ĉiu vorto de vi helpas nin plibonigi la kvaliton, plivastigi la enhavon kaj fari nian komunan vojaĝon ankoraŭ pli fruktodona.

Literatura Vivo estas ankaŭ via hejmo. Ni kuraĝigas ĉiujn poetojn, prozistojn, tradukistojn kaj legantojn partopreni, sendante verkojn aŭ reagojn. Kune ni kreu spacon, kie la lingvo internacia montras sian plej profundan forton: la kapablon ligi homojn per belarto kaj penso.

Ni kore invitas vin ĝui la paĝojn de ĉi tiu numero, sperti la riĉecon de la internacia literaturo, kaj kune kun ni konstrui kulturen ĝardenon, kiu floras en la lingvo Esperanto.

Kun amikecaj salutoj,

Handwritten signature of Erika Godo in black ink.

Erika Godo

Handwritten signature of John Huang in black ink.

John Huang

Retejo: www.literaturavivo.com

Retpoŝta adreso: info@literaturavivo.com

Erika Godo: goderika@gmail.com


John Huang: 4882588@outlook.com



LITERATURA KONKURSO KÁLMÁN KALOCSAY


Erika Godo

Kun granda ĝojo ni anoncas la unuan Literaturan Konkurson Kálmán Kalocsay!

 Temaj: |

Partoprenantoj estas invitataj sendi siajn verkojn en la sekvaj kategorioj:

- ❖ poemo
- ❖ prozo
- ❖ traduko

 Terminaj datoj:

Akcepto de verkoj: Ĝis 31-a de Marto 2026

Anoncado de gajnintoj: La 1-a de Augusto 2026

 Reguloj:

La verkoj devas esti originalaj kaj ne publikigitaj antaŭe.

Limigo de longo:


Poemo: maksimuma longo ne fiksita

Prozo: maksimumaj 3 paĝoj

Traduko: maksimuma longo ne fiksita

Partoprenantoj povas sendi maksimume du verkojn en ĉiu kategorio!

La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj duaj jaroj!

 Juĝado:

La juĝkomisiono konsistos el spertaj verkistoj. La kriterioj por juĝo inkluzivas:

- Kreaĵo
- Stilo
- Enhavo


 Premioj:

- Unua premio en ĉiu kategorio: Libro-premio kaj atestilo
- Dua premio en ĉiu kategorio: atestilo
- Tria premio en ĉiu kategorio: atestilo

Ĉiuj premiitaj verkoj estos publikigitaj en Literatura Vivo.

La gajnintoj de la unua loko estos intervjuitaj!

 Sendu viajn verkojn al kalocsayliteraturakurso@gmail.com retpoŝtadreso.

 Pliaj Informoj

Por pli da informoj, vizitu nian retejon <https://www.literaturavivo.com>

Fabelo pri la tria frato

Laimundas Abromas



Apud la vilaĝa rando,
En kabano ne tre granda
Vivis bele, sen defi'
Vilaĝana famili'.
Krome vivis filoj kune
Aĝaj du kaj tria juna.
L' vivo pasis en konkord'
Ĝis alvenis la malord'.
Panjo poton grase ŝmiris,
Pizokaĉon ŝi kuiris
Kaj ĉe forno sen kuraĝ'
Ŝi lamentis pri damaĝ':
„Estis bonaj pizoj niaj,
Ili iĝis jam ne niaj“.
Ŝi rimarkis en pizkamp'
les spurojn de la gamb'
„Kiam nokto nigron metas,
Pizokampon iu tretas.
Ĉu sovaĝa animal'?
Homo, bruto el la stal'?“

La plej juna fil' ekmiras
Al gepatroj laŭte diras:
„For parolojn, nokton ĉi
Gardi pizojn iros mi!“
Tuj ekridas fratoj aĝaj:
„Kion diras la malsaĝa
Frato, hejmon gardu li,
Ĉar sen li ruinos ĝi.“
Kiam la vespero venis
La plej aĝa frat' komprenis,
Por gardado sen admon'
Bezonatas la baston'.
Li ŝteliston pizan kaptos,
Per bastono dorson „baptos“,
Ŝnuron prenas – ligos lin
Ĉion faros laŭ destin'.

Venas li al kampolimo,
 Pizojn gardos li sen timo.
 Vento blovas, ridas lun'
 Ne forlasos lin fortun'.
 Tempo pasas, nokto zonas,
 Jen tintilo tuj eksonas.
 „Kiu venas tien ĉi?“-
 buŝmalferme gvatas li.
 Spite kampon venas ŝvita
 nigra porko trogjungita.
 Kaj en trogo – feinaĉ'
 vergas porkon kun la plaĉ'.
 Kantas ŝi : „Hej, kaŝe iri
 venas mi por pizojn ŝiri.
 Pizoguŝojn plukos nun
 kaj satmanĝos mi sen pun“ .
 Kiam kampon alrapidis
 tuj gardiston ŝi ekvidis.
 „Kion faras vi ĉe kamp'?“
 -ŝi demandas.-„Ĉu vi –tramp'?“
 „Vidu, gardas mi la pizojn,
 iu ŝtelas por provizo“, -
 kun malĝojo kaj sen plaĉ'
 diras li al feinaĉ'.-
 „La ŝteliston mi bastonos,
 forte ŝnuros, ne pardonos“.
 Kaj feino en moment'
 jen ,bastonon sen atend'
 kaptas, tiras, dum frat' gapas
 dorson, flankojn liajn frapas.
 Tordas sin plej aĝa frat'
 pro ektimo kaj pro bat'.
 Kiam iĝis senbezona,
 ŝi forĵetis la bastonon.
 Kaj sur kampo en plenbrak'
 ŝiris pizojn ŝi sen krak'.
 Kiam tion ŝi aranĝis,
 porkon nutris,mem satmanĝis.
 Poste kantis: „Hej, kaŝiros
 ĉiujn pizojn mi forŝiros...“



Frumatene post gardad'
 hejmen venis aĝa frat'.
 Kaj volonte, kaj ne hontis ,
 kiel gardis li rakontis.

Kiel sidis ĉe kampolim',
gardis pisojn li sen tim'.
Tutan nokton li deĵoris,
sed ŝtelisto ne furoris.
Ĉirkaŭiris kampon li

kelkajn fojojn, eble tri.
Sekvan nokton frato dua
prenas vipon kaj senbrue
kaj kuraĝe gamb' post gamb'
li foriras al la kamp'.
Luno ridas, blovas vento
dua frato kun atento
staras ĉe la kampofin',
gardas kampon, gvatas ĝin.
Tuj aŭdiĝis son' tintila,
kune kanto ĝoj-jubila .
Trogjungite per porkin'
venis kampon tuj fein'.
Kaptas vipon kaj senvorte
vipas fraton ŝi tre forte.
Gapas frato, tordas sin
ĝis forkuras en la fin' .

Jen la plia nokto venis
tria frato sin ne ĝenis.
Kun la violon' en man'
gardostar' ne iĝos van'.
Vento blovas, luno ridas
al la kamp' fein' rapidas.
Ŝi rimarkas, ke en gvat'
sidas la plej juna frat'.
„Kion faras vi ĉe kampo?“
-ŝi demandas, - „Ĉu vi – trampo?“
„Violonas mi , fein',
ĉu mirigas tio vin?“
Ŝi oreton klinis, gratis,
violonmuzikon ŝatis.
„Ne avaru, lasu vi,
ankaŭ ludi volas mi“.
Tria frato kun obstino
diras ruze al feino :
„Viaj fingroj dikas tre,
vi ne povas ludi! Ne.
En river' vi tolojn lavas,
viaj fingroj ŝvele mavas.

Tiu ĉi muzik' belsonos,
 se mincfingrojn vi disponos".
 Jen fein' ekmovas sin
 kaj parolas en la fin'.
 „Ĉu vi povas? Sin instigu,
 miajn fingrojn maldikigu".
 „Mi konsentas", - kaj sen flat'
 diras la plej juna frat'. -
 „Tamen trovu vi kurb-arbon
 kaj hakilon havu hardan".
 Dum fein' en zorga stat'
 violonas tria frat'.

Blovas vento, luno ridas
 al la kamp' fein' rapidas.
 „Jen hakilo!", - kun defi'
 voĉas al gardanto ŝi.
 - „Iru ni! Laŭ konsidero
 kurbas arboj ĉe rivero.“
 Per hakil' eksvingas frat',
 frapas arbon sen kompat'.
 Hakilklingo enarbiĝas,
 kurba fendo larĝa iĝas...
 „Ŝovu fingrojn vi en fendon" -
 -diras frato, - „Ne atendu!".
 Kaj hakilon li en hast'
 elfendigas sen prokrast'.
 Arbo fein'fingrojn stringas.
 Krias ŝi, per kapo svingas.
 Kaj apude tria frat'
 kantas ĝoje sen kompat':
 „Pizoj miaj, pizoj miaj,
 dolĉaj pizoj ne plu viaj.
 Se ne volas semi vi,
 do, suferu iom pli".
 Kaj en trogo li suspiras,
 vergas porkon, hejmen iras.



Luno brilas, blovas vent'
 eĥas kanto en silent'.
 Kantas li: - „Hej, kaŝe iri
 venas mi por pizojn ŝiri.
 Pizojn ŝiros kun pasi'
 porkon nutros, manĝos mi".
 Fratoj kanton aŭdas, svenas,
 pensas, ke fein' alvenas.
 Tra fenestro, tra la pord'
 ili kuras en malord'.
 Tion ĉi gepatroj vidas,
 kun plej juna filo ridas.
 Kaj nur post diurnoj tri
 fratoj venis hejmen ĉi.
 Pizokaĉo kuirita
 kaj fabelo jam finita.

La violonisto

Julian Modest



Aŭtuno. Friska ora aŭtuno. Antaŭ la fenestro la folioj de la olda kaŝtano falas kiel larmoj. En la ĉambro estas silento. Slava staras ĉe la fenestro kaj nombras la falantajn foliojn de la kaŝtano. Nur antaŭ kelkaj tagoj tiuj ĉi folioj estis oraj, ruĝaj, brunaj. Nun la nudaj nigraj arbobranĉoj similas al brakoj, etenditaj pete al la ĉielo. La arbo estas trista kaj soleca kiel ŝi. Jam multajn jarojn Slava loĝas sole. La homoj, kiujn ŝi amis forpasis unu post la alia. Ili, kiel la arbofolioj, forflugis ien, pelitaj de frosta vento. Restis nur Elka, la filino de Slava, sed ŝi loĝas malproksime, trans maroj kaj oceanoj.

De kelkaj tagoj tamen ĉio ŝanĝiĝis. Elka revenis. Ŝi kvazaŭ alflugis de malproksime kiel aŭtuna folio. Hodiaŭ Slava atendas ŝin veni en la domon.

Jen, subite ekkrakas ŝlosilo kaj en la ĉambron eniras Elka. Kiom bela ŝi estas. Ne gravas, ke ŝia filo jam plenaĝas. Elka ridetas kiel ĉiam, ŝiaj nigro-olivaj okuloj brilas kaj ŝia hararo ankoraŭ estas densa, malgraŭ ke ie-tie videblas blankaj haroj kiel arĝentaj fadenoj.

Elka diras:

-Panjo, mi aĉetis biletojn por simfonia koncerto. Mi scias, ke vi tre ŝatas la muzikon, sed delonge vi ne estis ĉe koncerto.

-Vi scias, ke mi malfacile paŝas, miaj piedoj doloras, kiel mi iros al la koncerto? – rimarkas Slava.

-Ne zorgu pri tio. Ni iros per taksio. Mi estos ĉe vi. Mi deziras donaci al vi tiun ĉi etan ĝojon.

-Bone – diras Slava kaj feliĉo lumigas ŝian vizaĝon.

Simfonia koncerto. Post tiom da jaroj ŝi spektos kaj aŭskultos simfonian koncerton. La ĝojo levas Slavan supren, lulas ŝin kiel mara ondo. Jes, ŝi denove aŭskultos la ŝatatan muzikon kaj denove dronos en mirinda harmonio, en la raveco de la simfonioj.

Slava sentas profundan plezuron, kiu varmigas ŝian koron. Ŝia emocio kreskas. Kion ŝi surhavu, kian robon, kiajn ŝuojn? Ŝiaj roboj jam delonge estas malmodaj, la ŝuoj – malnovaj, tamen, kiu rigardus ŝin. Ja, Slava estas maldika, malalta virino kun pala vizaĝo kaj kun okuloj kiel blueca nebulo.

La koncerta halo plen-plenas kaj zumas kiel abelujo. Ĉiuj atendas la komencon, sed la plej malpacienca estas Slava. Ŝi tremas, peze spiras kaj sentas varmon kvazaŭ ŝi estas en forno.

La bruo en la halo silentiĝas. Sur la scenejon venas la orkestrestro. Li iom klinas sin antaŭ la publiko, poste li turnas sin al la muzikantoj kaj la muziko ekflugas kiel suda vento. En la okuloj de Slavas aperas larmoj. La simfonioj sekvas unu post la alia.

Juna violonisto komencas ludi. La violono eligas tenerajn tonojn kiel karesan maran lirlon. Slava rigardas la violoniston kaj ŝajnas al ŝi, ke ŝi konas lin, sed de kie kaj de kiam? Ne eblas. Li estas tre juna. Kie kaj kiam Slava vidis lin? Li estas tre talenta.

Subite kvazaŭ nevidebla kurteno malfermiĝas antaŭ ŝiaj okuloj. Delonge, antaŭ jaroj, Slava estis vendistino en muzikvendejo, kiu troviĝis sur la ĉefstrato de la urbo. Multaj homoj venis en la vendejon por aĉeti muzikdiskojn, sed antaŭaĉeti diskon la aĉetantoj deziris aŭskulti ĝin.

En la vendejon ofte venis kvin-sesjara knabo. Li staris en la angulo kaj dum horo aŭskultis la muzikon de la diskaj. Foje Slava demandis lin:

-Kio estas via nomo?

-Vasko – respondis la knabo.

-Kial vi venas en la vendejon kaj ne ludas kun la infanoj?

-Mi deziras aŭskulti la muzikon – respondis li kaj klinis sian krispharan kapon.

-Bone, diru al via patrino veni ĉi tien. Mi deziras paroli kun ŝi.

Tiam Vasko alrigardis Slavan per siaj grandaj okuloj.

La sekvan tagon la patrino de Vasko venis en la vendejon.

-Sinjorino, - komencis Slava – via filo tre ŝatas muzikon. Li nepre devas okupiĝi pri muziko.

La patrino de Vasko surpriziĝis.

-Mi tute ne supozis, ke li ŝatas muzikon. Mi kaj mia edzo ne estas muzikŝatantoj. Mi estas kudristino kaj mia edzo – ŝoforo.

-Via filo nepre devas lerni muzikon – diris Slava.

Post jaroj Slava eksciis, ke Vasko jam lernas en muziklernejo. Nun li staris sur la scenejo antaŭ ŝi en la plen-plena halo kaj violonludis. Slava mallaŭte ekflustris: “Vasko, verŝajne ankaŭ mi helpis, ke vi fariĝu fama violonisto.”



Du ringoj

Li estis viro kun anguleca vizaĝo. Kiam mi vidis lin unuafoje, li estis sidanta sur ligna seĝo, rekta kaj senkomforta, kiu faris lin eĉ pli kurba. Kuprokolora senbrila haŭto, premita de interne per elstarantaj ostoj. Ŝparema pri gestoj, kiam li movis siajn brakojn, ili aspektis kiel apenaŭ artikitaj, kvazaŭ baldaŭ forsaltontaj. La okuloj rigardadis, etaj, palpebrumantaj, kaj nenion diris, nenion montris pri tiu nepenetrebla menso; ili nur rigardadis, rekte kaj fikse. Tamen li rigardis min, kiam mi ekstaris antaŭ li kaj riskis:

– Bonan tagon!

Li grumblis ion. Nur. Kaj plu rigardis. Rigardis kvazaŭ gvate.

– Kion signifas tiuj du ringoj?

Efektive, ligitaj al malmultekosta kolĉeno, ĉirkaŭ la kolo, la viro havis du rustiĝintajn ringojn. Tio vekis mian atenton. Poste mi rigardis liajn manojn, kiuj estis krudaj, kun mallongaj, dikaj fingroj, plenaj de nodoj. Oni povis facile vidi, ke tiuj ringoj ne povus kuŝi ĉirkaŭ iu ajn el tiuj fingroj; ili estis etaj, kiel fingroringoj de infanoj. Ringoj por maldikaj fingroj.


– Neniu demandas, homoj ne emas ekscii. Vi demandis, mi klarigos. Kiel vi vidas, ili estas etaj ringoj, por delikataj fingroj. Neniu persono surportas parajn ringojn ligitajn al malnova ĉeno. Oni emas demandi. Mi rakontos, se vi paciencas. La unua ringo longe restis sur la kvara fingro de Malva. Nigra Malva, tre nigra. Mi ekkonis Malvan en fiŝoiro, ŝi havis tranĉilon en la mano, kaj mi vidis, ke ŝi frapetas la ringon sur la tenilon de la tranĉilo. Ŝi tranĉadis skvamojn kaj marviandon tre lerte. Al la fiŝoj plaĉis, kiam Malva tranĉis ilin. Oni povis vidi je ŝia mieno esprimon de ĝuo, kiam ŝi dispecigis tiujn brilantajn, glatajn estulojn. Tiu klingo, en la internaĵo de homo, dancus feste. Makabran dancon. Malva estis ĵaluzema, vidva, kaj oni diris en la foiro, ke Malva tranĉis sian viron pro ĵaluzo.

La korpo neniam aperis, oni diris, ke ĝi fariĝis nutraĵo de fiŝoj, rande de la kajo. Kaj ke pro granda ĵaluzo, Malva plu tranĉadis lian karnon pere de la refarita karno de fiŝoj. Ni decidis kunvivi geedze, kaj Malva neniam flankenlasis sian misteron, eĉ okaze de geedza intimeco. Mi neniam diris al ŝi, ke mi amas ŝin, ankaŭ ne ŝi al mi. Mi rigardis ŝin per ĉi tiuj miaj du etaj okuloj malfidemaj; ŝi ridetis, ridetadis, kaj mi neniam sciis, kion esprimas tiu rideto. Pasis tempo, unu pluvan tagon, nuboplanan kaj malvarman, ŝi vokis min kaj subite diris:

“Kiam mi foriros, vi prenu ĉi tiun ringon kaj pendigu ĝin sur vin per kolĉeno. Por via bono.”

Ĉu tio estis peto, ĉu minaco, kio? Estus vane peti klarigon, sed la forton de ŝia determino mi konstatis en la sekva tago: Malva mortinta sur la lito, kvazaŭ dormanta, preskaŭ ridetanta. Mi rigardis, mi forprenis la ringon de sur la kvara fingro, etan ringon, sensignifan, kaj mi pendigis ĝin per ĉi tiu kolĉeno Ĉi tie ĝi restadas. Mi enterigis Malvan en nuboplana vesperiĝo, la taglumo malaperis pli frue ol kutime.

Kaj la ringo ĉi tie kuŝas, sur ĉi tiu brusto malmola kaj seka, ĝis mia lasta tago en la mondo. Tamen mi ekkonis Dolores okaze de promenoj, kiujn mi faris ĉirkaŭ la foirejo. Ŝi laboris en vendejo de sorĉaĵoj. Mi venis por rigardi la statuojn, la negrojn kun blanka hararo, la sanktulinojn blue vestitan, iujn koboldojn, kaj iujn miraklajn herbojn. Mi suferis pro iuj haŭtulceroj, Dolores proponis kuracadon. Ŝi receptis banojn, kiuj efikis eminente, mi tute puriĝis.



Paulo Sérgio Viana

Komence, Dolores rigardis min iom strange, kvazaŭ ŝi esplorus ion. Ŝi faris ŝajne naivajn demandojn, mi rimarkis, ke ŝi observas min. Ĝis ŝi venis al la esenca punkto, same kiel okazis al vi.

“Kio estas tiu ringo, sur tiu kolĉeno?”

Mi ĉion rakontis; laŭ ŝia mieno, ŝi komprenis. Sed silentis. Mi atendis ian komenton, sed ĝi ne sonis. Nur rideto. Tre ĉarma, cetere. Tio devigis min reveni al la vendejo de sorĉaĵoj. De la oblikva interparolo al amindumo sufiĉis unu sola paŝo. Alia paŝo estis kundividi la malriĉan domon. Sed Dolores faris unu solan postulon, kiu sonis per ŝia milda, dolĉa voĉo, kaj eĉ ne ŝajnis postulo:

“La ringon oni devas prizorgi. Via forpasinta edzino certe estis tre ĵaluzema, ĉu? Tia virino, kiu ŝatas tranĉilojn?”

Mi konfirmis, mirante pri ŝia scio. Tiam ŝi finklarigis:

“Fingroringo en tia maniero, sur rustiĝinta kolĉeno, malhelpas, ke oni denove edziĝu. Kaj se oni forĵetas ĝin, des pli malbone. Unu fojon uzita, ĝi lasas la malicon de ĵaluzo algluita. Ekzistas nur unu solvo, se oni emas denove edziĝi: oni parigu alian ringon samspecan, ambaŭ kune pendu, por ĉiam, tiel ke unu puŝu la alian. Ringo de nova amo. Tie ĵaluzo trovas aŭdacon, kaj unu skrapigas kontraŭ la alia, kaj ambaŭ eluziĝas. Se vi volas, mi donos al vi unu mian ringon. Ŝi ridetis tiel ĉarme, ke mi akceptis, mi kredis. Nenion mi perdus, nenion.



Kaj ni geedziĝis kiel malriĉuloj, laŭ intenco kaj karesemo. Dum multaj jaroj, Dolores ĉiam dolĉis, ĉiam ridetis. Mi rajtas diri, ke mi estis feliĉa, se ĉi tiu vorto ne estas troa. Kiam ŝi mortis, mi tre malĝojiĝis, kaj mi ne plu trovis similan rideton, nek voĉon, nek saĝecon kompareblan. Ĝis mia lasta tago mi restos ĉi tie, rigardanta la mondon per miaj etaj okuloj kaj kun ŝi, eĉ se nevidebla.

Jen tio estas mia historio, kaj la historio pri ĉi tiuj du ringoj. Al mi plaĉis via pacienco, sinjoro.

Mi atendis iom pli, eble venos unu plia vorto, eble konkludo. Nenio. La viro rigardis ĉirkaŭ si, svage.

Pensoj ĉe la lagobordo


La lumo ludas sur la akvobrejlo,
kviete vidante kiel bela ludilo.
La vento flustras, la folioj tremas,
la tempo nun malrapide emas.

Birdo flugante malproksimen,
malkaŝante sian ekproksimen.
Ondoj alportas bonajn momentojn
ili forlavas malbonajn sentojn.

En la moleo, akvo tuŝas min,
kiel unu tago, mi kisas vin.
La silento de la lagobordo vokas,
la animo finfine en paco alvokas.



Erika Godó



Ĉiutaga poezio

Maria Nazaré Laroca



Flugilhavaj steloj poemas
kaj venas sur mian ŝultron
por ekparoli siatempe.
Aliaj versoj min vizitas,
ekaperas ĉe la rondo,
svingante flagojn vice
kontraŭ mizerojn de l' mondo.
Sed ĉe mi rifuĝej' neblas,
do tuj ilin mi disdonas
al l' avidaj amaskomunikiloj.
Tiel pri dolor' mi ne kantas:
birdbabilon mi preferas,
kaj florodoron flugantan en vento.

en portugalla lingvo

Poesia cotidiana

Poemas são estrelas aladas
que vêm pousar no meu ombro
à espera da vez de desfiar a voz.
Mas também me visitam versos
em fila, a desfraldar bandeiras
que gritam as misérias do mundo.
A esses não dou guarida: indico
o caminho guloso da mídia,
e, assim, decantar a dor não tento:
prefiro conversa de passarinho
e cheiro de flor que viaja no vento.



Issa malperis!

Laure Patas d'Illiers



- Sinjoro policisto, estas terure! Issa malaperis! Certe banditoj forkaptis ŝin! Vi rapidege agu, enketu, retrovu ŝin!

Filip Tekane, la policisto, rigardas la maljunan virinon. Pro ŝia impona sinteno, bela bunta vesto kaj ordona tono, li konscias ke ŝi riĉas. Lia labordistrikto kuŝas en Nova Romo, urbeto antaŭ mallonge konstruita proksime de la ĉefurbo Maseruo, por loĝi gravulojn kaj riĉulojn. Li prenas notkajeron kaj petas detalojn.

Sinjinoro Adokomosebi loĝas en vilao kun ĝardeno ĉirkaŭita de barilo. Dum la nokto, Issa ŝatas resti en la ĝardeno. Probable ŝi trovis truon en la barilo kaj elŝoviĝis eksteren. Surstrate ŝi senprotekte promenis. Certe ŝi renkontis stratrabistojn, ĉar ŝi ne revenis ĉi-matene.

- Ho, mi petas, retrovu mian karan Issa! Ŝi estas nur trijaraĝa, ŝi tiel belas, scias nenion pri la malico de la mondo...

- Nu, sinjinoro, ni faros kion ni povos. Ĉu vi havas foton de Issa?

Sinjinoro Adokomosebi ja havas. Sur la foto, malbonhumure paŭtas... persa kato kun longaj bluecaj haroj.

- Ho! Mmh. Nu, sinjinoro, mi ĉion zorge notis. Se vi ricevas peton de elaĉetopago, nepre informu nin.

Kiam la plendinto estas for, Filip ŝultrumas. Li ne volis malesperigi ŝin, sed li opinias ke estas neniu ŝanco retrovi la aventureman katinon. En la bazaroj de Maseruo, vendistoj ofertas viandon de kato, rostita sur stangetoj aŭ en raguo. Peltkolumoj el kata felo altvaloras kaj bone vendiĝas, ĉar en Lesoto someroj malvarmas, agrablas surhavi varmigan vestaĵon sur kolo kaj ŝultroj. Kompreneble, li intencas fari neniun enketon.

Fakte, lia laboro kiel policisto en Nova Romo estas kvazaŭ sinekuro. Maloftas krimoj. Ĉiu kvartalo estas ĉirkaŭita de alta barilo, kun kameraoj kaj pafiloj, regataj de artefarita intelekto ĉiam atenta. Neniu domŝtelo eblas.

- Sinjoro policisto, estas terure! Hasin malaperis! Ni ne scias kie li estas, kiel li fartas...
Helpu nin!

Filip levas la rigardon al la alvenintoj. Viro kaj virino, pli malpli tridekjaraĝaj. Iliaj okuloj plenas je larmoj.

Li unue petas foton. Ĉi-foje temas ja pri homa infano. Ĉarma knabeto ridetas, ĉekore tenante pluŝan ĝirafon.

Filip notas la informojn. La paro estas sinjoro kaj sinjorino Mejaele-Mosehle.

- Hasin aĝas tri jarojn. Ĉiumatene, li iras lernejen. Aŭte, kompreneble.

Kompreneble. Neniu riĉulo en Nova Romo surstrate piedirus, tro danĝeras. Aroj de banditoj vivtenas sin, inter diversaj eksterleĝaj agadoj, per forkaptado kaj elaĉetomono.

- Kiu stiris?

- Neniu, estas unu el la memstirantaj aŭtoj. Inteligenta auto, lasta modelo Birda Kanto 75.8. Blendita kun kuglorezistaj vitroj.

Filip ja konas tiun modelon. "La plej inteligenta aŭto en la mondo" asertas la reklamo. Ankaŭ la plej multekosta.

- Ĉiutage la veturilo kondukas mian edzon al laborejo, revenas, kondukas Hacin al la lernejo, revenas kaj dum la tago mi uzas ĝin por aĉetumi. Sed hodiaŭ ĝi ne revenis. Mi telefonis al la lernejo, ili ne vidis Hasin. La veturilo havas ĉiaman konekton kaj lokilon, sed la signalo ĉesis sendiĝi mallonge post la forveturo.

- Eble ĝi survoje paneis.

Filip ne mencias akcidenton por ne krei panikon, tamen akcidento ŝajnas al li pli probabla ol paneo. Li kontrolas en la datumbazoj. Hodiaŭ neniu infaneto estis alportita al malsanulejo post akcidento en lia distrikto, neniu tia veturilo estis rimarkita surstrate. Filip ne scias kion diri al la gepatroj. Lia koro premiĝas. Restas nur unu sola espero.

- Nu, ni esperu ke la kaptintoj bone prizorgu vian filon, por ricevi elaĉetomonon.

Vespere, Filip ricevas viziton de sia kuzo Mafeteng, kiu vivas en la ĉefurbo. Li estis ŝoforo de riĉa familio, sed li nun senlaboras.

- Pro tiuj inteligentaj aŭtoj mi nun ne plu havas laboron. Multaj miaj amikoj, kiuj estis gardistoj en la riĉa kvartalo, estis maldungitaj, ĉar la klientoj instalas artefaritan intelekton kiel gardiston. Pli kaj pli da junuloj senlaboras, akriĝas kaj aliĝas al banditaro. Aĉaj riĉuloj semas malesperon, ili ricevu malfeliĉon!

Filip trovas nenion por respondi.

Neniu peto de elaĉetomono alvenas tiun tagon.

Nek la sekvantan.

Filip ricevas telefonvokon. La serĉita veturilo estis trovita! Funde de rivero. Tie ŝoseo laŭiras la riveron, probable la aŭto tro rapidis, joris maldekstren kaj falis akven. Estis neniu ene. Oni serĉis la riverfundon por la korpo de la infano. Vane. Ĝi certe forfloris alvalen.



Dum Filip pripensas kiel transdoni la malĝojan informon al la gesinjoroj Mejaele-Mosehle, la telefono denove sonoras.

- Hasin revenis!

- Ho! Nekredeble! Kiel?

- En kamiono. Ĉar la kranakvo estas malsufiĉe pura por ni, ĉiusemajne kesto da akvoboteloj estas liverata ĉe ni per kamiono de mineralakvo-firmao. Nia doma roboto elŝarĝas la keston kaj metas ĝin en la kuirejo. Ĉi-matene, mi eniris la kuirejon kaj vidis ne unu, sed du kestojn. En la dua kuŝis Hasin, buliĝinte kiel kato, trankvile dormante. Estas miraklo!

La knabeto ŝajne ne suferis pro sia aventuro. La plenkreskuloj demandas al Hasin kio okazis, sed malfacilas havigi klaran rakonton el liaj babileroj. Filip pli malpli komprenas ke lia veturilo estis ĉasita de bandaĉo en pluraj aŭtoj. La inteligenta veturilo rapidis laŭlonge la riverbordo. Tiam per sia laŭtilo la aŭto diris al Hasin "Ni saltos akven, en la akvo vi eliru tra mia fenestro kaj fornaĝu!" Hasin scipovas naĝi, ĉar la patrino veturas kun li ĉiusemajne al naĝejo, sed kutime li naĝas en bankostumo kun brakflosiloj. Hasin esperis ke Nini, lia pluŝa ĝirafino, sekvu lin, sed ĝi preferis resti en la aŭto. En la akvo, la aŭto elspiris grandajn bobelojn. Kiam Hasin estis flosanta, rigardante la bobelojn, barĝo

alproksimiĝis. Per grua brako, ĝi prenis la knabon kaj portis lin sur sian ferdekon. La knabo ne scias kio okazis poste, li plej ofte dormis. Ŝajnas ke li estis transportata de veturilo al veturilo.

Lia plej klara memoro temas pri kamiono liveranta glaciaĵojn, kie li manĝis kiom li volis.

Konklude, pensas Filip, la familia veturilo fordonis sin por savi la infanon.

Tio pensigas lin pri iama diskuto kun kuzo Mafeteng, tiam ankoraŭ ŝoforo, ĝuste pri kion profesia ŝoforo faru, se banditoj atakus lian veturilon. Mafeteng tute klare respondis.

- Mi haltos la veturilon kaj lasos la banditojn forpreni kion ili volas. Se mi rezistus, ili senhezite mortigus min. Mi ne risku mian vivon por klientoj. Des pli ke la klientoj mem ne rezistos. Ili ne riskas sian vivon. Nur ilian monon volas banditoj.

Nu, plu pensas Filip, la diversaj veturiloj, pli malpli inteligentaj, klopodis inter si por savi, kaŝi kaj revenigi la knabeton. Tio meritas respekton. Finfine, estas bone, ke ekzistas tiaj pensantaj maŝinoj.

- Sinjoro policisto, Musu malaperis! Banditoj forprenis ŝin. Ni ne kapablos vivi sen nia karega Musu!

Sinjoro kaj sinjorino Lekooanabetho iom similas al la gesinjoroj Mejaele-Mosehle, sed ili estas multe pli maljunaj. En iliaj faltoplenaj vizaĝoj, la okuloj malĝojas, la buŝoj grimacas pro ĉagreno.

- Kiom aĝas via Musu?

- Ho, tri jarojn, mi kredas, ĉu ne, karulo?

- Jes ja, de tri jaroj Musu estas en nia familio. Konsciu, dum tiu tempo ni profunde korligiĝis. Ŝia personeco estas tiel ĉarma!

Filip vespiras. Denove forkaptita besto. Probable hundeto. Li mishumore antaŭvidas pekinan hundon, kun eta plata muzelo kaj satena rubando ĉirkaŭ ĝia kolo.

- Sciu, sinjoro policisto, Musu estas ege komplezema, ŝi ĉiam serĉas kiel plezurigi nin. Ĉiutage ŝi proponas al ni promenadon en arbaro.

- Ho jes, kaj ŝi ankaŭ prizorgas nian komforton. Komprenu, pro sanaj problemoj, ni malfacile paŝas. Tial Musu promenas nin.

Filip kuntiras la brovojn.

- Mi ne bone komprenas. Kiu estas via Musu?

- Nia inteligenta aŭto. Modelo Birda Kanto 68.4. Ŝi estas ege kara, ege valora al niaj koroj.

- Neniam ŝi dormis ekster nia klimatizita remizo. Espereble la forkaptintoj bone traktos ŝin. Ŝi estas tiel delikata!

Ekzistas ie kaŝita loko

Le en fundo de mia koro, ekzistas eta kaŝita loko
por renkontoj, revoj kaj fantazio tute realkolora,
por arto, sopiro, mistiko kaj interkultura ŝoko,
en kiu vi belas kiel greka statuoj el ŝtono marmora.



Josip Pleadin

Via togo el blanka silko, viaj laktecaj mamoj sub ĝi,
viaj gamboj longaj, kaj la statur' cervine eleganta,
viaj ŝultroj molaj kaj via elasta malvasta tali',
al mia kaŝloko venas per paŝo malpeza kaj lanta.

Mi tie avide trinkas el via puto, el lipoj kaj kortrezor'
kvazaŭ veninta el am-Saharo, sen-ina kaj seka dezert'.
Dum sage mian koron celas la di' de amo, la dio Amor',
vi vartas min per inspir' edifa kaj dolĉe rava spert'.

Kaj bridas vi rapidon mian, min metas al honoraltar'
vi portas min al stelaj altoj, kaj gvidas tra ĝarden'
en kiu audiĝas tintiloj kaj sono tranĉa de fanfar'
dum min okupas ĝuosent', dum min okupas dolĉa sven'.



Ho, kajto, mia kajto...

Ho, kien vi flugas kajto, mia povra kajto,
al kiu blanka nuboj, al kiu mistera cel'?
Kie liber' senŝnura, senbrida flugorajto
por via valsbalanco en puŝa ventoza pel'?
Per forto magia se kondukas vin feino,
per navigo sekura, sen truda molestbalast',
se delikate blanka kaj aminda gufino
atendas vin ĉielalte – pro kio via hast'?
Jam ŝnuro eluziĝis, ne tenas vin solide.
Balance virtuozas vi en venta bravuro.
Kiel Ikaro vi flugas senzorge, memfide,
en virga mortoflugo jen lasta aventuro.
Ho kajto, mia povra kajto, vanas kuraĝo,
se propraj flugiloj ne povas porti vin mem!
Ni haltis en frua kaj trista infanaĝo.
Sen via morto ne estus verkita ĉi poem'.



Josip Pleadin



Ĉe la marbordo

Manel Sales




Ondoj venas kaj iras,
la ĉielon klare reflektas,
la sablon brakumante
per ŝaŭmo kovriĝas.

Bruo en la silento,
maro kontraŭ bordo,
silento de la bruo,
fine subiras la suno.

Sole sur la strando,
inter tero kaj akvo,
nevidebla limo,
nur mi sentas timon.

Miaj fingroj serĉas vin,
en la limo mi ĉeestas
kun pensoj someraj
mia menso perdis vin.



Kiel flor' sub ombro

Mi sidiĝis ĉe la monda angulo,
serĉante ĉion —
kaj trovis nenion krom silento.


Tiam la Beleco silentiĝis,
kiel flor' sub ombro,
kaj la Lumo kviete forvelis.

En tiu kalma bruo,
Via flustro alvenis al mia menso,
kiel la vento tra malnova fenestro.

Vi levas min sen vortoj,
en senfina kunestado —
kie fadas mia animo.



Manel Sales



Someraj sekretoj

Elena Popova



Somero en la kamparo. Fonto, el kiu libere fluas dolĉa akvo. Atendante la Sunon, ĝi sendis inviton. Ĝi ekbrilis kaj ĝiaj soifaj radioj direktiĝis al la akvostrioj. Ili ekstremis. Gutetoj, kisitaj de la radioj, ekflugis kun ili kiel oraj nubetoj.

Kantaj akvostrioj fluas al la Tero, ĝi ĉiam soifas somere.

Knabino, kun maldikaj arĝentaj braceletoj sur sia maldekstra mano, mergas ilin en la akvo kaj rigardas kun ridetanta vizaĝo. Kiu sonoras kaj kantas?

Kanto de ora akvo. Amo de mateno ĝis sunsubiro. Luno. Arĝenta akvo kantas kaj verŝas. Ĉu steloj sin banas aŭ feinoj? Nokta mistero ..



LA KNABINO KAJ LA AMIKO

Elena Popova



La knabino sidis sur granda griznigra ŝtono ĉe la kurbiĝita, kiel lunarko bordo de la maro.

Ĝi donis al ŝi sian tutan varmecon. Ĝi dankis ŝin — ĉar ŝi elektis ĝin, la solecan, kiun neniu rigardas kun entuziasmo, krom la ondoj, kiuj senlace ĝin kisas per siaj salaj lipoj. Nun ili kisas ankaŭ kaj la nudajn piedojn de la knabino, parolas al ŝi ion silente kaj englutas ŝiajn larmojn. Egale salaj iuj el ili trankviligas ŝian animon, la aliaj — ŝian korpon. Sed ŝi ne sentas ilin, kvazaŭ la animo forlasis tiun belan korpon kaj ŝvebas ie, serĉante ion.



La homoj ĝuis la varmecon kaj la belecon kaj de tempo al tempo rigardis al la trista figuro, kvazaŭ modlitan de skulptisto.

- Ŝi estas malsana – diris iu.- Vidu kiel ŝi estas maldika, eĉ flava... Li ne vidis la sunradion, kiu ludis kun ŝia hararo kaj sekigis ŝiajn larmojn.

-Ŝi perdis ion...- diris alia.- Ŝiaj manoj vane fosas la ŝtonetojn...

La knabino ofte serĉis la sabletojn de sia perdita Espero, sed ne povis ilin trovi. Ŝi staris sur la ŝtono senmove kaj rigardis ie malproksime...

Amiko, ĉu vi estis ĉe la marbordo? Ĉu vi helpis al la knabino?

La salo de la larmoj kaj la marsalo portas forton, se oni ne rapidas viŝi ilin...La malfluso dronigas la nedaŭron, la daŭro naskiĝas el la fluso. Oni devas ĝin renkonti. La silenta plaŭdo de la ondoj lulas la malĝojon. La homo havas bezonon de lulilo, antaŭ ekiri sola...Mi estas ĉe ŝi ĉiam, nevidanta...

La knabino ekstaris kaj malrapide ekmarŝis. Ŝi estis vestita kun blanka robo, malseka pro la ondoj, kiuj ne komprenis, ke donis al ŝi kuracilon per sia trankvila tenereco.

Ŝiaj blankaj sandaloj restis postsignojn sur la malseka sablo, poste sur la varma vojo al la urbo, nigra kaj brila, kiu indiferece restas sian dorson, por ke oni ĝin premu. La knabino mallevis tristajn okulojn, serĉante postsignon de sia Espero, sed nun ne ploris. Ĉirkaŭ ŝi marŝis indiferecaj homoj, indiferecaj aŭtoj, flugis diversaj indiferecaj birdoj, ĉiuj direktitaj al siaj espero. La knabino marŝis malgaje tra tiu dezerto de indifereco. Ŝi ilin nek aŭdis, nek vidis...

Amiko, kie vi estas?

Mi marŝas sur la sama vojo. Mi scias, ke de lambastono doloras...La homaj paŝoj iĝas sendecidaj, la korpo perdas ekvilibron, ĉar oni atendas helpon...Kiam oni marŝas sola la vundoj pli rapide saniĝas.

Sed la etendita mano estas flugilo...

Antaŭe la homoj devas eklerni iri, kiel dum la malproksima infaneco, malgraŭ la falo kaj levo, la doloro kaj ploroj... La knabino ne havis bezonon de mia mano, mi nur ŝin flustris : "Iru! La Espero vin atendas! " Mi estas ŝia propra forto, ŝia Mio...

- Neniu povas kaj devas vivi sola...Pro kio vi ne montris al ŝi la vojon al la Espero? Ĉiu homo havas sian vojon kaj li/ ŝi/ devas sola ĝin serĉi kaj trovi...Vivo sen Espero rapide al la tombo kondukas. Ŝi tion scias...Ŝi estas forta, vi vidis...

Verŝajne vi estas prava...

Nun la knabino ekprenis je la mano de la suno kaj ekrapidis.

La vojo nun ne kurbiĝas, por ke ŝin ne lacigu. La birdoj flugas kantante ĉirkaŭ ŝi, la homoj ridetas. La knabino ekvidis tion kaj ankaŭ komencis rideti.

- Amiko, ĉu vi restos kun ŝi ĉiam?

La knabino jam preterpasis.



Lumturo de espero

Elena Popova



Multaj lumturoj estis konstruitaj tra la mondo ekde antikvaj tempoj, kaj ĉiu el ili verŝajne estas asociita kun iu legendo. Sed ĉiu estas gardostaranto, eltenante la ŝtormojn kaj donante esperon. Esperon, ke la laceco de la longa vojaĝo finiĝas, ke la trankvila haveno estas proksima - Hejmo. La hejmo, kiu vokas kun varmece kaj amo, kie iu atendas vin.

Laŭ Homero, la unuan lumturon konstruis la saĝa greka heroo Palamedes, kiu bedaŭrinde fariĝis viktimo de kalumnio. Liaj lastaj vortoj estis:

"Ho, vero, mi malĝojas pro vi, vi mortis antaŭ mi!"

Ĉu la Vero mortas? Provizore, jes!, sed pli frue aŭ pli malfrue, kiom ajn kaŝite, ĝi aperas.

Sed ekzistas alia Lumturo, kiu brilas en la animo de homo kaj neniam estingiĝas - la Lumturo - Kredo, Espero kaj Amo, ĝian lumon ni neniam devas perdi.



NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE UEA ELEKTITAJ EN BRNO



Erika Godó

Laŭ la Regularo pri Honoraj Membroj, Honoraj Prezidantoj kaj Diplomo pri Elstara Agado la Komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA) surbaze de propono de la Estraro de UEA povas aparte distingi esperantistojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado, per la titolo Honora Membro (HM). Krome kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomumita esperantisto, kiu aldone havis eksterordinarajn meritojn por UEA. Dum sia unua kunsido en Brno la Komitato elektis 10 novajn HM-ojn, inter ili estas Wei Yida (Vejdo) el Ĉinio kiu mortis en 2025.

MEMORE AL VEJDO

Kion Vejdo faris kaj faras por nia Esperantujo

Elena Popova



Unue mi prezentu Penseon al niaj legantoj. Ĝi estas la nomo de monata beletra revueto publikigita en Esperanto. Penseo estas kreita ekde la jaro 1990 kaj daŭre aperas senhalte ĝis nun dum 34 jaroj. Jam 382 numeroj enmondiĝis al la Esperanta publiko. Esperantistoj el diversaj landoj sendas kontribuojn de poemoj kaj rakontetoj al ĉefredaktoro kaj post ties kontrolo ili surpaperiĝis. Komence Penseo estis presita mimeografe kaj en 1997 ĝi ekbitiĝis kaj surretiĝis. Ĝi pasis tra manoj de kvar ĉinaj ĉefredaktoroj: Guozhu, Sceto, Anteo kaj Vejdo. Nun ĝin redaktas Vejdo. Antaŭe ĝi havis nur kvar paĝojn. Post transpreno de redaktado far Vejdo en la jaro 2000 ĝia spaco atingas 12 paĝojn, trioble ol la antaŭaj, tiel ke ĝi entenas pli da kontribuoj. Kompreneble ĝia enhavo estas pli riĉa. Inter kontribuintoj aperas eĉ elstaraj esperantistoj, kiaj Berveling, Anteo, Liven Dek, Paulo Sinas, Tibero Madonna, Kris Long, Meva Maron, Imre Szabo kaj aliaj. Kiel la ĉefredaktoro Vejdo penas plibonigi la revueton per belaj titoloj kaj bildoj, kaj kompreneble per bonkvalitaj beletraĵoj. Pro tio Penseo rikoltas laŭdojn de la legantoj.

Antaŭ kvin jaroj mi okaze legis la revueton kaj tuj ekŝatis ĝin. Ĉiumonate mi regule legas la revueton atenteme kaj akiras multe el ĝi. Kaj mi ankaŭ faras kontribuojn al ĝi. Vejdo estas vere helpema. Li eĉ faris korektojn al miaj kontribuoj. Krome li ankaŭ helpis kontroli la lingvaĵon de mia libro antaŭ ties eldoniĝo. Mi tre dankas lin. Mi tre ŝatas, kion li diris “Penseo estas bona ĝardeno por esperantistoj por publikigi siajn poemojn kaj eseojn... Kiel redaktoro mi kuraĝigas legantojn kaj aliajn esperantistojn praktiki sian Internacian Lingvon por Esperanto-literaturo.” Vejdo mem laboreme kulturas la ĝardenon kaj akiras riĉan rikolton. Li kolektis poemojn aperintajn en Penseo kaj publikigis kelkajn poemarojn kiaj Cindy Mckee ĉineskas, Jadranka Miric ĉineskas, 300 Sopir-al-sudoj, 300 Dekses-silaboj, Sekretaj ĉineskoj kaj aliaj. Fakte li mem estas poeto kaj li produktis pli ol mil ĉineskaj poemoj dum tempdaŭro en sia redaktado de Penseo. En 2019 li ricevis per la poemo Knabo dum rifuĝado honoran mencian en poezia branĉo de Belarta Konkurso de UEA.

Dum ĉi tiuj lastaj jaroj, kiam Vejdo ekvizitis fejsbuk-retejon, li fondis du grupojn: poemoj de ĉina antikva poezio kaj ĉinesko—ĉinstilaj poemoj, kaj li mem aperigis multajn tradukitajn poemojn de li kaj aliaj esperantistoj el aliaj landoj. Lastatempe li elpuŝis videoserion de deklamado de poemoj el la Libro de Poezio tradukita de li. Tiuj deklamantoj estas el diversaj landoj, kio fakte fariĝas internacia evento. Mi vere admiras aktivecon kaj tre ŝatas tiujn videojn kun la ĉina kulturaj trajtoj.

Krom tio Vejdo ankaŭ estas tradukisto. Tre frue en 1984 li jam tradukis la romanon La Familio verkitan de Bakin, la ĉina granda verkisto. Pro kelkaj kialoj la libro estis publikigita en 1990 (Ĉina Esperanto-eldonejo, Pekino). En 2018 La sieĝata fortikaĵo verkita de Qian Zhongshu, kiun li tradukis, publikiĝis (Serio Oriento-Okcidento N-ro 54, Fremdlingva Eldonejo, Pekino). Krom tiuj eldonitaj romanoj li ankoraŭ havas kelkajn manuskriptojn de tradukoj de romanoj aŭ noveloj, kiaj Urbeto ĉe limo verkita de Shen Chongwen, En profunda korto verkita de tajvana verkistino Chiung Yao, Ruĝa sorgo verkita de Mo Yan kaj aliaj, kiuj sin trovas sur la retejo Lernado de Esperanto funkciigita de Vejdo sola.

Sed ŝajnas al mi, ke li havas pli grandan intereson pri tradukado de ĉinaj antikvaj poemoj. Laŭ lia konigo, li esperantigis 300 ci-poemojn de Song-dinastio (jam eldonita de MAS en Kubo, 2019), 300 qu-poemojn de Yuan-dinastio (jam eldonita de MAS en Kubo, 2021), 300 poemoj de Tang-dinastio en Esperanto (kuntradukita), 300 Ĉinaj antikvaj poemoj en Esperanto (kuntradukita), 340 ĉinaj modernaj poemoj en Esperanto, 170 ĉina klasikaj prozaĵoj en Esperanto (kompilita), La Libro de Poezio en Esperanto kaj 100 ĉinaj kantoj en Esperanto.

Mi konas lin kiel laboreman, seriozan kaj helpeman homon. La atingoj de Yida Wei / Vejdo/ en nia Esperantujo meritas nian atenton. Pro tio mi konigas liajn aktivecojn al miaj samideanoj.

ESPERANTO n.10,oktobro 2023



Ferio en Grekio

Lenke Szász



La unuan fojon mi feriiis en Grekio en la jaro 2011.

Tiam la turisma oficejo trovis por mi kunloĝantaron. Tio gravis por mi, ĉar estas malpli koste, se du personoj pagas la prezon de la ĉambro. Krome estas malplikoste, se oni elektas semajnon antaŭ aŭ post la turisma ĉefsezono, en la unua parto de majo aŭ de septembro. Do, eĉ se mi ne estas riĉulino, mi povis plurfoje ferii en Grekio.

Mi ekvidis la nekonitan kunvojaĝantaron nur en la buso de la turisma oficejo. La celita marborda ripozloko estis Paralia. Mian samĉambranaron interesis ĉefe la plaĝo kaj la luksaj vendejoj. „Vidu tiujn vilaojn! Vidu la palmojn! » - turnis ŝi mian atenton al la vidindaĵoj, kiuj malpli impresis min ol la maro.

Ĉiumatene mi ellitiĝis antaŭ la sunleviĝo, senbrue vestiĝis en mallumo sen enŝalti la elektron. Mi ŝteliris el la vilao kaj rapidpaŝe iris al la marbordo por atendi la sunleviĝon. La stratoj estis senhomaj ankoraŭ, sed sur la marbordo kolektiĝis ĉiumatene dek-dek kvin personoj kun fotiloj enmane. Mi atendis spirhalte la ekaperon de la suno. Mi faris multajn fotojn kaj kiam la suno jam lumigis ĉion, feliĉa mi reiris en la vilaon. Ankaŭ la kunloĝantino jam estis vekigiinta. Mi montris al ŝi la belajn fotojn pri la leviĝo de la suno el la maro. Foje ŝi rimarkis: „Vi kapablas ĝoji pri bagateloj.” Mi respondis sen ofendiĝo: „Por mi ne estas bagatelo fari belan foton.”

Kiam ni kune promenadis, ĉiam ŝi ekhaltis ĉe vendejoj de oraj juveloj kaj rakontis al mi, kiel bonan salajron ŝi havas, kiel multekostajn donacojn ŝi aĉetas por sia nevo. (Propran infanon ŝi ne havis.) Mi aĉetis per mia ne alta pensio „bagatelaĵojn”, suvenirojn al miaj gefiloj, genepoj, amikinoj.



La vorto feliĉo ne havas la saman signifon por ĉiuj.

Dum la pandemio, kiam ne eblis vojaĝi, eĉ nur eliri el la domo estis permesite nur en difinitaj horoj tage, mi sopiris al la amata Grekio. Mi verkis la jenan poemon:

SOPIRO

Jam malvarmetas matenoj kaj vesperoj,
flavajn foliojn pelas la aŭtuna vento,
grizas la ĉielo malĝojjige.

Sed ie, en suda lando
ankoraŭ brilas la maro!

Arĝentaj skvamoj brilas en suno
sur la senfina surmara bluo.

Mevoj kriadas,
sur monto antikvaj dioj regas.

Min tenas enlande la pandemio.

Ĉu mi revidos vin iam, Grekio?



En krepusko

Lenke Szász



Paŝadas vojrande maljuna vaganto,
Sekvas sian vojon rampanta skarabo.
Diru, skarabeto, ĉu vi hejmon havas,
lun en la hejmo, kiu por vi karas?
Krepusko jam estas, malmultas la lumo
Kiel en la vivo, same en naturo.
Estas ja mallonga la skaraba vivo,
Ankaŭ mia vivo proksimas al fino.
Ĉu falos vi ie senviva solulo,
Kaj apud vi estos nenia karulo?
Sekvu ni la vojojn niajn en la krepusko,
Samsortaj ni estas, solaj en naturo.



Somero estas eta vivo...



Rita Mkrtčjan

"Similas somero al la vivo eta",
Eksonas la strofoj de fama poeto,
Kaj ŝajne atendas junie- juniĝon,
Kiel kun amat' iam la renkontiĝon.

En libro "Somero" malongas la paĝoj
Al kio similas sunplena somero?
Al ĉarmaj lentugoj sur kara vizaĝo,
Al rid' de infanoj, al kant' ege bela.

Similas somero al gajaj vojaĝoj,
Al blua koloro de mar' kaj ĉielo,
Al blankaj boatoj, al "vel' de espero",
La jar', komenciĝu de suna somero!



" Somero estas eta vivo" - la strofo el la kanto de Oleg Mitjaev.

Aŭgusto

Rapidas varma aŭgusto

Monato lasta de somer',

Saluto lasta de radioj sunaj ☀️

De revoj rozaj pri feliĉo kaj esper'.



Rita Mkrĉjan

Aŭgusto ĝisrevidas arbojn, marojn,

Aperis ora bril' en verda foliar, 🌿 🍁

Jam pretas forveturi birda aro

Kun sama rapidec' forflugas viva jar'.

Ni petas aŭguston, ne rapidi,

Ĉagrenojn ĉiujn ni forlasu,

Kutime antaŭ voj' eble eksidi

Kaj por pli bona temp' plenigi glason! 🍷





Aŭtoro: *Maksim Bočkarev*

Jaga (5)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 002*



elrusigis *Sergei Isakov*

Konatiĝo

Bajana marŝis al la rando de la arbaro. Ŝi volis rerigardi al Alaj, sed rezistis. La instruisto diris, ke ĉi tiuj lokoj fariĝos ŝia hejmo, sed por kiom da tempo estos videble. Ŝi atingis la randon de la arbaro kaj haltis. Ŝi profunde enspiris kelkfoje kaj faris paŝon en la arbarombron. Bajana tute ne sciis kie ŝi loĝos aŭ kion ŝi faros, sed, strange, tio tute ne ĝenis ŝin. Ŝi promenis tra la densejoj, preterpasis la randojn. Ŝi ŝatis ĉi tiun arbaron. Ĝi spiris bonkorecon kaj zorgon.

Preterpasinte alian maldensejon, ŝi aŭdis krakon en la arbustoj, kaj grandega urso elflugis rekte al ŝi. En la lasta momento, ĝi ekvidis la knabinon kaj sukcesis turni sin flanken, rompante arbustojn ĉe tio. Svarmo da abeloj postkuris la urson. Ŝajne, la klabpiedulo decidis festeni per la mielo, sed la abeloj ne ŝatis tion. La abeloj flugis al la loko kie Bajana staris, rondiris super ŝi kaj flugis for. Tuj kiam la sono de la flugado de abeloj estingiĝis, urso kapo aperis el la rompita arbustoj. Ĝia maldekstra okulo estis ŝvelinta pro la mordoj, kaj tial, por rigardi la fremdulinon, la urso komike turnis la kapon al malsamaj direktoj.

De infanaĝo, Bajana kutimis ne timi arbarajn bestojn, do eĉ nun ŝi ne kuris, sed rigardis kun kompto la ŝveliĝintan okulon de la klabpiedulo. La urso atente rigardis la knabinon ankoraŭ kelkajn sekundojn, poste tiris sian kapon en la arbustojn kaj malaperis. Kaj kelkajn sekundojn poste el la arbustoj aperis ulo ĉirkaŭ dudek kvin jaroj.

Li estis alta, tre larĝa en la ŝultroj, kaj havis luksan, nekombitan helbrunan hararon. Liaj vizaĝaj trajtoj estis ĝustaj, kun malgranda ĝibeto sur la nazo, kaj liaj okuloj estis nekredeble ruzaj kaj samtempe tre afablaj. Pli precize, la okulo, ĉar la dua okulo estis ŝvelinta, ŝajne pro abelpikoj. Bajana iom ektimis. Ŝi neniam renkontis spiritojn sen proksima Alaj. Tio estis ŝia unua sendependa konatiĝo.

La fremdulo spite skuis sian piedon, kvazaŭ atentigante siajn luksajn botojn, kiuj neniel harmoniis kun liaj vestaĵoj. Jes, estis malfacile eĉ nomi ĝin vestaĵo. Ia griza senforma robo. Li faris malgrandan paŝon antaŭen, klinis la kapon kaj prezentis sin: "Skor!" Tio estas mia nomo. Mi estas la plej aĝa spirito de ĉi tiu arbaro!

Estis fiero en lia voĉo.

Bajana decidis ludi kune kun li kaj klinis la kapon same pruve, sed iom malpli.

"Filino de Jagg!" — ŝi prezentis sin. Alaj strikte malpermesis al ŝi diri ke ŝi estas infano de viro kaj spirito. "Tiuj, kiuj bezonas ĝin, jam scias ĉi tion de mi, sed aliaj ne bezonas scii!" - li ripetadis al Bajana.

Skor stariĝis rekte. Bajana ekkomprenis ke Skor jam estis avertita pri ŝia ebla alveno.

"Permesu, ke mi estu via gvidanto, filino de Jagg?" - diris Skor kun sincera respekto.

"Mi volonte akceptos vian proponon!" - Bajana konsentis, ridetante.

Nun ili marŝis kune. Li frotis sian ŝvelintan okulon kaj ekscitite laŭdis sian arbaron, kaj Bajana aŭskultis kaj memorfiksis.

"Mi scias, ke la posedanto de ĉi tiuj lokoj nomiĝas Bor. Kiel mi povas renkonti lin? - Bajana neatendite interrompis la rakonton de Skor.

"Ho, estos mi punota!" - Skor frapis sin sur la frunton. Plurfoje oni diris al li, ke tuj kiam la gastino aperos, li tuj raportu tion al Leŝij.

"Sciu, sinjorino! Proksime estas bela lago. Nuntempe banu vin post la vojo, kaj mi trovos la posedanton!" - ekbalbutis Skor rapide. Li montris al ŝi la direkton por iri al la lago kaj tuj malaperis el vido.

Bajana decidis obei lian konsilon. Estis varmega tago, kaj naĝi tute ne estis malbona ideo. Kaj ŝi iris en la direkto indikita al ŝi.

La lago estis vere bela. Bajana vidis multon vojaĝante kun Alaj, sed la beleco de ŝiaj indiĝenaj lokoj ne povus esti ombrita de iuj el la mirindaĵoj de la mondo.

Ŝi iris al la bordo kaj metis volvaĵon de siaj aĵoj sur la herbon, senvestiĝis kaj iris en la akvon. La akvo estis malvarmeta. Oni sentis, ke ĉie fluas fontoj ĉe la fundo de la lago. La kristala klareco de la akvo ebligis vidi la fundon eĉ relative malproksime de la bordo. Enirante la akvon, Bajana eksentis ies rigardon, sed tio ne kaŭzis timon. Eĉ se iu vere rigardus ŝin, ĝi estus sen ia malbono. Sufiĉe plaŭdinte, Bajana decidis eliri el la akvo, sed tiam ŝia rigardo estis tirita al lilioj, kiuj kreskis iomete dekstre de la loko, kie ŝi eniris la akvon. Bajana naĝis al ili kaj zorge plukis unu. Kun lilio en la manoj ŝi albordiĝis.

Vodjanoj, kiel mi multfoje diris, estis unu el la Superaj Spiritoj de la Tero. Kaj la nuda homa korpo estis, por paroli milde, nenio nova por li. Li vidis homojn en malsamaj formoj, precipe ĉe la krepusko de ilia civilizo. En tiu tempo, ili ne multe ĝenis per vestaĵoj. Sed nun, por la unua fojo, Vodjan komprenis, ke homaj virinoj povas esti eksterordinare belaj. Kaj tiam ekkomprenis al li, ke li scias konfuziĝi. Ĉu vi povas imagi, ke la Supera Spirito embarasiĝis pro la vido de bananta homa virino. Ne, li kompreneble ne spionis Bajanan intence, la cirkonstancoj trafis, ke li estis tiu, kiu nun trovis sin en la sama lageto, kie naĝis la juna Jaga.

La situacio estis ambigua. Li jam divenis, kiu estas antaŭ li. Sed li ne povis simple preni kaj eliri el la kanoj sur la kontraŭa bordo. Ĉi tio estis la unua fojo, ke tio okazis al li. Li havis potencon super ĉiuj rezervuoj de la Tero, li estis timita kaj honorita de miloj da triboj kaj homoj. Grandega nombro da altrangaj kaj junaj akvospiritoj servis al li, kaj li sidis kaj estis timema vidante iun knabinon, kiu naĝis por sekundo en unu el liaj plej ŝatataj lagoj. Se li tuj naĝus el la kanoj, evidentiĝus, ke li kviete rigardas ŝin. Sidi plu estas ankaŭ stulta. "Ho, maljuna Alaj pravis, ke ĉi tiu infano de homoj kaj spiritoj ankoraŭ montros sin!" - pensis Vodjanoj kaj restis sidanta en la kanoj. Li ne povis deturni la okulojn de sia gastino. Neniu el liaj sirenoj povis kompari kun ŝia beleco. Sed pro liaj sirenoj, homaj militistoj kaj regantoj kiomfoje komencis militojn inter si. Jes, la situacio!

Dume, Bajana iomete sekiĝis en la suno kaj komencis vestiĝi. Ŝi plektis la plukitan lilion en siajn harojn. Vidante tion, Vodjanoj simple ĉesis spiri. Li pensis, ke ĉi tiu speco de lilio nun devus esti protektita kiel la plej rara juvelo.

Post naĝado, Bajana sentis sin laca. Ŝi foriris de la lago kaj kuŝiĝis en la ombro de junaj betuloj, kiuj abunde kreskis laŭ la bordo de la bela lago. Ŝi dormis, kaj ŝi songis pri la domo, ŝiaj amikinoj, kaj ŝi ankaŭ revis pri Volĉok, li serĉis ŝin.

Skor rapide trovis Leŝijn. Li staris en la aspekto de maljuna arbo superkreskita de musko en unu el la maldensejoj. Li estis en stato simila al dormo. Kaptis la sunradiojn kaj faris sonon similtan ronkadon. Skor, konante la malfacilan karakteron de Leŝij, vokis lin plurajn fojojn de malproksime. Li respondis, sed ne tuj. Aŭskultinte la konfuzitan rakonton de Skor, li vigliĝis kaj alprenis la aspekton de potenca viro, altkreska, tre larĝa en la ŝultroj kaj, kiel mi jam diris, kun tre nobla hararo kaj barbo.

Bor miris, kiel rapide aperis la gastino, pri kiu parolis Alaj. Post ĉio, tri jaroj estas tre nerimarkebla tempodaŭro por la Supera Spirito. Li atendis ŝin, sed ne tiel rapide.

Elirante al la lago, ili ne tuj rimarkis Bajanan. Nur kiam ili alproksimiĝis, ili vidis ŝin en la ombro de la betuloj. Ŝi dormis. Kaj Leŝij ne kuraĝis tuj ĝeni ŝian dormon. Li staris kaj rigardis Bajanan. Jes, ŝi estis simila al aliaj homaj knabinoj, sed estis io ĉe ŝi, kio igis la posedanton de la arbaroj frostiĝi kaj rigardi ŝin sen palpebrumi. Alaj

pravis. Ŝi estis tia sola. La energio, kiu venis de ŝi, estis unika. Bor forgesis por tempeto kien li iris. Li rigardis la dormantan knabinon kaj komprenis, ke li faros ĉion kaj eĉ pli por ŝi. Li ne permesos al iu ajn damaĝi ŝin. Eĉ se Sur venas ĉi tien kun sia tuta armeo.

En sia sonĝo, Bajana sentis ke oni rigardas ŝin. Ŝi malfermis la okulojn kaj eksaltis. La grandega figuro de la arbarposedanto, kiu pendis super ŝi, timigis ŝin. Sed kiam ŝi vidis malantaŭ li la vizaĝon distordita de abelpikoj, ŝi trankviliĝis.

Ŝi trankvile deskuis sian robon kaj ordigis siajn harojn. Ŝi enigis en ilin lilion, kiu elfalis en sonĝo, kaj diris: "Mi estas filino de Jagg! Alaj diris, ke mi trovos rifuĝon kaj azilon ĉi tie!"

La Leŝij ne tuj respondis. Li rigardis la lilion en ŝiaj haroj kaj pensis ke li devus peti la Vodjnoj-on permeson pluki ĉi tiujn florojn en lia lago, ĝis li mem ekvidis ĉi tiun belecon.



"Saluton, filino de Jagg! Mi nomiĝas Bor, sed homoj nomis min Leŝij! Mi ĝojas vidi vin! Miaj arbaroj iĝu via hejmo! Mi scias ĉion, kion Alaj diris! Miaj havaĵoj fariĝos via fidinda protekto!" - diris Leŝij ceremonie kaj volis diri ion alian, sed malantaŭ li aŭdiĝis laŭta plaŭdo, kaj poste la plaŭdo de malsekaj piedoj sur la herbon.

Estis Vodjanoj kiu decidis profiti la ŝancon kaj, kiel oni diras, "eliri seka el akvo". Vodjanoj kiel ĉiuj liaj subuloj, povis preni la formon de iu ajn loĝanto de siaj rezervujoj. Kaj por la nuna homa civilizacio (kiel ĉiuj aliaj spiritoj de la Tero) li alprenis aspekton de homo. Kalva, iomete tropeza viro kun iomete verdeta haŭto. Li povis havi aŭ grandegan fiŝvoston aŭ sur homaj kruroj. Vodjanoj ne tre ŝatis la lastan opcion, kaj li uzis ĝin nur en ekstreme gravaj kazoj. Kaj hodiaŭ estis ĝuste tia okazo.

Vodjanoj flankenpuŝis Leŝijn per sia ŝultro, proksimiĝis al Bajana kaj donis al ŝi grandegan bukedon da lilioj. Li iomete klinis la kapon kaj prezentis sin: "Vi estas bonvena, filino de Jagg!" Mi estas Vodjan, kaj homoj nomas min Vodjanoj! Kaj miaj havaĵoj estas je via servo!"

Bajana prenis floron el siaj haroj kaj aldonis ĝin al la prezentita bukedo. La floroj estis belaj. Ŝi komprenis, ke ŝi estas vere bonvena ĉi tie.

Leŝij rigardis al Vodjanoj, por paroli milde, malafable, poste li vokis Skor-on flanken kaj diris ion en lian orelon. Li kapjesis kaj tuj malaperis.

Do, la du Superaj Spiritoj staris kaj ne sciis kion diri. Ili ambaŭ sentis sin kiel idiotoj.

"Ĉu ne estas tempo por vi? Kaj la suno jen kiel ardas! Ĉu vi ne povas sekiĝi sen akvo?" – Leŝij demandis Vodjanoj-on.

"Mi ne rapidas! Kiel mi povas forlasi mian karan gastinon?" - ŝajnige afable respondis Vodjanoj.

La paŭzo denove treniĝis.

Skor forigis la mallertecon de la situacio. Li ne estis videbla, sed aŭdebla. Li vokis al la sekva kampeto.

Ĉiuj elspiris trankvile kaj sekvis lian vokon.

Sur la falinta trunko de iam potenca arbo Skor aranĝis regalon por Bajana. Diversaj sovaĝaj beroj en betulŝela korbeto, mielo de sovaĝaj abeloj kaj multe pli, kion la arbaro povus donaci.

Bajana manĝis kun plezuro. Tian bongustaĵon ŝi neniam gustumis. Leŝij neniam laciĝis komenti, profitante la ŝancon paroli pri la riĉeco de siaj havaĵoj.

Ili renkontis la gastinon. Nun leviĝis la demando, kie ŝi loĝos. Vodjanoj proponis al Bajana por ekloĝi sur la bordo de unu el siaj lagoj. La Leŝij proponis unu el siaj plej ŝatataj maldensejoj en la profundo de la arbaro. Kaj Skor komprenis, ke negrave kie ŝi ekloĝus, la afero pri konstruado de hejmo klare falos sur lin.

Bajana petis permeson vagi ĉirkaŭ iliaj posedaĵoj kaj trovi la lokon kiu pli ekplaĉos.

Kompreneble, neniu komencis disputi kun ŝi. Skor vidis, ke ambaŭ Superaj Spiritoj klare ne estas si mem, sed por li, ĝenerale, egale.

Kaj Bajana, ne volante distri tiel potencajn spiritojn plu, petis permeson sole komenci vojaĝon tra ĉi tiuj belaj arbaroj. Adiaŭinte, ŝi eniris profunden en la arbaron, fidante je sia interna voĉo. Se ŝi pasigos longan tempon ĉi tie, tiam ŝi devas trovi lokon, kiu ĝojigos ŝin ĉiutage.

Leŝij, Vodjanoj kaj Skor rigardis post la foriranta gastino.



"Ne deturnu viajn okulojn de ŝi! Kaj avertu ĉiujn! Por ke eĉ ne unu haro!" - Leŝij rigoris al Skor.

"Jes, mi ĉion komprenis tuj!" - respondis tiu.

"Tiel ĉi! Kaj por ke ŝi havu ĉion!" - la arbarposedanto ne ĉesis.

"Kial vi estas tiel ekscitita?" - Vodjanoj ne povis sin deteni.

"Alaj petis nin ambaŭ gardi ŝin!" - Vodjanoj plu indignis.

"Jen, mi rigardas! Vi jam alrigardas! Kaj tre zorge!" - respondis Leŝij.

"Vi tiom atente observas, ke vi jam scias, kiajn florojn ŝi ŝatas!" - li ne cedis.

"Sed mem, mem! Kiajn berojn mi havas en la arbaro! Kiajn fungojn mi havas en mia arbaro! Pu! Aŭ eble ŝi vere ŝatas manĝi fiŝojn!" - Vodjanoj subtenis la eskaladon de la konflikto.

Oni ne scias, kiom longe ili disputus, sed ilian kverelon interrompis Skor: "Do ĉu mi iru post ŝi aŭ ion alian vi bezonas?" Per kio tuj turnis la koleron de Leŝij sur sin: "Ĉu vi ankoraŭ estas ĉi tie aŭ io? Mi diris - eĉ ne unu paŝon!"

Skor estis rapide forblovita de la vento. La malnovaj amikoj silente staris, kaj Vodjanoj la unua interrompis la mallertan paŭzon: "Bone, mi iros, vere varmegas!"


La Leŝij silente kapjesis responde. Estas miskompreno inter du plej bonaj amikoj. Kaj ĉi tio, kiel ni scias, neniam aŭguras bonon. Ne vane oni konsideris ilin amikoj. Multfoje ili helpis unu la alian. Kaj ŝajnis, ke nenio povis veni inter ili. Sed kiel ĉio rezultiĝis, povas esti kialo. Kaj la kialo estas absurda unuavide. Sed la fakto restis fakto...

(daŭrigota)

Varmego

— Laŭ la ĉinesko Caisangzi

Li Weilun



Forta varmo tra l' mondo.

Homoj ploras.

Bestoj ploras.

Ĉie ĉio doloras.

Katastrofoj okazas.

Akvo bolas.

Tero bolas.

Oni vivi ne povas.

采桑子·酷暑灾异

酷炎炙灼焚千里，
人泣堪怜，
禽畜凄然，
四野哀声痛连绵。

天灾频降穹将危，
水火交煎，
地脉腾烟，
生路茫茫问九天。

Tradukis: *John Huang*





Gu Cheng (1956-1993)

Maltrafita



tradukis *Ardo*

degelis la netravebla maldika glacio
la lagakvo estas tiel klara
la vivo enterigita de neĝo kaj mistero
reviviĝas en la printempa sunbrilo
ĉio estas simpla kaj klara
sed ni ankoraŭ maltrafas la ŝancon
ĉar vi kredas je sorto
ĉar mi dubas pri la vivo...






Gu Cheng (1956-1993)

Strateto



tradukis *Ardo*

strateto
tre longa kaj zigzaga
sen pordo
sen ajn fenestro
uzitan ŝlosilon mi prenas
kaj frapas la dikan muregon



Somera nokto

— Summer night 夏夜 Sommernacht

Ho, l' stelplenan nokton de somero,
ĉe eks-dom' pleniĝis spir' karsenta.
L' luno min lumigis kun tenero,
floroj dormis en susur' freŝventa.

Kuŝis mi en ripoz-seĝ' komforte,
avo mirrakonton brave diris.
Griloj ĉirpis flustre jen en-korte,
nokta sceno sorĉa min inspiris.

Tiu nokt' radikas en memoro,
ja neforgesebla tiel dolĉa.
Nun fariĝas mi jam oldsinjoro,
kun la nepo tra l' somero sorĉa.

Vivo releviĝas laŭ la karmo,
mi meditas kun kortuŝa larmo.

— Sonetofaris Yi Qiao



Yi Qiao



☆ Du Poemoj pri Ĝardeno Shen

de *Lu You* (1125-1210)

La unua:

Super l'urbomuroj jen sentiĝas morno,
subiras la suno, kaj sonas la korno.
En Ĝarden' Shen svenis sia gloro
de frua lag-pavilona favoro.
Sub la ponto verdaj ondoj jen sopiras
al printempo, kaj mi nun suspiras.
Tiam speguliĝis via belfiguro,
tiel sorĉa kaj kortuŝa kun mens-puro.



– Tradukis *Yi Qiao*

La dua:

Kvardek jaroj jam delonge pasis,
sonĝ' rompiĝis kaj aromo min forlasis.
Salikoj de Ĝarden' Shen jam maljunaj,
sen florkvasto ne plu oportunaj.
Baldaŭ mia korp' fariĝos polvo guta,
kaj enteriĝos ĉe la Mont' Ji kruta.
Mi ankoraŭ vin funebras kun murmuro,
en varmlarmo laŭ la postlasita spuro.



☆ 陆游：沈园二首

其一：城上斜阳画角哀，沈园非复旧池台。伤心桥下春波绿，曾是惊鸿照影来。

其二：梦断香消四十年，沈园柳老不吹绵。此身行作稽山土，犹吊遗踪一泫然。

Juveloj

Tutkore amataj infanoj
efikas al mi pli anĝele.
Diurna dediĉo ne vanas-
realas, juvelas, grandcelo!

Rilatojn karesajn, feinajn
redonas nevinoj junaĝaj
kaj mia feliĉo senfinas!
Estiĝas mi, kreskas raraĵoj.



Lilia Nikolova

La Libero Ami

Mia amo estas birdo fajra,
senprofita kaj fiera amo,
sian luman neston ĝi ne faros,
nepetanta de la ŝtonoj varmon

Ĝi la kaĝojn kaj katenojn fandas
per impeto forta al libero.
La elano - zorgojn signifanta -
ne altrudas amon kaj prosperas.



Animo-atendo

En la silento, kaŝita en korp'
Ripozas mia anim', kun espero fort'.
Ĝi songas pri lumeto silkmilda,
Pri alia anim', al ĝi sin kunkudra.

Ne petas multe, nur miron etan,
Rigardon, sentitan en koro profetan.
Silentan vorton, flustran en aer',
Kunulan animon kun la vera esper'.

Tagmeze songas, nokte ne timas,
Ĉar scias, ke celo iam proksimiĝas.
Tra tempo kaj spaco flugas suspir',
Kaj alian foran koron tuŝas la spir'.

Se vi venos, vi sentos kvieton,
Eble en mi povos trovi vian memon.
Mia animo dehiskos kiel floro,
Kaj mallumo malaperos sen doloro.



Lilaketo



Somere...

Lilaketo



Vivas somero hela kaj milda,
kun lum' ora, trankvila kaj flora.
Natur' ĉiam karesas nin varme,
inter floroj bird' kantas sincere.

Sub la sun' la vento flustras dolĉe,
floroj balancas, vivante ĝoje.

La mondo ridas, plena de amo,
kaj kor' kaj spir' trovas sian pacon.



Somera Kanto

La suno flamas super kampoj,
la vento ludas kun folioj.
La rivero fluas trankvile,
kaj kantas la birdoj sendube.

Sur sablopad' dancas piedoj,
infanoj ĝojas sen atendo.
La tuta mondo kvazaŭ dormas
en luma, varma somer-songo.

Brilas vespere
noktaj steloj,
libero ridas
en aero.



Lilaketo

Nyári dal

A nap még fellángol a mezők felett,
a szél játszik a színes levelekkel.

A folyó nyugodt, vize kellemes,
távol kismadarak énekelnek.

Homokos úton lábak táncolnak,
gyerekek örülnek, ma s holnap
Az egész világ mintha dalolna,
egy fényes, meleg nyári álomban.

Éjjel csillagok
suttogva fénylenek.
A levegőben
a szabadság nevet.

Somera memoro

Jozefo Dudas'a



En la setlejo, en kiu mi naskiĝis estis landŝoseo. Mi naskiĝis en ties lasta domo, dekstre, al direkto de la ĉefurbo. Mi antaŭ dudek jaroj vizitis ĝin. Eble post ni neniu uzis ĝin. La setlejnomo havis du variaĵojn el la antaŭvortoj. Ambaŭ estis memstaraj vilaĝoj. Unu estis malsupra, la alia supra. Poste, ĉirkaŭ en 1950, oni ne plu uzis tiujn nomojn. Anstataŭ la du antaŭnomoj oni oficiale elektis novan, tiel fariĝis el la antaŭaj du vilaĝoj unu. Ili kvazaŭ neniam estintus du malsamaj setlejoj, tiel estas kune.

Al mia naskiĝdomo ligiĝas du memoroj kiuj ne ligiĝas la la someroj.

Unu el ili estis sonĝo, kiam mi milojn da aeroplanoj vidis sur la frunokta firmamento.

Poste dum jardekoj mi cerbumadis pri tio, ke kiel tio povis okazi, ja mi ne estis en tia aĝo, ke iu ajn rakontintus al mi pri similaj temoj.

La alia temo ne sonĝo estis, sed memkoniĝo. Mi vekigi. Sola estis en la ĉambro. Mi de tiu fino de la lito, kie estis la kuseno, iris sur la lito al la kontraŭa fino de la lito, kiu estis apud la ĉambropordo. Ĉar mi sentis mian forton, mi pensis, ke mi utiligos ĝin. Por, ke mi faru ian utilan, mi pensis, ke mi ruinigos la muron. Mi turnis min al la muro, almetis ambaŭ miajn manojn, kaj forte ekpuŝis.

La somero tiel ligiĝas al la naskiĝdomo, ke de tie mi iris la unuan fojon al la domkonstruado. Verŝajne mia patrino portis al la konstruantoj tagmanĝon, kaj ne povis certigi alimaniere mian sekurecon, tial mi devis ŝin akompani.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi same havis kuriozan sonĝon. Jam nur tion mi memoras, ke en ruinurbo mi iradis, kaj ĉie nur la ruinaj dommuroj videblis. Nun mi pensas, ke la militaj fotoj same povas esti la bazo de tiu sonĝo, sed kelkajn tagojn post la sonĝo, mi tion pensis, ke post kelkaj jarcentoj de iu civilizoĉeso, iu, kiu iel renkontis tiun teronon, ekmiris pro tio, kaj kiel mi ne sciis pri la aeroplanoj kaj eĉ ne aŭdis, tamen mi vidis kaj memoras pri ĝi ĝis mi vivas, mi tiel pensis, ke la memorkapablo povis renkonti iun unikan memoron el la pasintaj jarmiloj, jarmilionoj, kaj kiel kreas por ni la realon samtiel kreis el la bazo ian bildon.

Nia domkonstruado okazis en nova tereno. Oni plilongigis la straton al la limo, kaj al kiuj apartenis tiuj terpecoj, povis konstrui domon. La stratlongigo sekve duonigis la parcelojn. Tiel ankaŭ trans la strato vidalvide al ni, sur la parcelon nia parenco konstruis domon.

La definitiva akslinio de la strato ankoraŭ ne estis kiam nia domo estis ekkonstruita. Kiam jam estis konata, nia unua ĉambro, kiu volis esti inter la kuirejo kaj la strato, ne konstrueblis. Ankaŭ tiu domo, kiu estis konstruita post la nia, ne estas ĝustaloke. Ties unu angulo al la strato, estas sur la trotuaro kaj la bariloj tie mankas. La akslinio de tiu domo ne estas orta al la akslinio de la strato. Tiutempe multuloj konstruis kamparanstilajn domojn, longajn.

La antaŭa fino de tiu strato, kiu estis plilongigita, havis virbovan stalon. Supozeble ambaŭ stratoj tie povis iam finiĝi, se ni akceptas, ke oni ofte ĉe la fino de la vilaĝo kutimis konstrui krucon, ĉar tiu bovstala domo kaj la kruco paralele estas, kaj najbaras. Nun kverstrato kunligas ilin.



Kiel evidentiĝis je nia kvindekjara renkontiĝo de la bazlernejaj samklasanoj, pri la eventoj de 1956, mi ne bone memoris. Mi sciis, ke ni forigis desur la muro de la bovstalo la kvinpintan ruĝan ferstelon, sed mi pensis, ke mi kun kelkaj najbaroj faris tion, sed dum la renkontiĝo evidentiĝis, ke nia tuta klaso ĉeestis tiun eventon. Ni forbruligis la rusajn studmaterialojn, sed gvide de nia ŝatata klasestro JÁNOSHÁZI (Sándor). Same kun li nia klaso manifestaciis kontraŭ la sovetia subpremo, ĉe la tiama revizia memorstatuo, kiun oni antaŭe konstruis, pro la stumpigita lando, kies verdikto okazis en Trianono (FR). Li deklamis poemon de PETOFI Šandor (PETŐFI Sándor). Estas interesaĵo, ke mia patro mortis en la sekva jaro, en 1957, sed tiam mi faris foton pri tiu tereno, kaj mi rimarkis, ke tiu memorstatuo jam ne videblas sur la foto. Nun post la reĝimŝanĝo la vilaĝo faris tie statuojn. Mi havas tiun memdesegnititan blazonon, kiun ni preferis kontraŭ la sovetia kaj tion mi faris en 1956. Povas esti, ke la menciitaj du eventoj – la manifestacio kaj la forigo de la kvinpinta ruĝa stelo eble samtempe okazis.

Ni, kiel knabetoj ŝatis spekti, kiam oni akompanis la virbovojn al la natura parigo. La bovo flaris la vaginon de la bovino, ĝia penisu duonmetron pendis kaj pendolis. Kiam konvenis la tempo, ĝi saltis sur la bovinon, kaj se ĝi sukcesis, la bovino ofte ekĝemis. Se la bovino estis altstatura, tiam por ĝi oni uzis kavon. Tiu loko, kie la bovino atendis la surpriziĝon ĉenite, estis barita triflanke. La virbovon la viro akompanis tiel, ke li prenis la stangon, ĉe kies virbova fino estis hoko. La virbovo en la nazo havis metalringon, en kiun la viro en la stalo povis hoki la stangon, malligis ambaŭflanke la ĉenojn de la bovo, tiel akompanis al la ĝojloko.

La loko, kie ni konstruiĝis estis paralela al tiu parto de la landŝoseo kie mi naskiĝis. La distanco inter la naskiĝloka domo kaj la konstrueja loko laŭ rekta linio estis proksimume cent metra, sed ni uzis la sulkojn inter la du najbaraj parceloj de la domoj. Do ne laŭ la stratoj ni iris de unu loko al la alia.



Mi devas mencii, ke kiam mi estis trijara, ni tiam translokiĝis. Pro tio ĉar la translokiĝo okazis pentekostsabate, kaj ĉar la kristana festo estas en la unua duonjaro, tial mi supozas, ke ne en tiu jaro komenciĝis la konstruado, kaj mi memoras mian unuan viziton, kiam apenaŭ estis komencita la murkonstruo kaj nur la fundamento videblis. Mia sekva memoro antaŭ la translokiĝo estis, ke oni konstruis la tegmenton, kaj tiun onklon kies nomo estis Nikolao, mi alparolis Onklo Nikolao, anstataŭ la simpla oĉjo Nikolao, ĉar la onklon la plenkreskuloj uzis inter nian parencoj.

Tiam estis varma somero, mi sidis en ombro, kaj tiam mi rimarkis, ke la plenkreskuloj temas pri mi, ke mi kiel alparolis oĉjon Nikolao.

Je la haŭta aliigo

De la flava trezora termambesto

Sonja Lang

Nur je la fino de la suna tempo ho,
 La grupo ekscias vian bonon.
 Je la ĉefa bona fino,
 Je la vartista horizontalaĵo,
 La greno parto ekzistas ĉe
 La bona pieda ujo.
 La malbona sento de
 La finiĝanta tempo estas for.
 Je la maljuna scia tekstofolio de la aliigo,
 Sonja Lang belarte aŭskultas
 Sian internan nevideblaĵon.

✕ 𐀀 𐀂 𐀄 𐀆 𐀈 𐀊)
 I 𐀌 𐀎 𐀐 𐀒 𐀔)
 𐀖 > 𐀘 𐀚 𐀜 𐀞 𐀠 𐀢
 I 𐀤 𐀧) 𐀩 𐀫)
 % 𐀭 𐀯 > 𐀱 𐀳 𐀵
 𐀷 𐀹 𐀻 𐀽 I > ✕

𐀿 𐀻 𐀽 𐀿 𐀻 𐀽)
 𐀿 𐀻 𐀽 𐀿 𐀻 𐀽)
 > 𐀿 𐀻 𐀽 𐀿 𐀻 𐀽



Toki Pona

Bombardo kaj tortobako

Attila Salga



Knabino ludas en la sablo, malatentante baniĝantojn kaj varmegajn radiojn de la Suno. Ŝi portas akvon en sia verda siteleto el la lago, troviĝanta kelkajn metrojn de ŝi. La knabineto akurate verŝadas la akvon en la angulon de la sablejo. Komence ŝi decidis baki torton samtiel, kiel tion faras ŝia panjo: ĝisfunde knedi la paston, dolĉigi ĝin per sukero, meti en la paston ovoflavon... Sed hieraŭ ŝia biskvita dieta torto ne sukcesis, disiĝis, dismoliĝis. Pli volonte ŝi konstruos altan monton, surpinte kun elvidejo, ĝusta, natura, nefalsita... Por planti arbaron jen ĉe-mane bastonetoj, branĉetoj, por fluigi la rivereton ŝi devas fosi kavon. La elvidejo estos la plej alta en la tuta mondo, por ke oni povu vidi malproksimen, ĝis la gepatra domo...

En la sablejo ludas aliaj geknaboj. Por ili sufiĉas tereno. Malgranda knabo longtempe rigardas tiun konstruadon.

– Enjo, ni konstruu fortikaĵon! Mi povas konstrui pli grandan kaj belan fortikaĵon, ol mi vidis en televida filmo.

– Sed nun mi konstruas monton, elvidejon, arbaron kaj rivereton.

– Bone, sed konstrui fortikaĵon estas terure bone. Ĝi estos la plej-plej fortega en la tuta mondo, ĝi estos tiel bon-ec-aĵa!

– Kia estos tia...bon-ec-aĵa...?

– Tiu estos „supera” fortikaĵo... Ankaŭ tie estos monto, rivereto, el la fortikaĵo oni povos elrigardi Amerikon...

– Ho, tiel bone... – konsentis la knabineto.

Jen la knabo iĝas giganto: per sia ŝarĝaŭto li rapide altigas montegon, per siaj grandaj manplatoj li batadas-glatigadas, fortigadas, maldikigas ĝin.

La muregojn de la fortikaĵo konstruas la knabineto el freŝa mola, akva sablo. Ĉe unu el ĝiaj anguloj baldaŭ altiĝos bastiono, propra elvidejo, de sur kiu oni povos vidi Amerikon, eĉ la gepatrodomon de ŝi. En la deklivo de la fortikaĵ-montego ŝi plantas arbojn. Sed...en la alia flanko la giganto faras krenelojn, ĝisas kanonojn.

La rivereto de la knabineto estas ĝisgenua. Kiu volas supreniri al la elvidejo, povas uzi ponteton, ŝtuparon, barilojn. Ĉe la flanko de la giganto la rivereto iĝas kolerema golfo naĝiganta grandegajn batalŝipojn.

En la turo de la fortikaĵ-korto loĝas reĝinidoj kaj Dornorozinjo, kiu ege atendas la reĝidon. Sed kontraŭe konstruiĝas municideponejo, en kiu estas kanonoj, raketoj, mitraletoj, maŝinpafiloj, bomboj.

La reĝinidoj ekiras promenadi iun belegan someran tagon. En la elvidejo ili sentas neelteneblan varmegon, ili demetas sian vestaĵon. Ho kiel belege estas bani sin en bankostumo sunbrile!

En la kontraŭa flanko la viroj bravaj preparas sin al la batalo: ili luktas, skermas, pafadas kaj levadas pezon. Kiu ne celpafas, tiun mortigas la komandanto.

– Kaj ĉi tie estos nia infanĝardeno!

– Ĉu infanĝardenaĉo?! Kiel? Idoj ankoraŭ ne scipovas batali!

– Ĉu batali? Ili tute ne deziras batali.

– Ne gravas! Ĉi tie nun komenciĝas la milito. Flugas la flugmaŝinoj, eksplodas la bomboj...ŝŝŝŝ-

sss...bruuuuu!...buuumm!!!...



Ruiniĝas la loĝturo-belvidejo, mortis la reĝinidoj. Dornorozinjo vane atendas sian reĝidon.

– Idioto! Aĉulo, aĉa bufo!!! For! For!!!

Alvenas novaj bomboflugmaŝinoj... Disbombardo... Ruiniĝas la muregoj, monteroj disiĝas, timege ensorbiĝas la akvo de la rivereto, sed aliflanke la golfo iĝas maro kaj komencas agadi la teruraj batalŝipoj...

La knabineto ploreante frotas siajn okulojn per kotumitaj pugnetoj; forbrulis la arbaro, ruiniĝinte suferas la elvidejo, estas detruita la montego!... Sed en la siteleto restis ankoraŭ iom da akvo! Ŝi surverŝas lin, poste ĵetas al li akvan sablon. La „giganto” forkuras, kaj kune kun li rifiĝas la flugmaŝinoj kun bomboj, meriĝas la ŝipoj...

– Panjo! – ŝi krias, kurinte al siaj gepatroj. – Nekonata aĉa knabo – rigardu, tie li sidas – ĝenis min ludi, li disiĝis mian monton...

– O, kara mia! Ne gravas. Vi povas fari alian, pli altan, ĉu ne? – diras ŝia panjo interrompante la legadon de interesa libro. – Iru, ludu plu! Ne gravas.

La kuraĝigaj vortoj de la panjo instigis ŝin iri ludi. Ŝi decidis baki torton, kaj nun ŝi portas akvon en sia verda siteleto...

Dumtempe alproksimiĝas la nekonata knabo, kaj hezite ekparolas: – Mi bombardis, ĉar tion mi vidis en televidprogramo por plenkreskuloj... Mi rigardetis sekrete...tiun fabelon ne por knaboj. Sed... sed mi tre ŝatas surfilman ursinon, kiu bakas tortojn al siaj ursidoj. Ŝi lekas ilin kiel kato la lakton. Mi montros al vi, kian ĉokoladan torton ŝi bakas...

– Ankaŭ mi ŝategas tiun ursinon kaj la idojn. Ni faru por ili biskvitan torton! Ni invitu ĉiujn bestojn el la arbaro: lupojn, leporojn, vulpojn...

– Sed la leporon manĝos la vulpo...!

– Ne, ili estas pacemaj, ili manĝas tion, kion ni, homoj. Ili ne mortigas unu la alian. Kaj tio ne estas fabelo por plenkreskuloj aŭ geknaboj, tio estas la vero mem. Ĉiuj ili estas niaj gastoj, bonaj amikoj.

La knabo kaj la knabineto knedas kune la paston – silente, pace...

Embaraso

Yin Jiaxin



Inter popolanoj cirkulas embarasa kaj amuza rakonto:

En lia oficejo estas ses homoj: krom li mem estas sinjorino Fu sidanta kontraŭ li kaj kvar viraj kolegoj. Ili laboras kune en akordo kaj geamikiĝas unu kun alia.

Iutage la kompanio sendis lin oficvojaĝi al Pekino kaj sinjorinon Fu por ĉeesti kunvenon en urbo Tianjin, kiu situas tuj najbare de Pekino. Do ili ambaŭ veturis kune per trajno. Estis vespere kiam la trajno atingis Pekinon. Post vespermanĝo, ili ektrovis loĝejon. Ĉar estis turisma sezono, ĉiuj hoteloj estis plene okupataj. Strate post strato ili finfine trovis hotelon, kiu povas akcepti gastojn. Je tio ili tre ĝojis, sed tuj falis en dilemon, ĉar en la hotelo restis nur unu neloĝata ĉambro kun unu granda lito. Nokto tiel profundis kaj ili tiel laciĝis, ke ili ne povis ne akcepti la ĉambron.

En la ĉambro sinjorino Fu honteme proponis, ke unu kapkuseno devas estis metita meze de la lito por apartigi unu disde la alia dum dormado. Li kapjesis. Tiel ambaŭ tranoktis trankvile. En la sekva mateno, sinjorino Fu veturis al Tianjin dum li plenumis la taskon en Pekino. Estis la unua fojo por li viziti Pekinon, sekve fininte la taskon, li vizitis kelkajn vidindaĵojn inkluzive de la Granda Muro.

Reveninte de Pekino, li ekoficis en la oficejo, kie sin trovis sinjorino Fu ankoraŭ. Ĉiuj liaj kolegoj neniam vizitis la vidindaĵojn en Pekino, do li ne povis deteni sin paradi antaŭ ili. Iu envie demandis al li: “Ĉu vi jam grimpis la Grandan Muron?”

“Kompreneble. *Ne estas bravulo, kiu ne supreniris la Grandan Muron.*” Dirinte, li mienis fiere.

Tiam sinjorino Fu kun la kapo klinita grumblis ŝajne al si mem; “Ĉu tiu, kiu eĉ ne povas transrampi kapkusenon, kapblas grimpi la Grandan Muron?” Ŝia voĉo estis mallaŭta, sed sufiĉe kuris en liajn orelojn. Aŭdinte ĝin, li ekrigardis al ŝi konfuzite kaj konsternite. Kaj tiu ĵetis al li signifoplenan rideton.

Matene de lia tri deka naskiĝtago, ŝi kaŝe diris al li: “Hodiaŭ estas via naskiĝtago. Venu al mia hejmo vespere. Mia edzo ne estas hejme, li jam oficvojaĝis. Kaj vi ricevos surprizĝojon.”

“Kian surprizĝojon?” li demandis scivoleme.

“Mi ne diras al vi nuntempe.” Mistera rideto ludis ĉe ŝia buŝangulo. Kaj li lasis liberan kuron al sia fantazio.

Tiuvespere, sin tualetinte li bele vestita iris al la hejmo de sinjorino Fu. Irinte en ŝian salonon, li rimarkis, ke ŝi, ankaŭ bele vestita, estas delikate ŝminkita, kaj ŝi aspektas tiel rava, ke li vere deziras ŝin brakumi kaj kisadi. Li softis al ŝi: “Vi estas tre bela!”

“Dankon pro via laŭdo!” Serena rideto montriĝis sur ŝia vizaĝo.

Li fiksrigardis ŝin per lascivaj okuloj kaj tiu scivoleme demandis al li: “Kial vi rigardas min tiel strange?”


“Mi estas iomete ekscitita.” Volupta deziro ondis tra lia korpo.

“Trankviliĝu. Post momento mi faros vin ne nur ekscitita sed ankaŭ ĝoja.” Montrante la fermitan pordon de ĉambro ŝi pli diris al li: “Mi la unua eniros la ĉambron kaj pretigos min. Vi atendu ĉi tie ĝis mi vokos vin. Ne forgesu malŝalti la lampon de la solono antaŭ ol puŝmalfermi la pordon.”

“Vere romantika!” Lia koro ekbatis rapide.

“Certe!” Dirinte ŝi montris al li misteran rideton, kiu perdigas lian menson.

Apenaŭ ŝi eniris la ĉambro, kiam li ekdemetis la vestojn kun sango bolanta tra la tuta korpo. En palpebruma daŭro li sin nudigis, malŝatis la lampon kaj atendis en obskuro. Aŭdinte la vokon de sinjorino Fu, li palpe puŝmalfermis la pordon kaj trovis, ke ankaŭ obskuro regis en la ĉambro. Pensante, ke la virino estas vere lerta tenti viron, li karese ekvokis: “Bebo mia, mi venas. Kie vi estas?”



Ĝuste en la momento, subite ekbrilis la lumo de la ĉambro, kaj samtempe aŭdiĝis kanto “Feliĉan naskiĝtagon”. Efektive la ĉambro estas manĝejo, meze de kiu staras ronda tablo, sur kiu estas granda kuko kun tri kandeloj sur ĝi. Ĉirkaŭ la tablo sidas la kolegaro de la oficejo, ili ĥoras manklakante takte.

Ario de juneco

Yin Jiaxin

Daŭrigante la enhavon de numero 002



Ĉapitro 4 Hu Zenzi rakontas

Fanhua estis sindonema kaj laborema knabino. Kiam ŝi revenis hejmen, ŝi ne ripozis sed okupiĝis pri mastrumado. Vespere, ŝi akompanis min, televidante kaj babilante. Mi ne plu estis la plej soleca homo en la mondo.

Januare de 1984, Fanhua sciis, ke mi nepre sentas min malbone en ĉiu januaro, ŝi intence diris varmkorajn vortojn kaj rakontis ĝojigajn okazaĵojn. Mi vizitis la tombon de Olda Zan je la 20-a, la datreveno de lia mortotago. Fronte al la tombo Fanhua surgenuiĝis kaj trifoje riverencis kapaltere. Poste ŝi ekbruligis incensobastonetojn, paperajn monimitaĵojn kaj petardojn. Mi metis sur la tombon bukedon de umefloroj – liaj plej ŝatataj floroj – kaj larmoj ekpluvis. Mi konsolis al Olda Zan, ke li trankviliĝu, ke mi vivas bone; ni perdis Lan'e, nun mi havas Fanhua. Fanhua brakumis min kaj en mian orelon leĝere vokis: “Avinjo!” Ŝi traktas min kiel sian propran avinon, kaj mi traktas ŝin kiel mian propran nepinon. Ni dependas unu de la alia, kaj ŝi fariĝis parto de mia vivo.

Iun tagon mi ricevis de la armeo leteron, kiu legiĝis jene:

Respektinda instruistino Hu:

Saluton!

Ĉu vi iam pensus, ke nekonato skribus al vi? Fakte mi jam longe volis renkonti vin persone, sed unue mi ne havis la kuraĝon, kaj due mi pensis, ke mi mem povos solvi la problemon, do mi ne ĝenis vin. Nun mi volas paroli kun vi per letero.

Mi nomiĝas Ŝja Sonlin, samvilaĝano de Zu Fanhua. Mi kaj Zu Fanhua estis gefianĉigitaj de niaj gepatroj en infanaĝo. En la lernejo, mi rigardis ŝin kiel fratinton, kaj ŝi rigardis min kiel fraton. Ni kune iris al la lernejo kaj rehejmeniris. La samklasanoj ofte ŝercis pri ni, sed ni ne sentis nin embarasitaj. Niaj sentoj estis ĉiam bona, ni kreskis kune. Post la diplomiĝo, ni daŭre estis amikaj kiel antaŭe, vespere ni ofte iris al la arbaro malantaŭ la vilaĝo por ludi. Mi ŝatas ŝin el la koro. Ĉiufoje kiam mi pensas, ke post kelkaj jaroj ni ambaŭ fariĝos plenkreskuloj kaj ni estos kune por ĉiam, mi ekscitiĝas.

Lasta vintro, mi aŭdis, ke ŝi estos adoptita kiel via nepino. Mi tiam sentis min tre senespera, mi vere ne volis perdi ŝin. La vesperon antaŭ ŝia foriro, mi demandis ŝin, kion ŝi pensas pri nia afero. Ŝi ne respondis ion ajn, nur diris, ke ni parolu pri ĝi kiam venos taŭga tempo. Mi pensis, ke niaj sentoj estas sufiĉe profunda, ŝi ne forgesos min senkompatate.

Kvankam nia fianĉiĝo estis aranĝita de niaj gepatroj, ni estas malsamaj ol tiuj, kiuj havas tute aranĝitajn geedziĝojn. Ni ĉiam interrilatis kaj estis proksimaj. Mi aŭdis de ŝia familio, ke ŝi eklaboris en ŝipfarejo. Post ŝia foriro, ŝi neniam skribis al mi. Mi letere diris al ŝi, ke se ŝi ne skribos al mi, mi iros serĉi ŝin. Ŝi respondis letere al mi, dirante, ke mi ne iru serĉi ŝin, kaj ke ni parolu pri nia afero post kelktempo. Mi iris al ŝia familio, kaj ili diris, ke kiam vi iam demandis, ĉu ŝi estas fianĉinigitita, ŝia patrino neis, kaj nun ili ne povas informi al vi, ke ŝi estas fianĉinigitita, ili konsolis al mi, ke mi atendu.

Jes, Fanhua nun fariĝis urbano kaj povas ricevi salajron, dum mi estas kamparano. Niaj statusoj estas malsamaj, laŭlogike mi ne devus obsedi ŝin. Sed mi amas ŝin kaj neniel forgesi ŝin. Lastan someron mi vere ne povis deteni min kaj iris al la ŝipfarejo por serĉi ŝin – tiam mi ne ĝenis vin. Mi memoras, ke estis sabato. Posttagmeze, kiam mi ĵus descendis de la pramo, mi vidis Fanhua starantan la pramon sur la bordo, akompanatan de malgrasa junulo. Ŝi vidis min kaj malvarme diris, ke ŝi revenos hejmen. Mi returne ascendis la pramon kun ŝi kaj la junulo. Subordiĝinte, la junulo transdonis ŝian sakon al ŝi kaj foriris, ni staris ĉe la riverbordo por paroli. Mi demandis ŝin, kion ŝi planas pri nia afero, ŝi estis ankoraŭ malvarma kaj diris, ke ŝi neniam pensis pri ĝi. Mi demandis ŝin, ĉu ŝi koramikigas kun tiu junulo. Ŝi neis, dirante, ke tiu junulo estas ŝia kolego sub la sama majstro kaj ankaŭ loĝas en la urbo Yun. Mi diris, ke mi iros paroli kun vi, ŝi ne permesis min, dirante, ke vi estis malsana. Do mi ne ĝenis vin. Pasiginte la nokton en gastejo, mi revenis la sekvan tagon.

Reveninte hejmen, mi kun malĝojo dormis sinsekve kelkajn tagojn. Miaj familianoj persvadis al mi forgesi la aferon, sed mi ĉiam pensis pri ŝi. Mi ne scias kial mi domaĝas forlasi ŝin. Mi subite pensis, ke la diferenco inter mi kaj ŝi kuŝas en tio, ke unu estas urbano, la alia estas kamparano. Kaj ĉi tiu problemo estas solvebla. Mi intencis aliĝi la armeon. Mi letere diris ĉi tiun ideon al Fanhua, kaj ŝi tuj respondis kun nur unu frazo: “Mi deziras al vi sukceson!” Mi legis ĉi tiujn vortojn ĝoje, sentante, ke mi havu esperon. En la pasinta oktobro mi varbiĝis en la armeon. Mi informis ĉi tiun novaĵon al Fanhua, kaj denove demandis pri nia afero. Ŝi respondis leteron, dirante, ke ŝi ne volas konsideri geedziĝon portempe, ŝi volas bone servi vin.

Kial mi skribas ĉi tiun leteron al vi? Ĉar nun vi estas la famliestro de Fanhua, mi devas paroli kun vi pri ĉi tiu afero kaj peti vian konsenton. Bonvolu kredi min. Mi amas Fanhua, mi por ĉiam estos bona kaj fidela al ŝi, kaj mi respektos vin kiel ŝi, traktante vin kiel mian propran avinon. Bonvolu elpreni iom da tempo el via okupiteco por respondi al mi.

*Sincere via,
Ŝja Sonlin
21-a de junio 1984*

La letero surprizis min. Se ŝi havis fianĉon, kial ŝi kaŝis la veron de mi dekomence? Mi ne povis toleri, ke oni trompas min. En la letero estis menciita junulo, kiu portis la

sakon por ŝi. Kio okazis? Mi vere volis telefoni al ŝi, ke ŝi tuj revenu kaj klarigu al mi, sed ne eblis. La fabriko havis regulojn, ke oni ne povas forlasi sian postenon dum laborhoroj. Mi devis atendi ĝin la semajnofino. Mi sentis min tro simplanima. Foje kiam Fanhua menciis al mi pri la amrilatoj de ŝiaj samĉambranoj, mi demandis al ŝi: “Ĉu vi havas koramikon?” Ŝi diris ne, do mi ne plu atentis, ĉar mi jam avertis al ŝi, ke post du jaroj mi iros al urbo Ŝan kaj ankaŭ prenos ŝin kun mi. Mi pensis, ke ŝi estas obeema knabino.

Sabaton posttagmeze ŝi apenaŭ eniris la ĉambron kiam ŝi varme diris: “Avinjo, vi ripozu, mi preparos la vespermanĝon.” Mi ignoris ŝin. Post la manĝo, kiam ŝi finis la lavadon kaj ordigadon, mi diris: “Fanhua, sidiĝu. Mi havas demandon por vi.”

“Kio okazis, avinjo?” Ŝi aspektis perpleksa.

“Mi demandas vin, ĉu vi estis fianĉigita hejme? Diru la veron,” mi diris serioze.

Ŝi surprize rigardis min, sekve mallevis la kapon kaj silentis.

“Diru!” mi emfazis la vorton.

Ŝi ankoraŭ silentis.



“Ĉu jes? Tiu junulo nomiĝas Ŝja Sonlin, nun en la armeo, ĉu ne?”

Ŝi levis la kapon kaj surprizite rigardis min. Mi kolere elprenis la leteron kaj montris ĝin al ŝi. Unuafoje mi koleris tiel severe kontraŭ ŝi. Kiam mia flamo iom mildiĝis, ŝi ankoraŭ silentis kaj mi daŭrigis: “Se vi havas fianĉon, vi devus klare diri al mi tiutempe. Via patrino kaŝis tion de mi, vi ne devus kaŝi ĝin de mi. Rigardu, vi konsentis vivi kun mi kaj promesis iri kun mi al la urbo Ŝan. Nun subite aperas Ŝja Sonlin, ĉu tio ne estas ĝena? Ĉu li povos esti asignita al la urbo Ŝan post lia militservo? Mi scias, ke militistoj ĝenerale revenos al sia hejmloko. Mi estas jam maljuna, mi ne povas regi tiom pri la aferoj de vi gejunuloj, mi ne povas...”

“Avinjo,” ŝi interrompis min. “Mi ne amas lin, kaj neniam faris ajnan promeson al li. Ni estis fianĉinigitaj ekde la infanaĝo kaj ofte ludis kune. Sed tiam mi estis en perplekseco. Vi trankviliĝu, ke mi ne promesos al li. Mi restos kun vi. Kien vi iros, mi iros.”

“Ĉu tio estas via vera penso?” Mi ne volis devigi ŝin.

“Jes, estas mia vera penso. Mi neniam promesis al li. Li venis serĉi min, mi estis tre malvarma al li. Li skribis al mi multfoje, mi nur respondis kelkfoje pro ĝentileco. Poste mi ne plu skribos al li.”



“Kio okazis inter vi kaj la junulo, kiu portis la sakon por vi?”

“Li estas mia kolego gvidata de la sama majstro. Li nomiĝas Lin Zimin. Lia familio ankaŭ loĝas en la urbo. Ĉiun sabaton posttagmeze, kelkaj el niaj samĉambranoj kaj aliaj junaj laboristoj kune transiras la riveron Baro. Ĉar tiun vesperon oni projekcios filmon en la fabriko, ĉiuj volas spekti la filmon. Mi timis, ke vi ĉagreniĝos sen mia reveno. Do mi ne restis por spekti la filmon. Lin Zimin devis iri al la memstuda kurso de kolegio, do li ankaŭ ne spektos la filmon. Tial ni ambaŭ kune veturis per la pramo.”

“Bone, ni forgesu la pasintaĵon. Mi volas memoriĝi vin, ke en la estonto estu singarda en la fabriko. Ne tro intimu kun junuloj por eviti ties miskomprenon. Estas akceptebla interrilatoj je laboro, sed ne privataj interrilatoj. Vi estas juna, nur dek naŭ jarojn. Ne konsideru enamiĝon nuntempe.”

Mi respondi al Ŝja Sonlin per nelonga letero. Unue mi konsilis al li militservi trankvile. Due mi diris al li, ke amo ne ĉiam estas glata kaj la unuflanka amo ne estas dolĉa. Baldaŭ mi ricevis lian duan leteron, en kiu li verŝis siajn pensojn kaj diris, ke en oktobro li havos libertempon, li volas viziti min kaj Fanhua tiam. Por paroli sincere, mi ne volis, ke li venu. Eble estis bone, ke li venos. Mi devos fari malkaŝan konversacion kun li, por eviti, ke la fadeno streĉiĝos longe.

(daŭrigota)



Verkis *Lao She*

Sopire al Beiping

想北平



Elĉinigiŝo *Laoyuan*

Se oni petus, ke mi verku romanon kun Beiping¹ kiel fono, mi ne timus, ĉar mi povas elekti skribi pri tio, kion mi konas, kaj eviti kion mi ne konas. Sed se oni volus, ke mi priskribu Beiping ĉiuflanke, mi ne povus. Tiel vasta estas Beiping, kie estiĝis tiom da okazaĵoj, ke mia scio pri ĝi estas vere tro malmulta, kvankam mi naskiĝis tie kaj loĝis tie ĝis la aĝo de 27 jaroj. Prenante la vidindaĵojn por ekzemplo, mi neniam vizitis la Parkon Taoranting. Kia ridindaĵo! Sekve de tio, tio, kion mi konas, estas nur “mia Beiping”, kaj mia Beiping verŝajne egalas nur al unu guto en la maro.

Sed mi ja amas Beiping. Tiu amo preskaŭ ne eldireblas. Mi amas mian patrinon. Kiel mi ŝin amas? Tio estas malfacile eldirebla. Kiam mi volas fari ion, kio plaĉus al ŝi, mi sola ridetas; kiam mi zorgas pri ŝia sano kaj maltrankviliĝas, larmoj venas en miajn okulojn. Vortoj ne sufiĉas por esprimi mian senton; nur soleca rideto aŭ larmoj sufiĉas iomete malkaŝi mian koron. Al tio similas mia amo al Beiping. Facilas laŭdi iun detalon de ĉi tiu antikva urbo, sed tio nur subtaksas la urbon. La urbo Beiping, kiun mi amas, ne kuŝas en bagateloj, sed firme staras sur granda terpeco kun multaj vidindaĵoj, parto de kies historio estas tute kunfandita kun mia animo. Kuniĝas ĉio de la libeloj ĉe la postpluvaj Shichahai-lago ĝis la ensonĝa bildo de la pagodo sur la Yuquan-monto. En ĉiu eta evento troviĝas mia rilato, kaj en ĉiu mia sopiro estas Beiping. Ĉio ĉi estas simple ne-esprimebla.

Mi vere deziras esti poeto, por trempi ĉiujn ĉarmajn kaj belajn vortojn en la sango de mia koro, kvazaŭ kukolo prikantas la majeston de Beiping. Sed ve! mi ne estas poeto! Mi neniam kapablos esprimi mian amon, amon estigitan per muziko kaj pentraĵoj. Tio malindus ne nur je Beiping, sed ankaŭ je mi mem, ĉar miaj unuaj scioj kaj impresoj venis de Beiping, kiu vivas en mia sango kaj tiele plejparto de miaj karaktero kaj temperamento donacitis de tiu antikva urbo. Mi ne povas preferi nur Ŝanhajon kaj Tianjin, ĉar en mia koro loĝas Beiping. Sed tio ne esprimeblas!

1. *Beiping*, eksa nomo de ĉina ĉefurbo Pekino (Beijing) antaŭ la jaro 1949. — *Trad.*

Londono, Parizo, Romo kaj Konstantinopolo² iam konatis kiel kvar grandaj “historiaj ĉefurboj” de Eŭropo. Mi konas iom pri Londono; Parizon kaj Romon mi nur iam vizitis; Konstantinopolon mi tute ne atingis. Inter Londono, Parizo kaj Romo, Parizo plej similas al Beiping; kvankam la vorto “similas” devas esti elparolata emfaze, tamen, se oni permesus al mi “loĝi en Parizo”, mi certe sentus min tiel soleca, kvazaŭ senhejma. Parizo, laŭ mi, estas ankoraŭ tro movoplena. Kompreneble, ankaŭ tie ekzistas apertaj kaj kvietaj kvartaloj, sed ili estas tro vastaj. Ili ne similas al Beiping, kiu estas samtempe kompleksa kaj limhava, ke mi povas percepti ĝian antikvan muregon kun ruĝaj sovaĝaj jujuboj sur ĝi! Sidante sur la ŝtono kaj rigardante la etajn ranidojn en la akvo aŭ la delikatajn libelidojn sur la fragmitaj folioj, kun vizaĝo al Jishuitan³ kaj kun dorso al la urbomurego, mi povus feliĉe sidi tie la tutan tagon, ĉar trankviliĝas mia koro, sen deziroj aŭ timoj, kvazaŭ infano dormanta en lulilo. Jes, en Beiping troviĝas ankaŭ kvartaloj movoplenaj, kie tamen regas kvieteco en la movoj, ĝuste kiel ekzercado de Tajĝiĉjŭano. En Parizo sin trovas multaj kvartaloj lacigaj, tial oni nepre trinkas kafon kaj vinon por sin stimuli; dum en Beiping sufiĉas nur la milda parfumita teo.



Londono, Parizo, Romo kaj Konstantinopolo iam konatis kiel kvar grandaj “historiaj ĉefurboj” de Eŭropo. Mi konas iom pri Londono; Parizon kaj Romon mi nur iam vizitis; Konstantinopolon mi tute ne atingis. Inter Londono, Parizo kaj Romo, Parizo plej similas al Beiping; kvankam la vorto “similas” devas esti elparolata emfaze, tamen, se oni permesus al mi “loĝi en Parizo”, mi certe sentus min tiel soleca, kvazaŭ senhejma. Parizo, laŭ mi, estas ankoraŭ tro movoplena. Kompreneble, ankaŭ tie ekzistas apertaj kaj kvietaj kvartaloj, sed ili estas tro vastaj. Ili ne similas al Beiping, kiu estas samtempe kompleksa kaj limhava, ke mi povas percepti ĝian antikvan muregon kun ruĝaj sovaĝaj jujuboj sur ĝi! Sidante sur la ŝtono kaj rigardante la etajn ranidojn en la akvo aŭ la delikatajn libelidojn sur la fragmitaj folioj, kun vizaĝo al Jishuitan kaj kun dorso al la urbomurego, mi povus feliĉe sidi tie la tutan tagon, ĉar trankviliĝas mia koro, sen deziroj aŭ timoj, kvazaŭ infano dormanta en lulilo. Jes, en

2. Konstantinopolo, eksa nomo de turka urbo Istanbul. — *Trad.*

3. Jishuitan, parto de Shichahai-lago, situas okcidente de Beiping. — *Trad.*

Beiping troviĝas ankaŭ kvartaloj movoplenaj, kie tamen regas kvieteco en la movoj, ĝuste kiel ekzercado de Tajĝiĉjŭano. En Parizo sin trovas multaj kvartaloj lacigaj, tial oni nepre trinkas kafon kaj vinon por sin stimuli; dum en Beiping sufiĉas nur la milda parfumita teo.

Oni diras, ke la aranĝo de Parizo estas multe pli bel-desegnita ol tiu de Londono kaj Romo, sed kompare al Beiping ĝi ankoraŭ iomete malpli bonas. En Beiping montriĝas naturo el homfaritaĵoj: preskaŭ neniuj terpecoj estas tro homplena, nek tro izolaj; eĉ en la plej mallarĝaj stratetoj troviĝas domoj kun korto kaj arboj; kaj la plej vastaj malplenaj spacoj ne tro malproksimas de komercaj stratoj kaj loĝkvartaloj. Tia distribuo povas esti konsiderata — laŭ mia sperto — la plej bona en la mondo. La boneco de Beiping konsistas ne en tio, ke ĉio estas perfekte ekipita, sed en tio, ke ĉie ekzistas spaco, kiu lasas homojn libere spiri; ne en la multaj belaj konstruaĵoj, sed en tio, ke ĉirkaŭ tiuj konstruaĵoj estas spaco neokupita kaj estiĝas el tio bela vidindaĵo. Ĉiun pordegan turon kaj ĉiun dekoritan arkaĵon oni povas vidi de malproksime. Kaj cetere, sur la stratoj oni povas eĉ vidi la nordajn montojn kaj la okcidentajn montojn!

Lernemuloj kaj amantoj de antikvaĵoj nature ŝatas la urbon Beiping, ĉar tie multas libroj kaj antikvaĵoj. Mi ne estas lernema, nek havas monon por aĉeti antikvaĵojn. Sed materiale mi amas Beiping pro la abundeco de floroj, legomoj kaj fruktoj. Plantado de floroj kaj herboj estas multekosta ŝatokupo, sed la lokaj “floroj kaj herboj” estas tre ĉipaj, kaj ĉiu domo havas korton, tiel ke oni povas priplanti la tutan korton per floroj sen elspezi tro multe. Eĉ se tio ne estas io impona, tio ja estas ĉarmiga! La konvolvuloj sur la muroj, la bambuoj kaj jasmenoj ĉe la murbazo, kvankam ŝparemaj kaj facile prizorgitaj, ili tamen sufiĉas por allogi papiliojn! Kaj plejparton de la legomoj, kiaj la lokaj brasikoj, lentoj, freŝaj sojfaboj, kukumoj, spinacoj ktp, oni alportis de antaŭurbo rekte ĝis la dompordo. Post pluvo, la folioj de poreoj ofte havas sur si ŝprucigitajn kotmakulojn. Preskaŭ poezie belas la verdaj kaj ruĝaj amasoj sur la legom-standoj. Ne malmulte da fruktoj venas de la okcidentaj montoj kaj la nordaj montoj: la sovaĝaj pomoj kaj malusoj el okcidentaj montoj, la nigraj jujuboj kaj la persimonoj el la nordaj montoj — ĉiuj eniras la urbon ankoraŭ kun blanka prujno sur si! Hm, la oranĝoj el Usono, envolvitaj en papero — ĉu ili ne hontus antaŭ la prujn-kovritaj prunoj el Beiping?!

Estas vere, ke Beiping kiel ĉefurbo produktas tiom da propraj floroj, legomoj kaj fruktoj, kio pliproksimigas homojn al naturo. Interne, al la urbo mankas la tuttage fumleviĝantaj fabrikoj kiel en Londono; kaj ekstere, la urbo limtuŝiĝas kun ĝardenoj, legomejoj kaj kamparo. “Krizantemojn, en hejma proksimo, ĉe l’ eosta heĝo mi kolektas”⁴ — ĉi tie en miaj okuloj vere refleksiĝas la sudaj montoj. Eble eĉ se oni ŝanĝus la vorton “sudaj” al “okcidentaj” aŭ “nordaj”, tio ne estus tro grava. Por malriĉulo kiel mi, eble nur en Beiping oni povas ĝui iom da feliĉa vivo.

Nu, mi ne plu parolos; larmoj preskaŭ verŝiĝas el miaj okuloj. Kiel mi sopiras al Beiping!


4. La tradukon de ĉi tiu verso faris s-ro Vejdo, fama ĉina tradukisto de Esperanto. — *Trad.*



aŭtorino, *Pearl S Buck*
(Usono)

Vento orienta – Vento okcidenta (5)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 002*



elangligis *Detlef Karthaus*
(Kanado)

ĈAPITRO 7

Kiam mi nun konsideras la pasintecon, mi konscias ke mia edzo ekinteresiĝis pri mi tiun vesperon. Ŝajnis ke antaŭe ni havis nenion pridiskutendan. Niaj pensoj neniam renkontiĝis; mi povis nur observi lin, miri kaj ne kompreni, kaj li neniam rigardis min. Nia interparolado okazis kun la ĝentileco de fremduloj; Mi estis sinĝena antaŭ li, kaj lia sinteno estis de zorga ĝentileco, kiu preterrigardis min. Sed nun kiam mi bezonis lin, li finfine vidis min, kaj kiam li parolis li pridemandis min kaj interesiĝis pri mia respondo. Miaflanke, la amo kiu estis tremanta en mia koro firmiĝis al adorado en tiu momento. Mi neniam imagis ke viro povus trakti virinon tiel humile kaj molkore.

Kiam mi demandis lin pri kiel malbindi la piedojn, mi kompreneble pensis, ke li nur donus al mi instrukciojn baze de sia medicina scio. Mi estis do mirigita kiam li mem alportis pelvon da varma akvo kaj rulon da blanka bandaĝo. Mi hontis. Mi ne povis elteni, ke li vidu miajn piedojn. Neniu vidis ilin ekde kiam mi estis sufiĉe aĝa por mem flegi ilin. Nun, kiam li metis la pelvon sur la plankon kaj genuiĝis por preni miajn piedojn, mia tuta korpo brulis.

“Ne”, mi diris mallaŭte. “Mi mem faros tion.”

“Vi devas ne ĝeni vin”, li respondis. “Mi estas kuracisto, memoru.”

Tamen mi rifuzis. Tiam li necedeme rigardis rekte en mian vizaĝon.

“Kŭei Lan”, li diris serioze, “Mi scias, ke fari tion por mi ne facilas al vi. Lasu min helpi vin tiom kiom eble mi povas. Mi estas via edzo.”

Tiam, senvorte mi cedis. Li prenis mian piedon kaj milde forprenis la ŝuon, la ŝtrumpon kaj malbindis la internan tukon. Lia esprimo estis malfeliĉa kaj severa.

“Kiel vi suferis!” li diris en malalta, tenera voĉo; “kia mizera infaneco, kaj ĉio por nenio!” Larmoj plenigis miajn okulojn pro tiuj vortoj. Mian tutan oferon li taksis senutila, kaj eĉ postulis novan oferon!



Ĉar kiam miaj piedoj estis trempitaj kaj rebinditaj pli malstrikte, komenciĝis netolerebla suferado. Fakte la malbindado estis preskaŭ tiel doloriga kiel estis la bindado. La piedoj al kutimiĝinta al malvastiĝo nun iom post iom grandiĝetis, kaj la sango komencis cirkuli.

Kelkfoje dum la tago mi tiris la bandaĝon kun la intenco malvolvi ilin kaj bindi ilin pli strikte por malakrigi la doloron; kaj tiam la penso ke mia edzo eksciis pri tio en la vespero devigis min remeti ilin per tremantaj manoj. La nura maniero mildigi la doloron estis sidi sur la piedojn kaj balanci tien kaj reen.

Mi ne plu zorgis pri kiel mi aspektis antaŭ mia edzo. Mi ne plu rigardis en la spegulon por vidi ĉu mi estis freŝa kaj bonordita. Nokte miaj okuloj estis ŝvelintaj pro plorado kaj mia voĉo raŭka pro plorĝemo, kion mi ne povis regi. Estis strange, ke kiam mia beleco ne povis movi lin, mia mizero sukcesis. Li konsolis min kvazaŭ mi estus infano. Mi alkroĉigis min al li, ofte sen konscii, pro mia doloro, kiu aŭ kio li estas.

“Ni eltenos tion kune, Kŭei Lan”, li diris. “Estas malfacile vidi vin tiel suferi. Provu pensi, ke ni faros tion ne nur por ni, sed ankaŭ por aliaj kiel protesto kontraŭ olda malbona afero.” “Ne!” mi plorĝemis, “Mi faros tion nur por vi, por esti moderna virino laŭ via plaĉo!”

Li ridis kaj lia vizaĝo heliĝis iomete, tiel kiel okazis kiam li parolis al tiu alia virino. Tio estis mia rekompenco por doloro. Post tio, nenio ŝajnis tiel malfacila.

Kaj certe, kiam la karno fariĝis pli sana, mi komencis sperti novan liberecon. Mi estis juna kaj miaj piedoj ankoraŭ sanaj. Ofte en pli maljunaj virinoj la piedoj gangreniĝas kaj foje eĉ forfalas. Sed la miaj estis nur sentataj. Nun mi komencis marŝi pli libere, kaj la ŝtuparoj ne estis tiel malfacile grimpeblaj. Mi sentis pli da forto tra mia tuta korpo. Unu vesperon mi senpense kuris en la ĉambron, kie mia edzo sidis skribante. Li surprizite levis la okulojn kaj lia tuta vizaĝo ekridetis.

“Vi kuras! li ekkriis. “Bone, do, ni preterpasis la plej gravan fazon, kaj la amaraĵo estas manĝita²².”

Mi rigardis miajn piedojn surprizite.

“Sed ili ankoraŭ ne estas tiom grandaj kiel tiuj de s-ino Liu”, mi diris.

“Ne, ili neniam estos tiel”, li respondis. “Ŝiaj piedoj estas naturaj. La viaj estas tiel grandaj kiel nun eblas.”

Mi sentis malĝojeton, ke miaj piedoj neniam povus esti grandaj kiel ŝiaj. Sed mi elpensis manieron elturniĝi. Pro tio ke miaj etaj broditaj ŝuoj estis nun senutilaj, mi firmdecidis havigi al mi novajn ledajn ŝuojn kiel tiuj de s-ino Liu. La sekvantan tagon, do, mi iris kun servisto al butikoj kaj aĉetis paron da ŝuoj kiuj havis la deziratan grandecon. Ili estis je du koloroj pli grandaj ol miaj piedoj, sed mi remburis la ŝupintojn per kotono. Kiam mi surmetis la ŝuojn neniu sciis, ke mi havis binditajn piedojn.

Mi ege deziris, ke s-ino Liu vidu ilin, kaj mi demandis al mia edzo kiam ni povus fari respondviziton.

“Mi iros kun vi morgaŭ”, li diris.

Mi estis surprizita, ke li volonte akompanus min sur la strato. Tio certe ne estas konforma al bona moro, kaj tio ĝenis min nemalmulte, sed ĝis nun mi jam al kutimiĝis pli al liaj strangaj agmanieroj.

Ni do iris la venontan tagon, kaj mia edzo traktis min plej afable dum ŝia ĉeesto. Verdire, li ege konfuzis min unu aŭ dufoje, kiam ekzemple li devigis min eniri antaŭ li en la ĉambron, kie troviĝis s-ino Liu. Mi ne komprenis la signifon tiutempe. Reveninte hejmen, li klarigis, ke tio estas la Okcidenta kutimo.

“Kial?” mi demandis. “Ĉu estas ĉar tie, laŭ tio, kion mi aŭdis, viroj estas subranguloj rilate al virinoj?”

“Ne”, li respondis, “tio ne pravas.”

Tiam li klarigis tion al mi. Tio originas, li diris, en malnova sistemo de ĝentileco kiu komenciĝis en arkaikaj tempoj. Tio tre mirigis min. Mi ne sciis ke ekzistas malnova gento krom nia, tio estas, civilizitaj homoj. Sed laŭŝajne fremduloj ankaŭ havas historion kaj kulturon. Ili tial ne estas komplete barbaraj. Mia edzo promesis legi al mi kelkajn librojn pri ili.

Mi sentis min feliĉa tiun vesperon, kiam mi enlitiĝis. Estis interese fariĝi iomete pli moderna, ĉar mi ne nur portis miajn ledajn ŝuojn tiutage, sed mi ankaŭ ne ŝminkis mian vizaĝon, nek metis ornamaĵojn en la hararon. Mi tre similis al s-ino Liu. Mi certas, ke mia edzo notis tion.

Ŝajnis ke tuj kiam mi pretis ŝanĝiĝi, tute nova vivo superŝutis min. Mia edzo parolis kun mi dum la vespero, kaj lia konversacio estis al mi tre ekscita. Li scias ĉion. Jo-A! La strangaĵo kiujn li rakontis al mi pri la eksteraj landoj kaj iliaj enloĝantoj! Li ridis kiam mi ekkriis:

²² En la originalo “the bitterness is eaten” estas laŭvorta traduko de ĉina esprimo 吃苦 kiu signifas “elteni malfacilaĵon”.

“Ho, kiel drola, kiel stranga!”

“Ne pli stranga ol ni ŝajnas al ili”, li diris, kaj ial tio amuzis lin.

“Kio!” mi kriis denove mirigite. “Ĉu ili taksas nin drolaj?”

“Certe”, li respondis, ankoraŭ ridante. “Vi devus aŭdi ilin paroli! Ili opinias ke niaj vestaĵoj estas komikaj kaj niaj vizaĝoj kaj niaj manĝaĵoj kaj ĉion, kion ni faras. Tute ne kaptas ilin la ideo, ke homoj povas aspekti kiel ni, agi kiel ni, kaj esti komplete homa kiel ili mem.

Aŭdi tion tre mirigis min. Kiel ili povas konsideri ke iliaj strangaj aspektoj, vestaĵoj, kaj konduto estas tiel homaj kiel niaj. Mi digne respondis:

“Sed ni ĉiam faris tiel, kaj havis ĉi tiujn tradiciojn, kaj aspektis kiel ni aspektas kun nigraj haroj kaj okuloj”.

“Ekzakte! La samo valoras por ili!”

“Sed mi pensis ke ili venis al nia lando por akiri civilizacion. Mia patrino ja diris tion.”

“Ŝi eraris. Fakte, mi kredas ke ili venas ĉi tien por instrui al ni pri civilizacio. Estas multe kion ili povus lerni de ni, tio veras, sed ili konscias pri tio same malmulte kiel vi konscias, ke ni devas lerni de ili.

Certe ĉio estis tre nova kaj interesa, kion li rakontis. Neniam lacigis min aŭdi pri la fremdlandanoj, kaj mi aparte ĝuis aŭdi pri ĉiuj iliaj mirindaj inventaĵoj: pri turnado de tenilo por havigi al si varman aŭ malvarman akvon, kaj pri forno funkcianta sen ajna videbla brulaĵo, kaj tamen ĝui tiun de-si-mem-venanta akvo kaj de-si-mem-venanta varmo kiel oni nomas tion. Kaj kiel mirigita mi estis kiam li rakontis pri maŝinoj sur la maro kaj aliaj, kiuj flugis tra la aero kaj sub la akvo kaj pri multaj similaj mirindaĵoj!

“Ĉu vi certas, ke ne temas pri magio?” mi time demandis. “La malnovaj libroj parolas pri mirakloj de fajro kaj tero kaj akvo, sed ili ĉiam estas la magiaj artifikaĵoj de kreaĵoj parte feinaj.”

“Ne, certe ne estas magio”, li respondis. “La afero estas tre simpla kiam oni komprenas kiel oni faras tion. Tio estas scienco.”

Tiun sciencon refoje! Tio pensigis min pri mia frato. Pro tiu scienco li ankoraŭ restas en tiuj fremdaj landoj, manĝante ilian manĝon kaj trinkante ilian akvon, al kiuj lia korpo ne al kutimiĝis ekde naskiĝo. Mi fariĝis tre scivolema pri ĉi tiu scienco, kaj mi scias kiel ĝi aspektas. Sed kiam mi diris tion al mia edzo li multe ridis.

“Kia infano vi estas!” li kriis mokante min. “Ĝi ne estas tuŝeblaĵo, kiun oni povas manipuli kaj ekzameni kiel ludilo.”

Tiam, konsciinte ke mi komprenis nenion de tio, kion li diris, li iris al la librobreto kaj prenis kelkajn librojn kun bildoj sur la paĝoj, kaj li komencis klarigi al mi multajn aferojn.

Ekde tiam, ĉiun vesperon, li instruis al mi pri scienco. Ne mirindas, ke mia frato pri tio entuziasmiĝis, tiel ke li eĉ ne atentis la dezirojn de sia patrino, sed kontraŭe transvojaĝis la Pacan Maron serĉante ĝin. Mi mem sentis min ensorĉigita kaj sentis mian saĝecon mirinde kreski. Mi devis finfine rakonti tion al iu, kaj havante neniun alian, mi parolis al nia maljuna kuiristino.

“Ĉu vi scias”, mi demandis al ŝi, “ke la mondo estas ronda, kaj ke nia granda lando, finfine, ne estas en la centro, sed estas nur peco da tero kaj akvo sur ĝia ŝelo, kune kun aliaj landoj?”

Ŝi estis lavanta rizon en la eta baseno de la kuireja korto, sed ŝi ĉesis skui la pelvon kaj suspekto rigardis min.

“Kiu diras tion?” ŝi demandis maleme esti konvinkita.

“Nia mastro”, mi diris firme. “Ĉu vi nun kredos min?”

“Ho”, ŝi respondis dube, “li multe scias. Tamen, oni konstatas, ke la mondo ne estas ronda nur rigardante ĝin. Vidu, se vi grimpos al la pinto de la pagodo sur la Monteto de la Norda Stelo, vi povas vidi mil mejlojn da montoj kaj kampoj, lagoj kaj riveroj, kaj ĉio estas tiel plata kiel tavolo da sekigita sojkazeo, krom la montoj, kaj neniu povus diri ke ili estas rondaj! Rilate nian landon, ĝi devas esti en la mezo. Alikaze kial la saĝaj antikvuloj, kiuj sciis ĉion, nomis ĝin la Meza Regno?” Sed mi estis avida daŭrigi.

“Pli ol tio”, mi aldonis, “la tero estas tiom granda, ke oni bezonas tutan lunciklon por atingi la alian flankon, kaj kiam noktas ĉi tie, la suno brilas tie.”

“Nun mi scias, ke vi malpravas, mia mastrino”, ŝi kriis triumfe. “Se oni bezonas tiom da tagoj en unu monato por atingi la aliajn landojn, kiel la suno povas fari tion en kelkaj horoj kiam ĝi bezonas tutan tagon por travojaĝi la mallongan spacon inter Purpura Monto kaj la Okcidentaj Montetoj?” Kaj ŝi rekomencis skui la pelveton de rizo en la akvo.

Sed verdire mi ne povis kulpigi ŝin pro ŝia nescio; ĉar el inter ĉiuj strangaĵoj, kiujn mia edzo rakontis al mi, la plej stranga estas ĉi tiu, ke la Okcidentaj popoloj havas la samajn tri grandajn ĉiellumojn kiujn ni havas, la sunon, la lunon kaj la stelojn. Mi ĉiam kredis, ke Pangu, la dio kreanta, faris ilin por la ĉinoj. Sed mia edzo estas saĝa. Li scias ĉion, kaj li eldiras nur tion, kio estas vera.

Kvin poemoj de John Huang

Super la Ĉielo



John Huang

En vasta bluo, sen land' nek muroj,
flugas la reĝo kun majestaj flugoj.
Rigardas li mondojn de silenta alto,
kun ora beko kaj kor' sen laco.

Li sentas la venton kiel fidan amikon,
kaj kantas la kanton de l' tera ritmo.
Ne bezonas vojon, ne mapas limon —
ĉar la ĉielo estas lia kulmino.

Krias li ne el timo, sed ĝojo,
kun vido akra kaj penso sen soifo.
La aero ĉirkaŭ ne estas barilo,
sed danco de vivo — libera spiro.

Ho aglo kuraĝa, spirito de vento!
vi montras al ni la vojon de sento:
leviĝi super la honto kaj timo,
kaj fiere flugi — ĝis sunluma limo.



Belulino


John Huang

Jen bildo kun poeta animo,
inspiro de ĉarma belulino;
en urbo kun brila historio,
esper' kiel stela destino.



Sub la buntaj ombreloj

Sur strat' kun ĉiel' da ombreloj buntaj,
paŝadas amikoj kun koroj kunligitaj;
rid' en la aero, lumo tra koloroj,
viv' plenigita je paco kaj sonĝoj.



致海嘉

美丽海嘉碧影，
柳下清荫庇身。
含笑容光明亮，
心坚如石至真。



© John Huang Photography

Al Helga

John Huang

Bela Helga, verda,
Sub saliko ŝirma,
Kun rideto hela,
Kaj animo firma.

Pentristino

John Huang

Vi estas talenta, kuraĝa,
Pentristino kreema, sen timo.
Kun la peniko, kiu brilas,
Vi venkas la sorton sen limo.



女画家

才华勇敢志高昂，
艺海无惧展华章。
画笔生辉光万丈，
笑看浮生命自强。

Gasto John, verda fotisto

Sub saliko ŝirmata ideo

Kun rideto kiel suno

Feliĉigis Helgan animon.

Li parolis flue Esperanton

Komprenis bone en harmonio

Vidis interese la bildojn

De pentristino en atelejo.

Li volas reveni post UK en Aŭstrio

Ĉar plaĉis en Arta Domo


Kaj en naturo de trankvila urbeto

Promenis ĝis bela lageto.

Al John



Helga Plötner



Letero el Helga



Helga Plötner

Ni Volas pacon



Wilo - Walter Gropius

Ni volas pacon.

Kara John, kara Erika,
kara Jasuo dankon,
legu sube, mia japana amiko HORI Jasuo
respondis al via poemo pri mi Al Helga kaj mia
poemo pri vi Al John kun tiu poemo pri mi, kara
Helga.

Ĉu tiu **poemo de HORI Jasuo** ankaŭ bonvenos al
tiu LITERATURA VIVO?

Mi proponas mian bildon **NI VOLAS PACON!**
kun 3 infanoj kun la blanka kolombo.
Tiu bildon mi pentris 12 jara,
kaj tiun foton pri mi Sub la saliko verda...

Ĉu tiu pacbildo estas ene en MIA PENTRISTA VIVO
POR ESPERANTO KAJ POR PACO! ? Jes.

ĈU en ESPERANTO POR MI, 16
GEESPERANTISTOJ....en iu numero?
Jes, en blua n-ro 3. Turnu ĝin, mi petas...

Kaj animo paca. Tio plaĉas al mi!!!

Legu sube de *HORI Jasuo*

Kara Helga

**Bela Helga, verda,
Sub saliko verda,
Kun rideto verda,
Kaj animo paca.**

Fartu bone! Havu belan merkredon.

Amike viaj dankema Helga



Jasuo Hori

Ni Volas pacon



Erika Godó

Ne estu plu militoj en la mondo.
Sufiĉe da morto, sufero profundo.
Unu homo ne devas mortigi alian.
Sufiĉe da sango, sufiĉe da malbonaj jam.
Estu finfine paco en la koroj de homoj.
Estu fino de milito ĉie por ĉiuj.
Kaj la amo regu, en la tero eterna.



KREDO

Helga Plötner



Helga ricevis kiel bebo en la urba evangelia preĝejo SANKTA MARIA la bapton per sankta akvo sur la kapeton en la nomo de la PATRO, DE LA FILO KAJ DE LA SANKTA SPIRITO. Vidu la historian baptopelvon kaj tiun preĝejon.

Helga sentis sin gardata en sia vivo tra multaj malsanoj. La patrino, evangelia kredantino, preĝis kaj instruis al la infano Helga preĝi: "Mi estas malgranda, mia koro estu pura, neniu alia en mi loĝu ol Jesuo sola."

Tion la infano ne vere komprenis, sed ŝi preĝis tion ĉiuvespere. Antaŭ la manĝo ili preĝis: "Venu SINJORO kaj estu nia gasto kaj benu, kion vi donis al ni, AMEN!"

Ĉiun dimanĉon antaŭtagmeze Helga iris al tiu preĝejo al la Infana Diservo kun bunta karteto, en tiu la afabla "Fratino Margarete" konfirmis la ĉeeston de Helga.

Kun prunedonita kantolibro Helga ŝatis kanti en akompano de laŭta orgeno. La longa parolado de la pastro enuigis la infanon Helga, ĉar ŝi ne ĉiam komprenis vere la enhavon, pri kiu li parolis. Je la fino de la diservo Helga ĝojis esti libera ekstere en la aero kaj varma suno.

14-jara kun la duono de siaj lernantoj de sia 8-a klaso ŝi havis KONFIRMACION en tiu preĝejo. Ili iris al la Junularaj horoj en la Paul Gerhardt Domon. Tiu Paul Gerhardt estis fama kantopoeto, tiu naskiĝis en la hejmurbo de Helga Gräfenhainichen. Plej plaĉis al Helga la kanto: "Iru ekstren mia koro kaj serĉu ĝojon, en tiu bela somera tempo..."

Duonan jaron antaŭe ŝi ricevis la devigan JUNULARAN KONSEKRON kun ĉiuj lernantoj de sia 8-a klaso. Ĉiuj ricevis grandan dikan libron « KOSMO, TERO, HOMO », tiun Helga legis kaj rigardis la fotojn kun intereso.

Ŝi fariĝis en ĉiu scio malferma - mense, tolereme kaj ŝi ŝatis la SCION kaj lernadon. La scion pri la Biblio ŝi ŝatis precipe por kompreni entute la arton.

Kiel plenkreskulo Helga ŝatas iri dum Kristnasko en la preĝejon pro la teatra Kristnaska ludo de infanoj. Kiam Helga estis 16-jara, ŝi mem ludis la rolon de MARIA en velur-vinruĝa robo deklaminte longan poemon, kiun ŝi lernis parkere.

La frato Dieter de Helga venis per motorciklo de fora urbo Zittaŭ por vidi ŝin. Tie li studis inĝenieron. Ili festis kune Kristnaskon. Ĉiun Kristnaskon la patro kun Helga ludis per mandolino kaj la patrino kun bona voĉo kantis kun Helga belajn Kristnaskajn kantojn antaŭ la disdono de la donacoj.

En Helga ĉiam regis KREDO, AMO KAJ ESPERO.



La Nigra Damo

La nigra damo kuŝiĝas sur la Teron.
Ŝia blanka okul' malfermas.
Ŝi kuŝas, sed ne dormas.
Ŝi zorgas pri niaj songoj.

De tiu damo la silento estas koramik',
kaj la steloj kaj planedoj, ŝiaj gefiloj.
Varma koro ŝi kelkfoje havas,
frostan animon ŝi kelkfoje esprimas.

Ŝia regno estas mallonga,
ĉiutage ŝi trovas la malvenkon.
Sed, kiel malhelblua feniks',
je la fino de la tag'
ŝi denove estas reĝin'.



Carlos Devizia



ALFAMA

Huby Romero



La Augusta Strata Arko staras solene malantaŭ ni.
Lumas ĝi kun aŭro de amo forfluanta al la steloj.
Krepuska ventet' blovetas riveranaroman incenson inter la moleaj kolonoj.
Juna paro dancas senzorge sub purpuriĝanta somera ĉielo.
Fado melankolie vaporigās el Alfama, ŝvebante super la malnova kvartalo.
Maljunulina voĉo kantas pri tio, kio iam eblis sed neniam okazis.
Ŝia lamento alvokas nin al serpentumaj stratetoj.
Mi tenas vian manon en mia mano, dum ni sencele vagas sub malklaraj stratlanternoj.
Ni preterpasas tiun kvietan kafejeton, kiun ni ĉiam tiel ĝuis.

Ununura korbato. Longa elspiro. Senfina palpebrumo.

La nokta urba pejzaĝo ĉirkaŭbrakas nin.

Sidante apude sur benko, ni tenere kisas unu la alian, dum elegantaj jakarandaroj silente nin envias.

Mia Dio, ĉi tiu momento daŭru eterne!

Sed ve! Miaj esperoj vojaĝas lumjarojn kaj perdiĝas en la nekonatecon.

Miaj okuloj malfermiĝas.

Mi ja scias, ke mi neniam plu revidos vin.

Aliloke, alitempe, la vivo fluas senhalte.

Sed ĉi tie, en ĉi tiu loko, ni eterne estos kune.



La Sorto de Aina

Ranja Zafinifotsy



Mi nomiĝas Aina Rafenontsoa, sed ĉiuj nomas min Aina. Aina estas malagasa nomo, kiu signifas vivon. Unue mi ne sciis, ke mi ne havas veran patron aŭ patrinon, kaj mi eĉ ne sciis, ke mi devis havi ilin. Mi edukiĝis en vartfamilio. Mia adopta patrino diris al mi, ke mi havis ĉirkaŭ du jarojn, kiam ŝi levis min de la strato. Mi diras „levis“, ĉar miaj veraj gepatroj forĵetis min kiel rubon. Mia naskiĝdato estis nekonata, do mia nova panjo elektis la 18an de julio kiel mian naskiĝtagon. Ŝi rakontis al mi mian historion, kiam mi havis 12 jarojn. Mi estis malĝoja, sed tia estas la vivo. Ŝi vidis, kiom multe mi suferis pro ĉio ĉi, kaj klarigis al mi, ke ne gravas, ĉu oni havas verajn gepatrojn aŭ ne, se estas iu, kiu amas nin kaj zorgas pri ni. Mi povas diri, ke mi tre ŝatas mian patrinon, ŝi estas bonkora kaj tre bela. Kvankam mi ne estas ŝia vera filino, ŝi ĉiam donis al mi la amon kaj teneron, kiujn mi bezonis. Ŝi ĉirkaŭbrakis min kaj ĵuris, ke mi estas la plej kara, kiun ŝi havas en la mondo.

Ŝi havas ankaŭ du aliajn infanojn: Tendry kaj Valisoa (kiu signifas donaco). Mi amas ankaŭ ilin, same kiel ili amas min. Ni estis kiel veraj gefratoj, kvankam kelkfoje mi sentas malplenon en mi, tiun malplenon, kiu konstante memorigas min, ke mi estas nur adoptita knabino kaj ke venos la tago, kiam ili laciĝos de mi kaj elpelos min. Sed ĝis tiam, tiu tago neniam alvenis. Male, la ligo, kiu fortigis nin, kreskis tagon post tago. Mi nur feliĉis; ankaŭ ili feliĉis pri mia ĉeesto.

Unu tagon, la suno jam subiris, kaj la nokto jam komencis fali, mi kaptis panjon plorantan. Mi tuj pensis, ke eble pro mi ŝi ploras, mi scivolis, kian stultaĵon mi faris? Kaŝiĝinte malantaŭ la pordo, mi rigardis ŝin. Tiam ŝi elprenis foton, mi ne sciis, kiu estas sur la foto, sed ŝi komencis flustri ĉe la foto. Tiam mi konstatis, ke tiu foto estis la kaŭzo de ŝiaj larmoj, ne mi.

Ŝi metis la bildon sur la tablon, jen mi vidis viran vizaĝon; paĉjo! Li estis sufiĉe forta kaj bela, kiel la herooj en la filmo. Li havis fosilon en sia dekstra mano. Mi malĝojis vidante panjon plori, sed miaj piedoj frostiĝis, mi ne povis eniri. Sed eble panjo sentis mian ĉeeston, ŝi turnis sin kaj vidis min:

- „Kara, kion vi faras ĉi tie?“, panjo diris sekigante siajn larmojn.
- „Nenion, panjo, mi nur paŝis laŭ la antaŭĉambro kaj vidis vin plori.“
- „Ho pardonu, knabino. Vi ne devus vidi tion ĉi.“
- „Panjo, diru al mi, ĉu paĉjo mortis pro mi?“
- „Kio? Kion vi diras, kara?“
- „Diru al mi, panjo.“
- „Sed ne. Kial vi diras tiajn sensecaĵojn? Aŭskultu, via paĉjo mortis, ĉar li volis.“
- „Kion vi celas?“
- „Vi komprenos, kiam vi estos sufiĉe granda kaj matura.“
- „Sed mi jam estas granda kaj matura, panjo.“

- „Ne, karulo, nur via korpo estas granda, sed mankas al vi ankoraŭ matureco de la spirito. Nun iru al via ĉambro kaj prilaboru viajn lecionojn.“

- „Mi kuiros unue.“

- „Ne, ne. Mi faros. Vi studos.“

- „Bone.“

La jaroj pasis tro rapide, la tempo forflugis kaj nia vivo malpliboniĝis de tago al tago. Panjo maljuniĝis, kaj niaj studoj ne plu progresis bone, ĉar problemoj nin persekutis. Estis tagoj, kiam ni manĝis nenion, kio signifas, ke kompleta malriĉeco nin trafis.

Tial venis al mia kapo ideo: Mi pensis ĉesi studi, kaj eklabori. La salajro de panjo jam ne sufiĉis por ni, kaj plie ŝi malsaniĝis preskaŭ ĉiutage, dum ŝia salajro baziĝas sur ŝiaj labortempoj.

Unu sabaton, kiam ĉiuj ankoraŭ dormis profunde, mi iris al la kamparo. Antaŭ ol mi foriris, mi lasis noton sur la tablo por ne maltrankviligi ilin.

Mi pasigis mian tutan tagon promenante en la arbaro. Mi pensis pri tio, kion mi faru por helpi mian patrinon, ĉar ŝi ĉiam diris al mi, ke la ĝusta decido estas en naturo kaj silento. Antaŭe, mi ankoraŭ ne certis, ĉu mi volas ĉesi studi, sed en la arbaro mi vidis la aferon pli klare. Mi devis fari tion. Estos malfacile, mi diris al mi, sed mi faros.



Vespere, kiam mi revenis hejmen, miaj frato kaj fratineteto atendis min ekster la pordo, kun siaj vizaĝoj torditaj kaj rigardantaj al la spaco. Kiam ili vidis min, iliaj vizaĝoj brilis kaj ridetis.

- „Kie vi estis, fratino?“, Tendry demandis.

- „Mi ĵus serĉis iom da freŝa aero.“

- „Ĉu por preni freŝan aeron?“, li scivolis. „Dum tuta tago?“

- „Jes, Tendry. La aero estis tiel freŝa tie, kien mi iris, ke mi ne vidis la tempon pasi.“

- „Panjo atendas vin interne“, balbutis Valisoa.

- „Jes, Valisoa, mi venas.“

Panjo sidis en la salono. Jen kion mi nomas loĝoĉambro tie, ĝi estas preskaŭ malplena ĉambro, du seĝoj, kafotablo kaj malnova televidilo. Jen ĉio, kio estis tie.

- „Panjo, Valisoa diris al mi, ke vi volas paroli kun mi.“
- „Jes, sed antaŭ ĉio, ĉu mi povas scii, kion vi faris en la kamparo la tutan tagon?“
- „Fakte...“
- „Vi scias, ke mi maltrankviliĝis. Mi eĉ pensis, ke vi ne revenos.“
- „Mi bedaŭras, panjo. Mi promesas, ke mi ne faros tion denove.“
- „Bone, mi fidas vin kaj ne perfidos vin.“
- „Jes, panjo.“
- „Fakte, mi havas vere bonajn novaĵojn por diri al vi, venu sidiĝi.“
- „Mi aŭskultas vin.“
- „Rigardu tiun ĉi gazeton, kiu anoncas, ke familio serĉas purigistaron por labori nur tage.“
- „Montru al mi. Mi provos mian sorton tiam.“
- „Kio? Kaj viaj studoj? Vi havas nur 15 jarojn, Aina.“
- „Mi pensis, ke vi serĉas laboron por mi.“
- „Ne. Ĝi estas por mi. Mi forlasis mian malnovan laboron, ĝi estas tro laciga, kaj mi ne plu estas tro juna.“
- „Panjo, mi pensas, ke vi ne plu laboru. Vi apenaŭ povas stari sur viaj gamboj lastatempe.“
- „Kaj kiu manĝigos nin, diru al mi?“
- „Mi. Ne koleru, panjo, sed mi forlasos la lernejon definitive. Mi laboros ekde nun.“
- „Mia karulino, ĉu vi rimarkas, kion vi diras? Vi ne scias, ke laborigi neplenaĝulojn estas malpermesite laŭ leĝo.“
- „Mi scias tion, tamen estas multaj neplenaĝuloj, kiuj laboras, sed la leĝo ne zorgas.“
- „Sed mi zorgas.“
- „Panjo, mi petas. Mi vidas, ke vi multe suferas kaj via malsano pli kaj pli fortiĝas, do lasu min provi ĉi-foje.“

La diskuto preskaŭ ne finiĝis. Mi estis obstina, kaj panjo eĉ pli. Sed finfine, ŝi konsentis provi tion. Mi estis tiel feliĉa, mi diris al mi, ke se mi penos, mi gajnos sufiĉe da mono, kaj Tendry kaj Valisoa neniam devos dormi malsataj denove.

Estis jam preskaŭ noktomezo. Ĉio estis tiel trankvila en la ĉirkaŭaĵo. Eĉ la hundoj, kiuj bojis ĉiunokte, ŝajnis esti for. Kia senŝarĝiĝo! Mi ne povis forigi la ideon iri labori la sekvan tagon. Mi karesis la densajn harojn de Valisoa, imagante, kia estos mia unua labortago. Mi esperis nur, ke la estro dungos min, alie ĉiuj miaj revoj detruigis.

(daŭrigota)

Interjuvo kun Ranja Zafinifotsy

Erika Godo



Ranja Zafinifotsy

Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Ekde mia infanaĝo miaj gepatroj instigis min legi librojn: romanoj, literaturaĵojn, lernolibrojn, ktp. Tio helpis min lerni precipe lingvojn — la francan kaj la anglan. Komence mi ekŝatis verki poemojn en la malagasa lingvo. Poste venis al mi la ideo verki romaneton en la franca.

Kiam vi verkis vian unuan rakonton?

En 2013, kiam mi estis 16-jaraĝa, mi verkis *La sorto de Aina* en la franca, sed mi ne finis ĝin pro multaj kialoj. En 2022, kun la kuraĝigo de Ulrich Matthias, esperantista amiko el Germanio, mi tradukis tiun rakonton en Esperanton. Ĝi aperis rete kiel simpla teksto.

Kio estas la fonto de via inspiro por verki rakontojn?

Mi ne havas unu solan fonton de inspiro, sed mi povas diri, ke mi inspiriĝas el mia vivo kaj mia ĉirkaŭaĵo.

Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?

Jes. Mi aparte ŝatas la temon de amikeco inter homoj el diversaj mondopartoj, ĉar mi revas pri harmonio ĉie, pri paco kaj amo. Tial mi verkas en Esperanto, ĉar mi kredas, ke ĝi estas bona komunikilo kaj ebla solvo por la mondo, se ni iam sukcesos fari ĝin la ĉefa internacia lingvo.

Ĉu vi povus rakonti al la legantoj iom pri vi mem?

Mi naskiĝis en 1996 kiel la plej juna el ses infanoj en kamparana familio en la suda parto de Malagasio. En 2014 mi translokiĝis al la ĉefurbo Antananarivo, kie mi studis administradon de neregistaraj organizoj. Ekde 2018 mi laboras kiel direktorino de lernejo por malriĉaj infanoj, gvidata de franca rektoro. Mi ankaŭ verkas teatraĵojn en la malagasa lingvo, kiuj estas dissenditaj per radiostacio en Antananarivo. Mi eklernis Esperanton en 2018, kaj kvar jarojn poste mia debutverko en Esperanto estis la rakonto *La sorto de Aina*.

Via libro *Kiel herbo en la vento* baldaŭ publikiĝos. Ĉu vi povus diri al ni, pri kio temas la libro?

Kiel herbo en la vento estas romaneto parte bazita sur mia aŭtobiografio, sed ne tute, ĉar mi aldonis elementojn por beligi la rakonton. Ĝi temas pri junulino, kiu dum longa tempo suferas pro amo kaj perfido, sed kiu finfine sukcesas relevi la kapon kaj antaŭeniri.

Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?

Kiel mi jam menciis, por mi amikeco, amo kaj paco estas la plej gravaj aferoj en la mondo.

Ĉu vi iam partoprenis literaturajn konkursojn kaj gajnis premiojn?

Jes, mi dufoje partoprenis la Belartan konkurson, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne ricevis premion.

Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?

Mi ŝatas verki, do mi planas daŭrigi. Mi ne volas limigi min nur al la vivo en mia lando, sed volas verki pli larĝe, je internacia nivelo. Tio signifas, ke mi volas atingi la plej grandan eblan publikon kaj legantaron.

Kion vi ŝatus diri al la legantoj de Literatura Vivo?

Karaj legantoj de Literatura vivo, mi ĝojas pri tiu ŝanco, dividi kun vi mian vojon.

Mi deziras al vi ĉiuj, vivon plenan je paco kaj amo.

Bibliografio de Ranja Zafinifotsy

Ranja Robertine Jeanne d'Arc Lydie ZAFINIFOTSY EP RANDRIANANDRASANA (naskiĝis la 18-an de julio 1996 en Tsaratanana, distrikto Ifanadiana) estas malagasa esperantistino kaj lerneja direktorino.

Ŝi naskiĝis kiel la plej juna el ses infanoj en kamparana familio de sudorienta Malagasio. En 2014 ŝi translokiĝis al la ĉefurbo Antananarivo kaj studis tie administradon de neregistaraj organizoj. Ekde 2018 ŝi laboris tie kiel sekretariino kaj administrantino en lernejo por malriĉaj infanoj. Temas pri lernejo kun preskaŭ 300 infanoj en sluma kvartalo de la urboparto Anosibe de Antananarivo. Ĝin finansas franca fondaĵo. En 2023, en aĝo de nur 26 jaroj, ŝi fariĝis direktorino de tiu lernejo.

Dum kelkaj jaroj ŝi verkis teatraĵojn en la malagasa lingvo, kiujn disaŭdigis radiostacio en Antananarivo.

Ŝi edziniĝis en 2021. En februaro 2022 naskiĝis ŝia filo Ayden.

Esperanton ŝi eklernis en 2018, aŭdinte pri la lingvo de instruistino, kiu lernis Esperanton 10 jarojn antaŭe en kurso de Justine Ralalarisoa. En decembro 2021 ŝi iniciatis la refondon de MEJA (Malagasa Esperanto Junulara Asocio) kaj elektiĝis ties kasistino.

Komence de 2022, ŝi debutis kiel esperanta verkistino per la rakonto „La sorto de Aina“ publikigita rete ĉe verkoj.com kaj libro.ee. Ĉe verkoj.com, la koncerna paĝo akiris en 2024 la 10-an lokon el la plej ŝatataj paĝoj.

La 15-an de oktobro 2022 la estraro de UEA elektis ŝin ano de la Afrika Komisiono por la periodo 2022-2025.

En decembro 2022 ŝi partoprenis kun sia eta filo en la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto en Senegalo.

En 2023 ŝi gajnis en la konkurso "Partoprenu IJK-n" de TEJO. En la Universala Kongreso 2023 en Torino kaj la Internacia Junulara Kongreso 2023 en Lignano Sabbiadoro ŝi estis la sola partoprenanto el Malagasio. En la UK en Torino, ŝi sukcese trapasis la KER-ekzamenon sur nivelo B2.

De la 6-a de januaro 2024 ĝis la 29-a de aprilo 2025 ŝi estis prezidantino de la Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj (UME).

Ŝi multe instruas Esperanton en sia lernejo, sed ankaŭ inter siaj parencoj kaj konatoj. En la Instruista Seminario en Antananarivo en januaro 2024 kaj la samloka Kristana Esperanto-Seminario en marto 2024, po pluraj dekoj el la partoprenantoj estis ŝiaj lernantoj. En 2024 pluraj el ŝiaj lernantoj komencis mem instrui Esperanton.

Ŝi helpis en la Internacia Infana Kongreseto en la UK 2023 en Torino. En la UK 2024 en Aruŝo ŝi estis anino de la Loka Kongresa Komitato kaj gvidantino de la infana kongreseto.

En februaro 2025 ŝi ĉeforganizis la 6-tagan Malagasan Esperanto-Seminarion en Antananarivo, kun 42 partoprenantoj el Malagasio, Germanio kaj Litovio. Almenaŭ 30 el tiuj partoprenantoj lernis Esperanton pro ŝia instigo. Ŝi ĉeforganizas ankaŭ la 4-an Malagasan Esperanto-Seminarion en oktobro 2025.

Verkoj

La sorto de Aina (2022, rakonto, publikigita rete)

Semoj de amikeco (2025, rakonto, publikigita rete kun ilustraĵoj de Csaba S. Németh)

La vojaĝo de Ando (2025, rakonto kun ekzercoj por lerni Esperanton)



Teksto: [Ranja Zafinifotsy](#)
Ilustraĵoj: [La aŭtorino](#) (per AI)

Ranja Zafinifotsy, naskita en 1996, estas esperantistino kaj lerneja direktorino loĝanta en Antananarivo, la ĉefurbo de Malagasio.

„Post tiuj vortoj, mia mondo subite disfalis. Mi sentis min nuda en la vento, vundebla kiel infano. Mi enfermis min en la banĉambro, for de liaj okuloj, por plori en silento. Liaj vortoj estis tiel kruelaj, tiel frostaj. Li ne volis aŭdi mian doloron, nur pridubi ĝin.”

Tiu ĉi originala romano rakontas pri la vivo de Sariaka, juna malagasino, kiu post abundo da humiligaj kaj elrevigoj ĉiam denove trovas forton por leviĝi.

“Lavango da emocioj superŝutis min ĉiam, kiam mi legis la manuskripton de tiu ĉi verko. Kia denseco de travivaĵoj, sentoj kaj impresoj. Jen sufero, mizero, humiligaj kaj perforto, jen amo, respekto, feliĉo kaj kompreno, kaj meze de ĉio Sariaka, junulino, kiu kun bona koro kaj mirinda saĝeco travivas, observas kaj prijuĝas ĉion ĉi.”

Ulrich Matthias

Eldonejo Lemuro
Wiesbaden, Germanio
1-a eldono 2025



La morto de Princino

Semio

Princino estis la nomo de la hundino, kiun bredis mia pliaĝa frato. Antaŭ kelkaj tagoj, mi propre vidis mortigon de la hundino. Vidante mian fraton, kiu suferis de malsano kaj ploregis pro la morto de la hundo, mi sentis min malĝoja, senhelpata.



Mia frato estis malsanulo de renoj. Preskaŭ tri jarojn pasis de lia operacio de renoŝanĝo, sed nun la funkcio de la nova reno malbonas denove. Li luktas kun la morto foje kaj refoje per hemodializo kaj medikamentoj kontraŭ rejekcio, hipertensivo kaj diabeto. Mia frato jam perdis sian antaŭan malfermitan kaj grandaniman karakteron. Li ne povas vivi komforte nek morti nature, kaj pasis eĉ ĉiun tagon malfacile. Vizitoj de parencoj malmultas, kaj ekonomia premo alproksimiĝas al li. Nur ĉi tiu hundino akompanis lin, eĉ ne forlasis lin eĉ unu momenton.

Antaŭ ses jaroj, li estis libera en elspezo, malsaniĝinte, li sentis ekonomian malfacilecon. Do li iris al bazaro kaj aĉetis paron da shar-pei-hundoj el pura raso, esperante bredi ilin por gajni iom da mono por medikamentoj. Li nomis hundon kiel Leonon, la hundinon, Princinon. Mia frato loĝis en la malnova ofidomo de Fervoja Sekcio de Zaozhuang-a Karbminejo ĉe Norda Puto. La malplena kaj ruinita korto estis malorda kaj malpura, kaj oni ne plu aŭdis la antaŭan bruon kaj vigecon. Tie la hundidoj kreskis iom post iom, estis tre amindaj. Preskaŭ antaŭ tri jaroj, mia frato veturis al Yantai por operacio de reno, kaj petis lian bofraton zorgi liajn amatajn hundojn. Leono kaj Princino, sen sia majstro, ne manĝis nek trinkis dum pluraj tagoj. Tiam Leono foriris hejmen, sen la amon de sia majstro, iĝis sovaĝa hundo. Ĝi mortigis ok kokojn de najbro. Batite ĝi kuris fore kaj neniam revenis. Princino estis tiel malsata, ke ĝi estis elvazia, ĉiam turniĝis en la korto, ne volante forlasi eĉ unu paŝon. Finfine, ĝi atendis la sekuran revenon de mia frato, kaj ĉiam glue sekvis sian majstron eĉ unu momenton. Poste, mia frato iris al Weihai por labori ĉe sia kunulo, kiu ankaŭ havis operacion de renoŝanĝo per sama kontribuinto de renoj, Sinjoro Zhong, la usona ĉino. Princino ankaŭ sekvis lin al Weihai, kaj iĝis fidela gardisto en la markukumo-kultivejo de Sinjoro Zhong. En Weihai, Princino naskis ok idojn, kaj mia frato vendis nenion. Princino malsaniĝis, ne povis manĝi eĉ iom aŭ trinki eĉ guton da akvo. Mia frato portis ĝin per aŭtobuŝo reen al Zaozhuang por kuracado, kaj ankaŭ kvar hundidojn, kiujn li donacis al parencoj kaj amikoj. Sub la atentema prizorgado de mia frato, Princino saviĝis. Poste, ĝi naskis dufoje idarojn, kiujn mia frato ankaŭ donacis al aliaj. De kiam li komencis bredi hundojn, la elspezoj de mia frato multe pliiĝis, sed li gajnis nenion da mono per la hundoj. Li ankaŭ adoptis Pekino-hundon kun du blindaj okuloj, nomitan Nini.

Ĉiuj diris al li: "Vi eĉ ne povas zorgi pri vi mem, kial vi bredas hundojn?"

Mia frato ĵetis la frazon: "Kion vi komprenas?"

La minejo decidis repreni la domon, kie mia frato loĝis. Mia frato devis aĉeti domon, helpate de mia patrino li sukcese aĉetis iun malnovan apartamenton kun du ĉambroj en la sama etaĝodomo de nia patrino. Por kolekti monon li eĉ malmultigis sian medikamenton.

Ĉiuj zorgis pri la sorto de Princino, kaj mia frato ankaŭ estis malĝaja pro tio.

Mi revenis de labora vojaĝo, kaj la sekvan tagon, antaŭ la tagiĝo, mi biciklis al la hejmo de mia frato por helpi lin transloki. Enirinte en tiun malorda kaj malpura korto, mia frato diris al mi, ke Princino estis mordita de serpento. Mi iris tien kaj vidis Princinon kuŝantan sur la herbo, jam apud la morto, kaj ĝiaj postaj piedoj tremis, kiam ĝi aŭdis niajn voĉojn.

Mia frato diris, ke ĝi estis tia jam tri tagojn. Li donis al ĝi medikamentojn kaj injektojn. Hieraŭ, ĝi leviĝis kaj falis centojn da fojoj. Mia frato kaj bofratino gardis ĝin la tutan nokton.



La transloka aŭto devis ekfunkcii, kaj petardoj sonis. La larmoj de mia frato rulis en liaj okuloj, kaj li vole-ne-vole elsendis sentemajn, lamentajn kaj tristajn vokojn: "Princino, ni translokiĝas, iru kun ni!" Princino klopodis turni sin por leviĝi, sed vane, poste ĝi kriegis per lasta forto tri fojoj kaj tuj mortis. Poste venis la neĉesigeblaj ploroj de mia frato! Mia frato, plena de larmoj, ordonis al mi, ke mi kaj mia alia frato entombigu la hundinon per lia nova litkovrilo en la korton, kie li iam loĝis kun la hundoj.



Chen Tao

teksto de Chen Tao
muziko de Zhang Hongguang
esperantigo de Lu Jixin



Lu Jixin

Sindoni por la patrio

<p>精忠报国</p> <p>作词 陈涛 作曲 张宏光 世译 卢纪新</p> <p>狼烟起 江山北望 龙旗卷 马长嘶 剑气如霜 心似黄河水茫茫 二十年 纵横间 谁能相抗</p> <p>恨欲狂长刀所向 多少手足忠魂埋骨它乡 何惜百死报家国 忍叹惜 更无语 血泪满眶</p> <p>马蹄南去 人北望 人北望 草青黄 尘飞扬 我愿守土复开疆 堂堂中国要让四方 来贺</p>	<p>Sindoni por la patrio</p> <p>teksto de Chen Tao muziko de Zhang Hongguang esperantigo de Lu Jixin</p> <p>Milit-fum', mordas na ĉi land'. Drak-flago, ĉeval-hen', glav' kun frosta blank'. Kiel Huanghe* tajdas kora kant'. Ni venkis ĉion de fi-agresant'.</p> <p>Kiom da ar' de soldant' kuraĝe sin donis jam sub grav-rand'. Kontraŭ-morte por ĉi land', sen veo, sen plendo luktis ni tra sang'.</p> <p>Kore karas nia land', belege prospera ter' en grand'. Jen mi gardu na hejmland', ke pompegu antaŭ ĉiu flank', ĉina land'.</p>
--	--

*Huanghe (黄河) estas la nomo de la dua plej longa rivero en Ĉinio.

Kŭafu Persekutas la Sunon

Arbsemo



En la norda dezerto staris ĉielalta monto, kie loĝis la giganto Kŭafu. Kun flavaj serpentoj pendantaj je siaj oreloj, li ĉiutage batalis kontraŭ sovaĝaj bestoj kaj inundoj.

Unu someron, la suno bruligis la kampojn. Vidante siajn klananojn falantaj, Kŭafu ĵuris: “Mi kaptos la sunon!”

Unu el la klananoj avertis: “Ĝi bruligos vin!” Sed Kŭafu, rigardante la infanojn plorantajn, diris: “Atendu min — mi revenos por ke ĉiuj havu pli bonan vivon.”

Je tagiĝo, Kŭafu ekpersekutis la sunon. Liaj paŝoj skuis la teron kaj lasis profundajn spurojn.

Je tagmezo, li deskuis teron el siaj ŝuoj, kaj ĝi fariĝis altaj montoj.

Vespere, Kŭafu kolektis tri ŝtonetojn por kuiru manĝon. La ŝtonoj transformiĝis en montopintojn.

Post sep tagoj, lia gorĝo sekiĝis. Li trinkis la tutan akvon el la Flava Rivero, sed lia soifo restis nesatigita.

Post dek tagoj, li fine atingis la sunon. Blindigita de ĝiaj radioj, li etendis la brakojn kaj kriis: “Jen mi vin kaptas!”

Kŭafu brakumis la sunon. La brulanta radiaro vundis liajn brakojn. Li saltis en riveron Wei, kaj eltrinkis la akvon.

Stariĝinte, Kŭafu daŭre kuris antaŭen. Cent liojn antaŭ ol atingi la nordan marĉon, Kŭafu falis. Li ĵetis sian persikbastonon al la hejmloko kaj flustris: “Helpu... ilin...”

La bastono fariĝis cent-lia persikarbaro — floroj kiel rozoj, fruktoj dolĉaj, ombro malvarmega.

Vojaĝantoj manĝis persikojn por malvarmiĝi; sub la arboj ili revas pri freŝeco.

Ĝis hodiaŭ, la arbaro susuras. Maljunuloj diras: “Jen Kŭafu viŝas niajn ŝvitojn.”

Infanoj, manĝante persikojn, vidas ruĝan nubon — kvazaŭ lia mano ŝirmas la sunon.

Kiam la suno brulas tro forte, la arboj murmuris: “Ne timu, mi vin protektas kontraŭ la suno.”



Ĉina Saĝo

--laŭ ĉinesko Linjiangxian

Zhuang Qixiong



Elitoj disvastigas
E-on en nova vent'
sub verd-flag' kun rid-moment'.
De antikvec' ĝis
Zamenhof-talent'.


Saĝa Konfuzio, Tao'
kaj Zen' kun Ŝanĝa tent'.
Ĉiuj brilos pro torent'.
Per ĉina trezor',
al homara sent'.

临江仙
中国智慧

庄企雄

四海宾朋传世语，
新风博雅文才。
绿星旗下笑颜开。
究柴门境界，
感古往今来。

孔孟老庄智慧妙，
禅宗周易连斋。
发扬光大众同侪。
品中华瑰宝，
悟济世情怀。



Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 5 versoj de 76,7,55 silaboj, laŭ rimarango xa,a,xa (x=senrime).

Tri kantotekstoj de Joel Muhire (Goma- D R Kongo)



Joel Muhire

NI PROTEKTU LA NATURON

Parolaĵo:

Karaj, ni ĉiam memoru replanti novajn arbidojn post forhako; ankaŭ bona edukado por pacokonstruo kaj por plibonigo de la homa vivo per bonfarado kaj laboremo estas necesa, jes!

1.

La tero, la vetero kaj la maro,
la faŭno, la flaŭro kaj la homo konsistigas la naturon,
sen kiu ne eblas la vivo sur la Tero.
La naturo estas ĉiel protektinda
por la homa bono kaj por ĉiuj vivestaĵoj.
Ni ĉiuj estas alvokataj protekti la naturon!
Ni ĉiuj evitu ĉion, kio malutilus al la naturo.

Refreno:

Ĉiuj: La naturon, ni ĉiuj protektu la naturon!

La naturo estas komuna fonto de nia vivo.
Se ni ne protektas la naturon, ni damaĝas nian propran vivon.
Ni devas esence konscii, ke ni vivas interdependaj sur ĉi tiu Tero.

2.

Ĉiu vivestaĵo, kiu povas spiri, ne dependas nur de si mem.
Homoj bezonas manĝi, trinki, spiri, kaj ne nur tion;
la bestoj same — ĉu maraj aŭ surteraj — kaj la verdaj kreskaĵoj dependas unu de la aliaj.
Kiel vivi, se, rezulte de kontraŭleĝa senarbarigo, ĉie regus klimato dezerta?
La veter- kaj akvopoluado fare de industrioj multobligas diversajn malsanojn,
iujn eĉ nekuraceblajn.
Ni devas esence konscii, ke ni vivas interdependaj sur ĉi tiu Tero.
Tial mi admonas vin: protektu la naturon!

Refreno:

Ĉiuj: La naturon, ni ĉiuj protektu la naturon!

La naturo estas komuna fonto de nia vivo.
Se ni ne protektas la naturon, ni damaĝas nian propran vivon.
Ni devas esence konscii, ke ni vivas interdependaj sur ĉi tiu Tero.

Parolaĵo:

Gratulon al ĉiuj ekologiistoj, aparte al la membroj de la Asocio de Verduloj Esperantistaj, nome AVE.

La retpaĝo de AVE estas www.verduloj.org.

2. MILIT-TEMPE

1. Mi naskiĝis milittempe
kaj kreskis mi en suferoj
Nenombreblaj fuĝantoj propralande
Kaj aliaj suferas eksterlande
Ĉies demando, kie vin kaŝas vi, paco
Afriko bezonas vin, la tuta mondo sopiras
al vi, paco

Refreno:

Ni bezonas pacon, sopiras ni rehavi pacon
Ni elradikigu ĉion milit-instigan,
Malamon, monavidemon, uzurpemon, ĉian diskriminacion,
Ni provu vivi laŭ la interna ideo de Esperanto por pli paca mondo

2. Ĉe multaj konstateblas malamemo
kaj spite ke okazas ĉie instigo al homamo
multaj iĝis al siaj similuloj nocivaj
Jam temp'esta por ŝanĝi niajn fipensojn
kaj kune laŭdiru NE al la milito,
urĝas konscii pri paco kaj altrebi ĝin.

Refreno:

Ni bezonas pacon, sopiras ni rehavi pacon
Ni elradikigu ĉion militinstigan,
Malamon, monavidemon, uzurpemon, ĉian diskriminacion,
Ni provu vivi laŭ la interna ideo de Esperanto por pli paca mondo



3. AFRIKO

1. Afriko, hooo Afriko :

Al vi mankis vera paco de jardekoj, tamen eblus ke viaj infanoj ekvivu en paco.

Halt' al la milito, ni ĉiuj abomenu la militon, la milito ne konstruas, nur la kunlaboro.

Halt' al la milito, ni ĉiuj abomenu la militon, la milito ne konstruas sed detruas.

Afriko sen konflikto eblus,

Eblus, nur necesas bonkonscienco kaj laboremo!

Afriko sen konflikto eblus,

Eblus, nur necesas emo en ĝi alrebi pacon,

La mondo sen militaj konfliktoj eblus,

Eblus nur se ni havas veran fratamon al ĉiuj.

2. La militoj komencas en la mensoj de la homoj,
tial tre gravas konsciige eduki la homaron por
antaŭenigi pacon en la tuta mondo.

Afriko sen konflikto eblus,

Eblus, nur necesas bonkonscienco kaj laboremo!

Afriko sen konflikto eblus,

Eblus, nur necesas emo en ĝi alrebi pacon,

La mondo sen militaj konfliktoj eblus,

Eblus nur se ni havas veran fratamon al ĉiuj.

Halt' al la milito, ni ĉiuj abomenu la militon, la milito ne konstruas, nur la kunlaboro.

Halt' al la milito, ni ĉiuj abomenu la militon, la milito ne konstruas sed detruas.



La sono de la koro

Poste la malbona tempo.
Alvenas tre ĝoja melodio.
Post mia longa atento.
Fine, mi atingas la celon.
Ŝia ĉeesto estas tre altvalora.
Ŝi estas mia forto kaj trezoro.
Trovi ŝin ne estis facile.
Ridetanta, bele, sincere.
Ŝi estas fidela, feliĉe, ameme.
Pasintaj amoj malfeliĉigis min.
Sed nun ĉirkaŭ mi, la steloj brilas.
Mi amas ŝin tutkore.
Ŝi jam estas parto de mi.
Mi amas vin, mi amas vin!



Kelly Muteke



Leviĝu kaj Laboru

Kiam la suno leviĝis silente,
Nova tago vokas nin potence.
Ne timu laboron, ĝi estas vojo,
Al revoj, espero, kaj viv' kun ĝojo.

Manoj laborantaj kun koro sincera
Konstruas mondon pli justa, pli vera.
Eĉ se ŝvito falas kiel roso,
Frua laboro fruktas en la vespera gloro.

Kuraĝu, frato, ne ĉesu paŝi,
Ĉiu peno helpas la vivon plifaciliĝi.
La kampo bezonas vian forton,
Via laboro alportas tiun forton.
Ne gravas ĉu vi semas aŭ konstruas,
Ĉiu honesta labor' la mondon lumas —
Laboro estas vojo al vivo nobela.



Etienne Luheka



Kien mi iras?

Etienne Luheka



Kien mi iras?

Kien iras la mondo?
luj ridas, aliaj ploras,
luj detruas, aliaj gardas.

Kelkaj protektas la nacion,
Dum aliaj ĝin difektas.
Multaj pensas, tage kaj nokte,
Por gajni iom da mono.
Ĉu vere valoras tio?

Ni kunlaboru, ni unuiĝu,
Por plibonigi nian mondon.
Por ami kaj gardi
La trezoron de la naturo.



Esperanto kulturo

En la mondo, ni revas pri pli trankvila Kongolando.

Vivanta sen mensogo, sen timo en mia lando .

La forto de junuloj, konstruas novan vojon en amo.

Kaj en harmonio, ni trovas ĝojon.

Mia amo por Esperanto estas granda.

Mia amo por Esperanto estas forta.

Mi estas membro de granda amika rondo.

Kiu parolas la lingvon de la homaro en la mondo

Ni marŝas kun mano en mano.

En la sun havanta propran kulturo.

En ĉiu tago ni konstruas pontojn.

Per la lingvo de Espero kaj la lumo de amikeco.

Kontraŭ la mallumo en la tero.

Mia amo por Esperanto estas granda

Mia amo por Esperanto estas forta

Mi estas membro de granda amika rondo.

Kiu parolas la ligvon de la homaro en la mondo.



Ken Muteke



Fajrero Daŭra, Vojo Komuna

—Alvoko al Ĉina Junularo



Batalanto

Grave Kuraĝigo, plej grave fajrer-transdono!
Grave Irado, plej grave kuna vojo!

Vi, ĉina junularo, estas la plej sonora kolombkanto en ventego,
la plej vidvelo sur ondkresto de epoko.
Hodiaŭ, ni donu varman aplaŭdon
al ĉiuj ĉinaj pioniroj, kiuj ensangigis Esperanton!

Iliaj ombroj fariĝis rivero senĉesa,
portanta centjarajn revojn al ĉiuj mondpartoj.
Iliaj flamoj lekas nokton de lingvaj baroj,
lumante la aŭroron de homa unueco.
Ili manpremis ĉinan skribon kaj Esperanton,
akordigis orientan saĝon kun okcidento.
La vorton "Espero" ili igis
korbato trans montoj kaj maroj.

Ni alvokas ĉiujn instruistojn kaj lernantojn:

Prenu Esperanton kiel ŝlosilon,
malfermu pordojn al stelmaroj;
Prenu ĝin kiel semeton,
kreskigu arbaron de paco;
Prenu ĝin kiel spegulon,
montrantan "Homaran Komunon".

Junularo!
Uzu pionirojn kiel lumturojn
en via vojaĝo tra gramatiko.
Per ĉiu legado, ĉiu dialogo,

per retleteroj kaj retpontoj,
pretigu vojon por homaro!
Fariĝu "lernantoj plej profundaj,
uzantoj plej lertaj,
disvastigantoj plej foraj"!

Ni levu pokalojn de kredo:
Por klara revo en Esperanto,
Por fajro en instruantaj koroj,
Por estonteco sen limoj!

Kunuloj, junuloj:
Kuraĝon! Kuraĝon! Ĉiam kuraĝon!
Antaŭen! Antaŭen! Senĉese antaŭen!



Aŭtuna Cikadkanto

Unu sono. Plia sono.
Kiel akvofalo el nuboj.
Purigas aŭtunan lumon.
Polvo en mi forflugas.
Zorgoj iĝas travida venteto.

Arbaro etendis verdajn ombrelojn.
Por mi kaj la cikado, etaj kvietoj.
Vento – ora plumeto.
Mallaŭta sono,
Kiel plej milda plaŭdo.

Pli varma sun',
Des pli brila kanto.
Kvazaŭ kantu la someron lumon.
Mi havas nenion fari.
Mian koron la kanto
Skribas, streko post streko,
Al blanko.

Mi ne kaptas.
Ĝi ne timas. Tute.
La mondo ridetas.
Nek pafarko, nek kaĝeto.
Ĝi kantu ĝoje en aero,
Kiel stelo en nokto,
Kiel bono en koro.

Kvieto.
Senĝeno.
Harmonio.
Ĉiame.



Batalanto

秋蝉诗

一声。再一声——
如云瀑垂落，
洗净秋光。
我胸中尘埃飞散，
愁绪化作通透的风。

森林撑开绿伞，
为我和鸣蝉，
圈出片片小静。
风是金箔一页，
轻响如最柔的掌声。

日光愈炽，
蝉歌愈亮，
恍若将夏吟成光。
我无所事事，
蝉声一笔一画，
把心描作留白。

我不捕，
它不惧，顺应自然。
天地含笑。
无弓无笼，
任它在虚空歌吟，
似星宿缀夜空，
如善意驻心间。

宁静。
无扰。
和谐。
恒在。



Humura Dialogo

Imitado

Fortego

Ŝjangŝeng-o (相声) estas unu el la specoj ŝatataj de ĉinoj. Mi esperantigas ĝin humura dialogo. Ĝi iom similas al skeĉo. Do mi verkis la skeĉon kaj per ĝi partoprenas en la konkurso.



A: Ĉu vi estas saĝa?

B: Jes, certe, mi estas la plej saĝa en Esperantujo.

A: Do ĉu vi povus imiti min je tri frazoj?

B: Tio estas nenio, tridek frazoj ne gravas.

A: Ne fanfaronu, spektantoj estas juĝistoj. Aŭskultu!

Mi manĝas, mi invitas ankaŭ vin manĝi.

B: Mi manĝas, mi invitas ankaŭ vin manĝi. Tro simpla!

A: Mi trinkas teon, mi invitas ankaŭ vin manĝi teon.

B: Mi trinkas teon, mi invitas ankaŭ vin manĝi teon.

A: Vi eraris.

B: Mi ne eraris.

A: Ĉu vi ne konfesis la eraron?

B: Kie mi eraris?

A: Refoje. Ĉiuj spektantoj estas juĝistoj. Vi ĉiuj juĝas, ĉu li eraras aŭ ne. Mi manĝas, mi invitas ankaŭ vin manĝi.

B: Mi manĝas, mi invitas ankaŭ vin manĝi.

A: Mi trinkas teon, mi invitas ankaŭ vin manĝi teon.

B: Mi trinkas teon, mi invitas ankaŭ vin manĝi teon.

A: Vi eraris.

B : Mi ne eraris.

A: Kiom da frazoj vi devas imiti?

B: tri frazoj.

A: Kial la trian vi ne imitis?

B: La trian?

A: La tria estas : Vi eraris.

B: Ĉu inkluzivas de tiu?

A: Certe jes. Fanfaronulo! Ĉu la plej saĝa en Esperantujo? Ĉu vi scias, kiom granda estas la Esperantujo? (Prononcante salivon al la vizaĝon de B)

B: (Viŝi la vizaĝon) Mi ne scias. Ĉu vi scias, kiom granda estas la Esperantujo?(Ankaŭ prononcante salivon en la vizaĝon de A)

A:(Viŝi la vizaĝon)

A kaj B: Fakte ni ambaŭ ne scias, kiom granda estas la Esperant...

(A kaj B samtempe kovras sian vizaĝon per sia propra brako)

B:Mi ne atentiĝas pri tio, refoje!

A: Aldonu du frazojn, sume kvin frazojn.

B: Bone.



A: Mi manĝas, mi invitas ankaŭ vin manĝi.

B: Mi manĝas, mi invitas ankaŭ vin manĝi.

A: Mi trinkas teon, mi invitas ankaŭ vin manĝi teon.

B: Mi trinkas teon, mi invitas ankaŭ vin manĝi teon.

A: Vi eraris.

B: (Kunligas la lipojn ŝajnige prononcas "mi") Vi eraris. Ha ha ha, vi eraris.

A: Kiom da frazoj vi jam...?

B: tri fraz...(Kovras la buŝon permane)

A: Vi denove eraris.

B: Refoje, refoje.

A: Ĉifoje, se vi eraros, vi invitas min al kinejo.

B: Konsentite. Sed mi imitos ĝuste la kvin frazojn, vi invitas min al kinejo.

A:(Al la spektantoj).Li eraros ankoraŭfoje. Mi manĝas, mi invitas ankaŭ vin manĝi.

B: Mi manĝas, mi invitas ankaŭ vin manĝi.

A: Mi trinkas teon, mi invitas ankaŭ vin manĝi teon.

B: Mi trinkas teon, mi invitas ankaŭ vin manĝi teon.

A: Vi eraris.

B: Vi eraris.

A: Kiom da frazoj vi jam imitas?

B: Kiom da frazoj vi jam imitas? Kie estas la kvina frazo, rapidu!

A: Mi malvenkas, do ni iru al kinejo.

B: Bonege (kovras la buŝon)

A/B: Vi/mi eraris denove.

Fino

Verkita de Fortego

Pekino, Ĉinio.

La 7-an en Oktobro 2024

Mia Emerita Vivo

Eternfortik



Pri mia familio kaj la koncernaj homoj.

Mi emeritiĝas ekde la 12-an de januaro, 2018. Ĝis nun mi ankoraŭ havas unu edzinon kiu ne ŝatas esperanton, unu filon kiu ankaŭ estis esperantisto dum lia juneco, sed ne ofte uzas ĝin, ordinaro uzas anglan lingvon ĉiutage, kaj unu nepon, kiu estas ankoraŭ tro juna, tial li ne povas paroli. Nur mi estas maljuna esperantisto, do tial mi certe deziras, ke mia nepo havos ŝancon lerni esperanton.

Kiam mi komence eklernis esperanton? Mi neniam forgesis, ke dum mi studis fakon pri ĉina lingvo kaj literaturo en Hŭejĝoŭ Pedagogia Kolegio kie mi eniris tie en la jaro 1988, la sekvanta jaro 1989, tiam kiam mi vidis miajn gekolegojn Ĉjoŭ Ŝuhong kaj Je Lijing estis lernanta esperanton, samtempe Ĉjoŭ estis ĉasinta la belulineton Je, Je ne tre alta sed blanka haŭto kaj bela vango, ĉar ŝi ĝuste volis lerni esperanton tiam. Baldaŭ li akiris ŝian koron, lia esperantaĵo tuj donacis al mi, dume ili duope profunde falis en la amitan maron. Tiam mi jam aĝis 21 jarojn, ankoraŭ ne havis ajn amikinojn.

Kial mi fervore ŝatas la lingvon— Esperanto? La respondo simpla, kaj la kaŭzo ankaŭ simpla, mi sopiras ke la homaro tute parolos nur unu lingvon, aliaj lingvoj tute kuŝas en muzeo aŭ artejo, ĉar tro specoj da lingvoj ĉirkaŭ ni, mi ne povas memori tiel multe da diferencaj vortoj! Eĉ la vortoj uzataj en ordinara vivo, se ne ofte uzus ilin, ili foriras malproksime el mia cerbo. Se familianoj ofte uzas la vortojn, ĉitujn vortojn nepre ne povas forgesi. Tial kial mi ĉiam sopiras fondi esperantan familion en mia juneco ankaŭ ĝis nun. Se ni establus esperantan familion, certe povos memori tiujn ordinarajn vortojn kaj la vortojn inter ili en nia esperanta hejmo: vestaĵo, manĝaĵo, loĝejo, agoj; brulligno, rizo, oleo, salo, ĉefaj vivbezonaĵoj kaj sojo(saŭco, misoo, marmelado), vinagro(aceto), teo; poto, pelvo, kulerego, telero.

Pri mia laborado antaŭ mi emeritiĝas, ĝia ĉefa tasko estas popularigi kaj disvastigi mandarenan lingvon en nia nacia lando. Mi pensas, ke en la interna lando popularigi kaj disvastigi la lingvon, kaj en la mondo popularigi kaj disvastigi la lingvon esperanton, tia laborado estas grava, signifa kaj efika! Ĉar mi ŝatas mian laboradon, eĉ mi nun jam emeritiĝas, mi ankoraŭ volonte laboras senpage por ĝi. Esperanto ŝajnas pli facile lerni ĝin ol facile lerni ĉinan lingvon en komenca periodo. Dum mi ekde konis ĝian simplecon kaj noblecon, mi decidis lerni, studi kaj labori por ĝi kun mia energio kaj entuziasmo!

Antaŭ mia aminda laborado, mi fariĝis instruisto pri ĉina lingvo en iu mezlernejo, estis publikservanto por la demokratia partia oficejo, kaj trupano por plenumi la leĝon pri kultura merkato. Ĉasadinte la plej taŭgan postenon, ĝi kostis miajn 16jarojn, dankas al kaj benas el la dio, pro tio ke mi povas konvene labori por popularigi kaj disvastigi la mandarenan kaj esperantan lingvon!

La mandarena lingvo jam sukcese populariĝas kaj disvastiĝas en la nova kaj granda urbo Ŝenĝen, sed la lingvo esperanto ankoraŭ ne sukcesas kiel la lingvo mandarena. Kiel disvastigi kaj popularigi ĝin en la situacio de la mandarena lingvo? Eble ni devos labori en la sekvantaj flankoj: 1. Akademia studado kaj edukado, 2. Amasa movado per diferencaj propagandoj, 3. Universa spirito de Esperanto akceptita. La plej grava estas , esperanta socio estos fondita de la registaro!

Pri kelkaj vidpunktoj de Esperanto:

1. Ideala kaj reala lingvo kiel daŭrigas disvolvi aŭ disvastigi? Antaŭ pli ol dek jaroj, mi aŭdis iun punkton pri idealeco kaj realeco de esperanto: ili konsideris, ke ĉar la lingvo estas ne nur unu lingvo por internacia komunikado, ĝi grave havas idealon por la homara paco, justo, egalo kaj amikeco, pro tio ke ajn organizo kaj personoj ne povu meti ĝin kiel tiel ajn regiona aŭ loka lingvo, evitigu ĝin falante kaj falante fariĝos hegemonia lingvo! Ni devu longe pacience atendi tiam, kiam la homaro tute vere realiĝos paca, justa, amikeca, diferencaj nacioj kunfandiĝos, nur tiam esperanto ankaŭ povos esti uzita kiel komuna lingvo en diversaj lokoj de la tuta mondo.

Komence mi opiniis, ke la diro ŝajne estas prava, sed post pensoj ĝi estas grandega absurdo. Se la ideala lingvo restas nur unu konvena lingvo aŭ turisma lingvo, ne povas uzita ordinaro en ĉiuj lokoj, ĝi ne povas disvolvi ĉiutage, ĝi nepre iam post iam mortos! Ĉar ajn lingvoj nur uzita ĉiutage en iu loko kie tie popolo ekzistas kune vivas, se nur parto da homoj konvene uzas ĝin, ĝi nur estas ĵargono aŭ slango, eĉ iom post iom ju pli malmultaj homoj konos ĝin, des pli ĝi estos malmulte uzita!.

2. Ne kompliku E-on! Azia popolo ne kutime klare distingas diferencojn de inter “d” “t” , “g” “k”, “b” “p” ambaŭ ili, oni ne facile prononcas prave ilin. Tio ne estas grava problemo, en la parolado aŭ la teksto, laŭ la antaŭaj vortoj aŭ malantaŭaj vortoj, pro tio povos komprenita ĝiajn signifojn. Aspiracia konsonanto pri etiketo=etikedo, en la vortaro skribis (laŭ la vortaro PIV2020: “3 Etikedo. ~a. Laŭ la ~o 1 aŭ 2.” Kaj GVEĈ), kaj alia ekzemple, la frazo “nenia beno, sen peno.” en ĝia vorto “peno” laŭtleĝita aŭ akcentita, litero “p” estas aspiracia samtempe ĝi ankaŭ estas malaspiracia konsonanto kun voĉkordo vibranta, pro tio la plej grava ke ĉiuj povas kompreni ĝian signifon.

3. Poetoj ne mankas en la monda esperantujo, ni mankas tiuj kiuj kredas, ke “Esperanto povas esprimi ĉiujn nuancojn de la penso.” Oni ofte rakontas esperante pri io, subite uzas iliajn naciajn vortojn en ilia lingvo. Kaj ni mankas tiuj kiuj povas ĝustatempe traduki la novajn vortojn aperis dum laŭmoda furoro speciala pri internaciaj novaĵoj, teknik-scienco, kaj tiel plu. Ekzemple, la vortoj “blogger” “vlogger” ofte uzita en poŝtelefono, kiel prave unuece prononcu ilin en esperanto?

4. Dum oni prelegas, iuj laŭtlegas aŭ iuj elparolas aŭ iuj babiladas, prefere esperante babiladas, kial? La laŭtlegantanto unue liaj okuloj volas vidi kaj tra la cerbo kompreni la vortojn, frazojn kiel prononcita kaj ili esprimas kion, fine disponas ilin por laŭtlegi. La babilanto rekte pensas kion li volas elparoli al la kontraŭulo, kaj atente zorgi la kontraŭanton, speciale al la kontraŭulon, ĉu li aŭ la kontraŭanto(j) kiel reagos? Tial la lingvo esperanto montras pli vera, pli vigla kaj pli intuicia kiel parola lingvo! Aŭdpovo povas akiri veran ekzercadon kaj detale povas altigi nivelon de la aŭdpovo!

5. Esperantisto, familio esperanta, socio esperanta, la socio grave pli funkcias ol familio kaj persona persisto! Certe ju pli multajn geesperantistojn havas, des pli bonaj estas; esperantaj familioj funkcias pli efika ol sola kaj disa esperantisto en socia efekto; fondos unu kompletan socion de esperanto kun ĝia kulturo, pro tio la esperanto havas ĝian direkton por disvolvi. La sulkon fosis devu havi iun trakon! La sulko al ebena tero, ĝi estos pli kaj pli lumonta kaj glata; sed la sulko al montaro ĝi estos pli kaj pli nigrona kaj malfacila.

Pri miaj ŝatokupoj, nu mi ŝatas multe, do mi ŝatas malprofunde tial ne tre speciala! Konkrete mi ŝatas belskribaĵon per malmola plumo, pentraĵon per karbokrajono; ekzercojn(gimnastiko, simpligita Tajĝiĉŭan, Ok sekcia Sateno); ludas violonon kaj gitaron. Kiam mi aŭdis iujn plendadojn el malmultaj emerituloj, ke ili enuas kaj sin sentas malplena post emerigĝas, mi vere ne povas komprenas ilin pri iliaj pensoj.

En la 60jaroj kaj 70jaroj de last jarcent, tiam estas alta tajdo de ĉina naskado, mi bondeziras ke ĉiuj emeritoj longe havas siajn ŝatokupojn por plene ĝui iliajn emeritajn vivojn. La industrioj pri sano, maljuneco, hejmoservo, kadukulejo baldaŭ certe prosperos pli vigle en nia lando.

Pri miaj emeritaj projektoj estas ne grava, malpeza, laŭ mia plezuro, mia subita deziro kaj libertempo. Unue revizios, aldonos kaj poluros mian romanon manuskripton de “La Postesiĝoj”. Due daŭrige ludas kun geinfanoj per pensaĵo de la esperanto, dissemos verdan semon en ilia cerbo.

Trie kontinuos ludi mian violonon kaj gitaron, nur koncernas E-on. Kvare daŭrige estu observanto pri E-o, kaj en taŭga tempo, propagandos fondi E-an administran regionon, organon, organizon kaj ĝian administran konsilion. Ĝi eble nomiĝos “Esperanta Speciala Regiono” aŭ “Speciala Regiono Provuzita de E-o” aŭ “E-a Eksperimenta Zono”.

Mi jam skribis la proponon al la kultur-radio-filmtelevido-turism-sporta buroo de Ŝenĝen urbo por antaŭservo kaj preparo de “la homara sorta komunujo”. Mi proponas, ke la komunujo necesas koni lingvojn unu al alia kaj ĝian kulturon, en nia komunujo urĝe bezonas unu komunan lingvon por pli efike komuniki, do ni prefere devas konstrui unu grandan amuzan urbon por tute lerni, studi, praktiki, protekti kaj konservi ilin. Nomiĝas “la Homara Lingva Amuzan Urbon”, ĝi havos kvar kastelojn: “ĉina ideografiaĵo laŭlegita per diferencaj dialektoj aŭ lingvoj”; “ĉina lingvo latinizita per fonetika skribo”; “esperanto kontante lernita kaj praktikita”; “tutlingvoj en la mondo spertita”.

Lasu nin preĝi, ke la propono povos tiri atenton de koncernaj homoj kaj departementoj por plenumi ĝin.



Vidaĵo

Ekster fenestro — montoj staras,
Montoj ekster fenestra kadro;
Dometoj sur dekliv' fumaĵas
Kiel kaligrafiaĵ' varma.

Klara river' verda akvo,
Inter arboj — blankaj egretoj
Ĉasante ludas, flirtas vive —

Ili ĉasante, ĉasante,
Kiel infanoj ĵetas ridojn;
Vento flirtigas branĉpintojn,
Kelke da petaloj frapetas
Kviete tegmentrandeton.

Mi staras ĉe fenestrosako,
Rigardas longe sen moviĝo;
Vidas kiel verda monta koloro
Leviĝas sur la kadra ligno.

Ili ĉasante, ĉasante,
La tutan posttagmezon forportas
Sur siaj flugiloj arĝentaj.



Viktorio



La Homo en la Muro

Aŭ Kiel Ni Lernis Ĉesi Zorgi kaj Ami la Gastiganton

Timur Arslan



Prologo: Parazita Komencilo

En la komenco estis *Grundaĵo*. Poste venis la *Grandega Pinpilka Maŝino* — kosma evento tiel ĥaose glora, ke ĝi hazarde batis grundon ĝis memreplikaĵo. Tiu aĵo, post jarmiloj da provoj kaj eraroj (plejparte eraroj), fariĝis *la Homo*: giganta viandturo kun neklarigeblaj tuboj, pulsantaj muroj, kaj misteraj likvoriveroj. Por ni, ĝi estas la universo. Por ĝi, ni estas... nu, verŝajne haŭtŝeleroj.

Ĉapitro 1: La Terura, Abomenega, Malbonplena Tago de Profesoro Gluo

Profesoro Gluo — *tenia kun tenuro kaj superulkomplekso* — klakfrapis sian suĉan ventrozon sur la kretotabulon.

[Parazitoj 101: *Ni* estas la evoluo-pinto! La Homo estas nur klimatizita viandkesto!]

Liaj studentoj — miksaĵo de ankilostomoj, pedikoj, kaj dubema hepata distomulo Zorb — skribnotis. La klasĉambra muro (nomita *Hepata Lobeto 7B*) pulsadis je la 10a, kiel kutime.

[Rigardu!] Gluo montris sangocirklan diagramon.

[Tiuj ‘vejoj’ estas tubaĉoj. La ‘koro’? Glora pumpilo. Konscio? *Fi!* Se la Homo vivus, ĝi nin premus kiel... nu, parazitojn!]

Zorb levis timan flagelon:

[Sed profesoro... la *Kulto de la Granda Patrino Homo*? Ili diras ke la Homo *revas*. Ke niaj animoj kunfandiĝas kun ĝia konscio post—]

[*Herezo!*] Gluo purpurflamiĝis.

[Baldaŭ vi diros ke ĝi ‘ternas’ por komuniki! Fidu sciencon! Kaj ĉesu kultu!]

Ĉapitro 2: La Najbara Kulto

Vespere, Zorb ŝoviĝis en sekretan kunvenon sub la Lien-Arkado. Tie renkontiĝis la *Kulto de la Granda Patrino Homo*, gvidata de Fratino Micelo — funga mistikulino ŝatanta dramajn paŭzojn.

[Fratoj, fratinoj,] ŝi sonoris, sporoj tremante, [la Homo *vivas*. Ĝi *elektas* gastigi nin. Kial? Ĉar ni estas ĝiaj neŭronoj! Ĝiaj pensoj! Kiam ni mortas, niaj animoj leviĝas al la

Cerbo — regno de pura lumo kaj senfinaj *Vajfaj signaloj!*]

Zorb sentis tremon (aŭ eble nur indiĝeston). Li ĉiam scivolis kial la “klimatsistemo” de la Homo enhavis ion nomatan “antibiotikoj”.

Ĉapitro 3: La Eksperimento

Zorb faris noktostudojn pri nervofinoj apud la Interna Orelo. Laŭ kultmitologio, tie naskiĝis la “voĉoj” de la Homo.

Tago 1: Zorb aŭdis muĝon: [Bezonas... kafon...]

Tago 3: Krieton: [Kiu manĝis mian jogurton?!]

Tago 7: Melodian zumon: [Hej Siri, ludu *Parazita Krepusko* de Bring Me the Horizon.]

[Ĝi *konscias!*] Zorb spiregis. La Homo ne nur vivis — ĝi estis *adoleskanto*.



Ĉapitro 4: La Granda Debato (kaj Pli Malbona: Grupa Laboro)

En klaso, Zorb prezentis siajn trovaĵojn. Gluo mokridetis: [Aŭdaj halucinoj! La ‘voĉo’ de la Homo estas nur gaso el ĝia kol—]

—BRRRRROOOOOOM.

La ĉambro skuiĝis. Sisma muĝo resonis tra la muroj.

[Kio estis tio?!] kriis studento.

[... natura katastrofo,] balbutis Gluo. [La ‘ŝtonacida tajdo’ de la Homo simple—]

— [Mi ja diris: mi ne toleras lakton, panjo!]

Silento. Poste, de la plafono ekpluvis varma gluaĵo.

[Je la Sankta Apendico,] flustris Zorb. [Estas *milkŝejko!*]



Ĉapitro 5: La Malkaŝo (kaj la Ribelo)

Ĥaoso eksplodis. Parazitoj disiĝis je fakcioj:

- **Gluebluloj:** [La Homo estas malviva maŝino! Ĉi ‘milkŝejko’ estas termodinamika kondensiĝo!]
- **Kultanoj:** [La Homo estas reĝino, ni estas ŝiaj reĝaj pedikoj! Kliniĝu!]
- **Zorbaj Radikaluloj:** [Eble ni estas, nu, *mitokondrioj*? Atendu... kio estas mitokondrio?]

Tiam la Homo moviĝis.

Ne la kutimaj gargaroj. Tio estis intenca, terskua paŝo. Parazitoj ruliĝis. Muroj fariĝis plankoj. Blinda lumo traboris la mallumon — “fenestro”, laŭ la kulto.

Tra ĝi, ili vidis... alian Homon.

[Ho mia Dio,] flustris Zorb. [Ni estas en *bestoĝardeno*!]

Epilogo: La Vero (Kiu, Verdire, Mizeris)

La Homoj — plural — ja konsciis. Pli malbone: ili *enuis*. La universo de la parazitoj estis nur biologiprojekto de novulo: *Konstrui Daŭripovan Ekosistemon en la Dika Intesto de 14-Jarulo*.



Gluko emeritiĝis hontigite. Zorb fondis novfirmaĵon vendante probiotikajn ribelojn. Kaj la Homo? Ĝi ricevis *Sufiĉe Bone (C+)*.

Moralo de la rakonto:

Ĉiam kontrolu ĉu via universo estas gradita laŭ kurbo.

Karikaturo

John Huang



KONKURSO DE LA JARO!!!



Rita Mkrťjan

KARAJ GESAMIDEANOJ, KARAJ GEAMIKOJ, BONVOLU ATENTI!!! 📢📢📢📢



PASIS MALLONGA TEMPO POST LA UK EN BRNO.

NI JAM SKRIBIS, KE PARTOPRENO EN UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO DONACAS FELIĈON, BONEGAJN IMPRESOJN, BELEGAJN REMEMOROJN.

POR MULTAJ EL VI, LA 110-a UK ESTIS VIA UNUA ESPERANTO KONGRESO, POR ALIAJ -JAM KUTIMA, SED TUTE EGALE, POR ĈIUJ ESTIS LA PLEJ BELEGA EVENTO DE LA JARO.

LITERA TURO PROPONAS AL ĈIUJ, KIUJ DEZIRAS KAJ POVAS VERKI ESEON PRI LA PARTOPRENO EN UK,

KONKURSI, PROVI DAŬRIGI VIRTUALAN VOJAĜON EN "LONDON DE REMEMOROJ".

LA KONKURSON POVAS PARTOPRENI ANKAŬ TIUJ GEESPERANTISTOJ, KIUJ PARTOPRENIS ALIAJN UK-jn.

ILI SKRIBU ESEON PRI LA UK, KIU ESTIS PLI MEMORINDA POR ILI.

BONVOLU NE FORGESI, KE ESEO ESTAS LITERATURA VERKO, SED NE RAPORTO PRI VIA PARTOPRENO. 😊

KAJ FINE, 📢 GRAVEGA INFORMO PRI LA KONKURSO.

LA PLEJ INTERESA KAJ BONEGA ESEO(povas esti, ke ne nur unu), EVENTUALE APEROS EN PLEJ BONAN LITERATURAN PERIODAĜON, KONATAN AL NI ĈIUJ -



EN BELETRAN ALMANAKON(BA)!!!

"LITERA TURO" DANKAS REDAKTOROJN DE LA REVUO, KIUJ KONSENTIS TIAMANIERE PREMII NIAN(aŭ niajn) GAJNINTON! ❤️

VI, KARAJ GEAMIKOJ, VERE KONSENTOS, KE LA PLEJ BONA PREMIO POR VERKANTO ESTAS DANKEMAJ LEGANTOJ, ĈIFOJE, KROM NIAJ VIRTUALAJ GESAMIDEANOJ, ANKAŬ FIDELAJ LEGANTOJ DE BA!!!

SUKCESON AL ĈIUJ!

Bonvolu sendi la eseojn laŭ la retadreso,

literaturo.25@gmail.com

La limdato de ricevado de la verkoj estas la 20-a de septembro 2025j.

Vi mem pripensu la nomon de la eseo, nur ne forgesu- pri la temo:

-8 TAGOJ EL MIA VIVO, DUM FELIĈA RENKONTIĜO KUN UK!

La gajnintoj de la 4-a Interkultura Novelo-Konkurso.

Erika Godo

La 27-an de julio, dum la Universala Kongreso en Brno, Ĉeĥio, estis anoncitaj la gajnintoj de la kvara eldono INK kun la temo “Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinaj kaj Homo sapiens”.

Jen la 10 premiitoj:



Sperta kategorio

Zakhar Serebrov (Захар Серебров) – Rusio


Kie vojoj renkontiĝas (Там, где сходятся дороги)

Jorge Rafael Nogueras – Portoriko

La ĉioscieco de OV-GPT

Ljudmila Shebella (Людмила Шибелла) – Estonio

Lasta lavo (Последняя стирка)



Yin Jiaxin – Ĉinio


Olda Fan kaj la roboto-edzino

Mahin Rad (– ماهين راد) Irano

Ruĝa saŭco sur blua ĉemizo

سُسِ قرمز روی پیراهن آبی))

Komencanta kategorio



Javad Eskandari Mayvan (– جواد اسکندری مایوان) Irano

Kunulo ((همدم))

Elisabetta Antichi – Italio

Dankon, Komputilo (Grazie, Computer)

Mikhail Reztsov (Михаил Резцов) – Rusio

Malsatklingokuristo (Бегущий по лезвию голода)

Olena Klymovskykh (Олена Климовських) – Ukrainio

Generatoro de falsa vivo (Fake life генератор)

Stefan Grotz – Germanio

Nenio pli gravas

Lanĉita la sesa eldono de INK!

Vi povas jam verki kaj sendi novelojn por la sesa eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso. La nova temo estas: “Proksime al la celo”.

Eksciu pliajn detalojn ĉi tie.

<https://bobelarto.ink/eo/konkurso/>



Erika Godo

Estis aljuĝitaj la agnoskoj (premioj kaj honoraj mencioj) de la 76aj Belartaj Konkursoj de UEA. Gvidis la BK-ceremonion en la 110a Universala Kongreso de Esperanto nov-elektita Prezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., surbaze de materialo preparita de la sekretario de la Belartaj Konkursoj, Miguel Gutiérrez Adúriz.

La agnoskoj estis:

BRANĈO POEZIO

La unua premio estas aljuĝita al “Al mia unua instruistino nun 90-jara...” de Benoît Philippe el Germanio.

La dua premio estas aljuĝita al “Amara bukedo” de Nicolau Dols el Hispanio.

La tria premio estas aljuĝita al “Aŭdu” de Benoît Philippe el Germanio.

Honora mencio estas aljuĝita al “La fia komedio” de Gonçalo Neves el Portugalio.

Honora mencio estas aljuĝita al “Buçado” de Gonçalo Neves el Portugalio.

Honora mencio estas aljuĝita al “Poacoj sur roko” de Choe Taesok el Litovio/Koreio.

BRANĈO PROZO

La unua premio estas aljuĝita en egaleco al “Plagiato” de Jorge Rafael Noguerras el Usono/Portoriko kaj “Ridindaj amaferoj” de Debra Hamel el Usono.

La dua premio estas aljuĝita al “La malfacila vivo dum la milito” de Jean de Dieu Kikako el D.R. Kongo.

La tria premio estas aljuĝita al “Kiam flugilo rompiĝas” de Wei Yubin el Ĉinio.

BRANĈO MIKRONOVELO

La unua premio – premio Paula Adúriz – estas aljuĝita al “!” de Steven Cybulski el Usono.

La dua premio estas aljuĝita al “Mortigo de Mnemozino” de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

La tria premio estas aljuĝita en egaleco al “Kreema Infano” de Lurdes Oliveira el Portugalio kaj “Ne krokodilu!” de Debra Hamel el Usono.

BRANĈO TEATRAĴO

La unua premio estas aljuĝita al “Civilizita konversacio” de Jorge Rafael Nogueras el Usono/Portoriko.

La dua premio estas aljuĝita al “Ara” de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

La tria premio estas aljuĝita al “Dominiko Orban en la infero” de Laimundas Abromas el Litovio.

Honora mencio estas aljuĝita al “Mi estas Neniulo” de Ralph Glomp el Germanio.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO

La unua premio – premio María Cuevas – estas aljuĝita al “Bopatrino – superheroo, surhavanta antaŭtukon” de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

La dua premio estas ne aljuĝita.

La tria premio estas ne aljuĝita.

INFANLIBRO DE LA JARO

La premio “Infanlibro de la jaro” estas aljuĝita al la eldonejo “ZIRIA”, pro la verko “Vivo” de Roberto Pérez-Franco, ilustrita de Margarita Cubino kaj tradukita de Norberto Díaz Guevara.

BRANĈO ESEO

La unua premio – premio Luigi Minnaja – estas aljuĝita al “Semantika potenco de Esperanto: de kombineblo al signifo” de Toni Espinosa el Hispanio.

La dua premio estas ne aljuĝita.

La tria premio estas ne aljuĝita.

BRANĈO KANTOTEKSTO

La unua premio estas aljuĝita al “Ploras la ĉiel” de Petro Palivoda el Ukrainio.

La dua premio estas aljuĝita al “Amhistorio” de Petro Palivoda el Ukrainio.

La tria premio estas aljuĝita en egaleco al “Nedeca tango” de Ewa Barbara Grochowska el Francio kaj “Ĝuu la vivon” de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

9-a TRADUKKONKURSO „LUCIJA BORČIĆ“

Honore al Lucija Borčić (26.07.1921-14.11.2015) Kroata Esperantista Unuiĝo lanĉas la 9-an literaturan traduk-konkurson de iu ajn nacia lingvo al Esperanto.

La konkursaj branĉoj estas jenaj:

- poezio: maksimuma longo ne fiksita
- prozo - rakonto aŭ novelo: maksimuma longo 30.000 tajperoj (kun spacoj)

La rezultojn oni publike anoncos la 14-an de novembro en Zagrebo, okaze de la 10-a Memorkunveno al Lucija Borčić.

La organizantoj disdonos ĝis tri premioj po branĉo. La aliro al la konkurso estas libera al ĉiu Esperantisto, kiu rajtas parto-preni per maksimume tri konkursaĵoj/verkoj kiuj antaŭe ne estis publikigitaj ĉu en la presa, reta, bloga, fejsbuka formoj.

Al la konkursaĵo oni nepre aldonu jenajn informojn:

- nomon kaj familian nomon, poŝtan adreson, retadreson de la konkursanto;
- titolon de la originalo, nomon kaj familian nomon kaj la bazajn datumojn de la aŭtoro de la tradukita verko.

La tradukaĵojn kune kun la originalaj tekstoj kaj aldonaj informoj oni sendu al la retadreso: hes.keu@gmail.com ĝis la 28-a de septembro 2025.

La premioj konsistas el diplomo.


La organizanto pretigos bit-libron kun la premiitaj verkoj.

www.hes-keu.hr



Esperanto por mi

16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner n-ro 9



Denove eldoniĝis la libro de Helga

Eble vi surpriziĝos aŭdante, ke la libro de Helga denove aperis, sed ja la nova volumo ĵus aperis la 18an de julio 2025. La unua volumo aperis en junio 2020, do tio signifas, ke mi publikigis preskaŭ dufoje en unu jaro. Ni planas eldoni la 10-an volumon fine de ĉi tiu jaro, kiu estos grava publikaĵo, ĉar la libroj montros al la mondo kiel 160 esperantistoj okupiĝis pri Esperanto kaj kontribuis al mondpaco, kune kun iliaj portretoj.

Pri Helga



Helga naskiĝis en Orienta Germanio en 1945 kaj amis pentradon de frua aĝo. Ŝi poste studis pentradon en la distrikta kulturakademio, fariĝis profesia pentristino kaj vivtenis sin per portretpentrado. Ŝi komencis lerni Esperanton en 1980, kaj de tiam vivis kun la devizo "Esperanto kaj paco". Ŝi okazigis ekspoziciojn ĉe Univrŝalaj Kongresoj kaj aliaj eventoj.

Mi renkontis ŝin dum la 100-a UK (okazinta en Lille, Francio) en 2015, kaj ŝi ŝajnis sana tiutempe, sed nun ŝi estas rulseĝulo. Ŝi ankaŭ suferas pro fizika doloro, kaj kvankam ŝi foje ricevas multekostan kuracadon,

ŝia stato ne boniĝas, kaj ŝi ofte skribas pri tio en siaj retroŝtoj. Ne estas vortoj de konsolo, kaj ofte estas malfacile por mi respondi kun taŭgaj konsoloj.

Post tio, ial ŝi ofte sendis al mi portretojn desegnitajn per krajono. Venis ankaŭ portreto de mi. Mi estis konfuzita, ĉar mi ne sciis, kion fari el ili, sed poste mi havis ideon eldoni libron el ili, kaj kiam mi proponis tion al Helga, ŝi estis tre ĝoja. Kaj tiel la unua volumo estis publikigita en 2020. Mi intencis, ke tio estu la fino, sed Helga volis desegni pli kaj publikigi pli, do mi decidis daŭrigi la eldonon kiel la serio. Helga scias, ke ŝi ne havas multe da tempo restanta en sia vivo, kaj tial ŝi decidis fari ĉi tiun publikaĵon sia lasta projekto. Do ankaŭ mi decidis helpi ŝin laŭeble longe. Mia provizora celo estas publikigi la 10-an volumon antaŭ la fino de ĉi tiu jaro. Mi estas pli aĝa ol ŝi, do por plibriligi la talenton de Helga al la mondo, mi mem devas prizorgi mian propran sanon.

Ĉi tiuj publikaĵoj ankaŭ estis agnoskitaj de UEA, kaj Helga estis premiita pro "elstaraj agadoj" antaŭ du jaroj. Krome, Helga volis resumi sian vivon kiel pentristino, do mi publikigis ŝian biografian libron "Mia pentrista vivo - Por Esperanto kaj por Paco" en decembro 2023. Nuntempe, ŝi ricevis proponon desegni portretojn de esperantistinoj en la historio, kiuj kontribuis al Esperanto.

Kiel trovi taŭgajn esperantistinojn

Nun, la homoj, kiuj aperas en ĉi tiu 9-a volumo, estas listigitaj sube. Ĉu vi konas ilin?

1. Jean-Pierre CAVELAN (Francio)	10. Edmond kaj Arlette PLUTNIAK (Francio)
2. Maurizio GIACOMETTO (Britio)	11. Ina TAUTORAT (Germanio)
3. Erika GODÓ (Hungario)	12. Charline Buhendwa TUMUSIFU (DR Kongo)
4. Heidi GOES (Belgio)	13. Lode VAN DE VELDE (Belgio)
5. Malcolm JONES (Britio)	14. Lu WUNSCH-ROLSHOVEN (Germanio)
6. KOZAWA Mami (Japanio)	15. Lidia YEROFEEVA (Rusio)
7. Rita (Hripsime) MKRTĈJAN (Armenio)	
8. Rob MOERBEEK (Nederlando)	
9. PHAM Mai Lan (Vjetnamio)	

Esence, mi provas havi egale 8 virinojn kaj 8 virojn, kaj provas trovi homojn el diversaj landoj. Mi ankaŭ provas serĉi homojn, kiuj ne estas tre famaj, sed kiuj laboras por Esperanto loke. Komence mi trovis taŭgajn homojn el miaj konatoj, kiujn mi konis, kiam mi laboris por la Azia Esperanto-Movado kaj por UEA kiel ĝia estrarano, kaj tiujn el la

partoprenantoj en la "Esperanto-Sumoo", kiun mi organizas, sed jam mi elektis 150 homojn kaj ekestas malfacile trovi novajn homojn memstare, do mi petas, ke homoj, kiuj jam aperis en la libroj, serĉu novajn.

Helga desegnas portretojn laŭ fotoj. Ŝi bezonas multe da tempo, ĉar ŝi desegnas, ne neglektante eĉ unu haron, sed kiam ŝi estas relative bonfarta, ŝi povas fini unu portreton en du aŭ tri tagoj, kaj kiam tio okazas, Helga sendas al mi retpoŝton, petante min "doni al ŝi laboron", do mi plu serĉas homojn serioze.

Inter la homoj, kiuj aperas ĉi-foje, naŭ estas homoj, kiujn mi jam konis, aŭ partoprenantoj en la "Sumoo", kaj la aliaj estas homoj, kiujn mi neniam antaŭe renkontis. Mi ŝatus havi du homojn el Japanio, sed ĉi-foje estas nur unu. La japanino prezentita ĉi-jare estas s-ino KOZAŬA Mami el la gubernio Jamanaŝi, kiu publikigis ĉe mi ĉi-jare esperantan libron nomitan "Louis Braille, la inventinto de Brajlo". S-ino Kozaua estas vidhandikapita, kaj mi impresiĝis pro tio, ke ŝi sukcesis publikigi tian libron malgraŭ sia handikapo kaj sia mallonga lernado de Esperanto, do mi petis ŝin aperi en la libro. Mi estas certa, ke legantoj estos kortuŝitaj de ŝia portreto kaj ŝia implikiĝo en Esperanto.

El Demokratia Respubliko Kongo, ni havas junan flegistinon nomatan Charline. La regiono, kie ŝi loĝas, estas invadita de ribela grupo nomata M23, kiu kaŭzas suferegon al la loĝantoj. Ili vivas, kie ili eĉ ne scias, kio estas paco. Ŝia eseeto pri la realo de la situacio donos al legantoj veran kortuŝon pri la tragedio en la mondo, ne nur en Ukrainio kaj Gazao.

Ĉiuj portretitoj laboras por Esperanto diversmaniere : kiel pentristo, kiel poeto, kiel esploristo, kiel tradukisto ktp. Kiam mi legas iliajn eseojn, mi sentas ilian amon, kredon kaj sindonemon al Esperanto, scias, kiel Esperanto riĉigas ilian vivon, kaj mi sentas min tre feliĉa esti inter ili.

La portretoj de Helga estas vere mirindaj. En la libro, ili okupas nur kvaronon de la grandeco de A4-papero, do malfacilas aprezi ilian veran mirindecon, sed kiam mi vidas la originalojn, mi miras. La personeco kaj vivhistorio de la portretitoj aperas. Kiel redaktanto, mi estas vere ĝoja povi kontaktiĝi kun la originaloj. Mia alia avantaĝo estas koni la portretitojn dum redaktado kaj korektlegado de eseoj.

Mi esperas, ke ĉiuj spertos ĉi tiun mirindecon de la portretoj. Ĉi tiuj estos donacitaj al la Esperanto-Muzeo en Vieno.

Libroj utilas, nur kiam ili estas legataj

Nenio estas pli malĝoja ol vidi librojn amasiĝintaj en ĉambro, ne vendotaj, nek legotaj. Mi esperas, ke vi aĉetos ilin kaj legos ilin. Mi ŝatus, ke vi sendu ilin al viaj esperantaj amikoj tra la mondo. La prezo estas nur 5 eŭroj por unu volumo (16-paĝa, kolora), kaj ĝi pezas 70 gramojn, do vi povos facile sendi ĝin eksterlanden.



Volumoj 1 ĝis 3 estas elĉerpitaj, sed ankoraŭ estas multaj aliaj volumoj. Ni havas "Mia Vivo kiel Pentristino - Por Esperanto kaj Paco" de Helga (8 eŭroj) kaj "Louis Braille" de Kozaua (8 eŭroj) en stoko. Ĉiuj libroj estas skribitaj en Esperanto, do ne-esperantistoj ne povas legi ilin, sed povas vidi la portretojn, do estus bone, se homoj aĉetus ilin nur por vidi ilin. La Zaozhuang-a Esperanto-Muzeo en Ĉinio projektas la eldonon de ĉiuj volumoj, tradukante ilin en la ĉinan lingvon, sed bedaŭrinde mia eldonejo Horizonte ne havas la povon eldoni japanan kaj alilingvajn tradukojn.

Mi estus ĝoja, se Esperanto povos plu disvastiĝi kaj kontribui al monda paco. Por atingi tion, mi opinias tre grave, ke vi ĉiuj plibonigu viajn Esperantajn kapablojn kaj legu Esperanto-librojn.

Por mendi, bonvolu kontakti Libroservon de UEA (libroservo@co.uea.org) aŭ Hori Jasuo (horizonto@r.water.sannet.ne.jp). Mi atendas vian mendon.

HORI Jasuo, Gunma, Japanio
Redanktante
de la libroj de Helga



LITERATURA VIVO

Numero 001

Julio 2025

©Monthly Published by John Huang & Erika Godo in Mississauga, Ontario, Canada




LITERATURA VIVO

Numero 002

Aŭgusto 2025

©Monthly Published by John Huang & Erika Godo in Mississauga, Ontario, Canada



Literatura Vivo estas riĉa kaj diversa, plena de diversaj tendencoj, ĝenroj kaj kreintoj. Ni ŝatus prezenti ĉi tion al niaj legantoj ĉiumonate per poemoj, prozo, kantotekstoj kaj intervjuoj. Aliĝu al ni en ĉi tiu vojaĝo tra la literaturo. Ĉiu monato, ni alportos al vi novajn verkojn kaj pensojn, kiuj inspiros vin kaj malfermos viajn okulojn al la vasta mondo de la literaturo.

Retejo: www.literaturavivo.com

Retpoŝta adreso: info@literaturavivo.com

Erika Godo: goderika@gmail.com

John Huang: 4882588@outlook.com